


# murray bookchin

# POR EKOLOGIA SOCIO

Esperantigis D. C.

SAT-Broŝurservo
1983

murray
bookchin

# POR EKOLOGIA SOCIO

Esperantigis D. C.

SAT-Broŝurservo
1983

*La tradukinto ŝuldas varmecan dankon al Kamaradoj Valo, Duc-Goninaz, Kribo, kiuj helpis en la solvo de dornaj punktoj, kaj sen kiuj ne povus alfiniĝi la laboro.*

KOREKTENDOJ

| Paĝo | linio | Legi | anstataŭ |
|---|---|---|---|
| 7 | -2 | ekspluatantajn | ekspluantajn |
| 13 | 11 | fremdiĝinta | fremdigita |
| 31 | 6 | anstataŭigis | anstataŭis |
| 61 | -12 | antaŭkolumberaaj | antaŭkolombieraaj |
| 112 | -6 | transmondon | transcendon |

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1983 * 12 FF

# TRANSE DE LA MANKOTEMPO

Teksto aperinta kiel "Enkonduko" al "Post-Scarcity Anarchism", 1971.

La normala fluo de nia ekzistado tiom plene mergiĝas en la nuno, ke ni estas nekapablaj vidi la diferencojn, kiuj apartigas la periodon, kiun ni travivas, de la antaŭaj, eĉ kun intertempo de nur unu generacio. Tia ennuntempa enfermado povas estiĝi tre inside. Tiel ni troviĝas iafoje sen nia scio katenitaj al la plej reakciaj aspektoj de la tradicio, ĉu temas pri kadukiĝintaj ideologioj kaj valoroj, ĉu pri hierarkiaj formoj de organizado, aŭ pri miopaj kondutoj. Pro manko de sufiĉe ampleksa kaj tempolonga perspektivo, la izoliĝo en la nuno ja riskas falsi nian komprenon pri la mondo same en ties nuntempo kiel en ties multnombraj porestontecaj eblecoj.

Ĉar ja la mondo profunde transformiĝas, pli profunde ol ŝajnas tion akcepti multaj el inter ni. Ĝis freŝdata tempo la disvolviĝo de la homa socio sin faris ĉirkaŭ la abruptaj problemoj de la ne-evitebla materiala manko kaj iliaj subjektivaj korelativoj : inhibicio, rezigno, kulpeco. La grandaj historiaj rompiĝoj, kiuj detruis la primitivajn organajn sociojn kaj kontraŭstarigis la homon al la homo kaj la homon al la naturo, estis generitaj de la problemoj de pluvivado, de pura kaj nura tenado de la homa ekzisto.(1) Kio liveris al la patriarka familio, al la privata proprieto, al la klassupereco kaj al la ŝtato ties historian pravigon, tio estas la manko de la materialaj havaĵoj ; estas ĝi, kiu nutris la grandajn konfliktojn de la hierarkia socio, ekstarigante la urbon kontraŭ la kamparo, la spiriton kontraŭ la sentemeco, la laboron kontraŭ la ludo, la individuon kontraŭ la socio, kaj finfine la individuon kontraŭ ĉi-lasta mem.

Perfekte vane estas demandi sin hodiaŭ, ĉu tiu

-------

(1) Per "organaj socioj" mi nomas formojn de organizado, en kiuj la komunumo unuiĝas per parencligoj kaj per komuneco de interesoj koncerne la vivrimedojn. Tiaj organaj socioj ankoraŭ ne estas dividitaj en klasojn kaj ekspluantajn burokratismojn tiajn, kiajn oni observas en la hierarkia socio.

longa kaj serpenta evoluo povus disvolviĝi laŭ diferenca maniero malpli kruela. Tiu evoluo, koncerne la esencon, estas malantaŭ ni. Simile al la legenda pomo, kiun oni tute konsumu, kiam oni ekmordis ĝin, necese estas, ke la hierarkia socio ĝisekstreme laŭiru sian sangoplenan vojon antaŭ ol oni povos ekzorci ĝiajn diablajn instituciojn. Kiel ajn estas, nia loko en tiu historia dramo fundamente diferencas de tiu de kiu ajn en la pasinteco. Vivante en la XX-a jarcento, ni estas propra sence la heredantoj de la homa historio kaj de la nememorebla homa klopodo liberiĝi de la labora ŝarĝo kaj de la materiala nesekureco. Por la unua fojo de post la pratempaĝoj, tiu nia jarcento portis la homaron ĝis nivelo de teknologia disvolvado kvalite nova, de kie ĝi povas ekrigardi sian spertadon per okulo tute freŝa.

Nia jarcento fine atingis la perspektivon de materiala abundo por ĉiuj, ĉar la vivrimedoj estas disponeblaj en sufiĉo sen bezono ege laciĝi per ĉiutaga laboro. Oni malkovris, tiom por la individua kiom por la industria uzado, riĉofontojn, kiujn oni ankoraŭ ne konis tridek jarojn antaŭe. Ni konceptis maŝinojn por aŭtomate fabriki maŝinojn. Ni finpretigis mekanismojn, kiuj ebligas fari la penigajn laborojn kun multege pli da efikeco ol la muskolforto, kiuj superas la lertan faremon de la plej spertaj manoj, aŭ kies kalkulpotenco superas la rapidecon kaj precizecon de la plej naturdotita homa spirito. Helpo de tiu novtipa teknologio ebligas al ni antaŭvidi la produktadon de la necesaĵoj por sin nutri, sin vesti, sin loĝi, kaj ankaŭ de vasta gamo de diversaj objektoj sen tio, ke la homaro malŝparu sian altvaloran tempon por absurdaj laboroj. Resume, unuafoje en la historio ni atingas la sojlon de postmankotempa socio.

Ĉi tie endas insisti pri la vorto "sojlo", ĉar la nuntempa socio absolute ne realigis la eblecojn, kiujn enhavas ĝia teknologio, transpasi la mankon. Nek la materialaj "privilegioj", kiujn la moderna kapitalismo laŭŝajne konsentas al la mezklasoj, nek ĝia senbrida malŝparo koncerne la vivrimedojn, esprimas la raciecon, la humanismon, la ne-fremdiĝon implicajn en la ideo de "postmankotempa socio".

Kompreni tiun "transe de la mankotempo" kiel simplan abundon de disponeblaj sociaj havaĵoj estus same absurde kiel konsideri vivantan organismon kiel adicion pure kvantan de kemiaj substancoj. La manko estas io tute alia ol la vivrimeda manko ; se tiu ĉi vorto havas sencon por la homo, ĝi devas ampleksi la sociajn rilatojn kaj la kulturan sistemon, kiuj kreas en la psiko la nesekurecon. En la organaj socioj, tiu ĉi nesekureco povas rezulti el la premado praktikata de la natura mondo kaj de la necertaj limoj de la homa mondo ; en hierarkia socio, ĝi rezultas el la limoj kaj subpremado truditaj al la homo per la klaseksplUatado. Same, la esprimo "transe de la mankotempo" havas fundamentan signifon, kiu superpasas la puran kaj simplan abundon de la vivrimedoj : ĝi signas la <u>tipon</u> de ekzistado ebligatan de tiuj rimedoj. En postmankotempa socio la rilatoj inter la homoj kaj la individua psiko plene spegulos la liberecon, sekurecon kaj aŭtonomecon, kiujn abundo igas eblaj. Unuvorte, tia socio estas la efektiviĝo de la sociaj kaj kulturaj eblecoj, kiujn enhavas teknologio de la abundeco.

La kapitalismo ne nur ne konsentas "privilegiojn" al la mezklasoj, sed ĝi tendencas ilin malnobligi ankoraŭ pli ol la aliajn sociajn tavolojn. Abundeco utilas al la sistemo por igi la etburĝon la komplico de ties propra premateco : unue, la sistemo lin malaltigas ĝis la rango de varo, de objekto lanĉita sur la merkaton ; poste ĝi integras liajn bezonojn mem en la varsistemo. Tiel, ĉiumomente tiranate de la sistemfunkciado, la etburĝa personeco estas plene regata de la nesekureco. Ĉiaj drogoj - varoj kaj ankoraŭ varoj - estas venenoj. Tiusence, nenio estas hodiaŭ pli premanta ol la "privilegio", ĉar la psiko de la "privilegiita" homo estas ĝis sia profundo nur kampo malfermita al la ekspluatado kaj superregado.

Sed, pro ironio de la dialektiko, okazas ĝuste ke la veneno estas ankaŭ la kontraŭveneno. La kapableco de l'kapitalismo krei abundecon - drogo, kiu ebligas al ĝi praktiki la superregadon - priloĝas per strangaj bildoj la sonĝojn de siaj viktimoj. Trapasante la subpremadan terursonĝon, la vizio de la libereco vekas la intuicion de tio, kio povus esti alia, se

la abundeco almenaŭ estus en la servo de l'homo. Kiel la abundeco enŝoviĝas en la nekonscion por ĝin manipuli, same la nekonscio ŝoviĝas en la abundecon por ĝin liberigi. La fundamenta kontraŭeco de la hodiaŭa kapitalismo sidas en la streĉado inter tio, kio estas, kaj tio, kio povus esti - inter la realeco de la superregado kaj la ebleco de la libereco. La detruo de la burĝa socio ĝerme kuŝas en la rimedoj mem, kiujn ĝi uzas por sin protekti, nome la teknologio de la abundeco, kiu unuafoje en la historio estas kapabla produkti la materialan bazon de la liberiĝo. La sistemo estas iasence komplico de la fortoj, kiuj ĝin subminas. Por parafrazi Hegelon, "estas tro malfrue por lukti ; ĉiu ekuzata rimedo nur pligravigas la malbonon..."

Se la defendo de la burĝa socio tendencas reefiki kontraŭ ĝi mem, tio estas vera ankaŭ pri la entreprenitaj klopodoj ĝin detrui. La plej granda forto de la hodiaŭa kapitalismo kuŝas en ties kapableco subfosi la revoluciajn celojn per la superregada ideologio. Kio donas al ĝi tiun forton, tio estas, ke la "burĝa ideologio" ne estas pure burĝa. La kapitalismo estas heredanto de la historio, heredanto de ĉiuj subpremaj energioj de la antaŭaj hierarkiaj socioj, kaj la burĝa ideologio konstituiĝis per la plej malnovaj elementoj de la regado kaj de la socia kondiĉigo - elementoj tiel malnovaj, tiel enradikiĝintaj, laŭŝajne tiel nediskuteblaj, ke ni ofte ilin prenas por la "homa naturo". Ne pli elokvente ilustras la potencon de tiu kultura heredaĵo ol la penetrado de la valoroj de la hierarkio, seksismo kaj forofero en la profundon de la socialisma projekto mem. Estas tiuj elementoj, kiuj liveras la katalizajn enzimojn de la ĉiutaĝaj sociaj rilatoj en la burĝa socio kaj ankaŭ en tio, kion oni nomas la "revolucia movado".

Hierarkio, seksismo kaj oferspirito ne malaperas pro la stariĝo de iu "demokrata centralizismo", iu "revolucia direktado", iu "laborista ŝtato" aŭ iu "planita ekonomio". Male, hierarkio, seksismo kaj oferspirito funkcias despli bone, ke la centralizismo prezentiĝas kiel "demokrata", la direktantoj kiel "revoluciaj", la ŝtato kiel posedaĵo de la

"laboristoj" kaj la produktado de varoj kiel "planita". Pro tio, ke la socialisma projekto eĉ ne konfesas la ekziston de tiuj elementoj kaj ankoraŭ malpli ties pereigan rolon, la "revolucio" mem fariĝas la fasado de la kontraŭ-revolucio. Spite al Marks, kio emas "konsumiĝi" post tiu tipo de revolucio, tio ne estas la ŝtato, tio estas la konscio mem de la superregado.

En realeco, larĝa parto de tio, kion la socialisma teorio nomas "planita ekonomio" jam estas realigita de la kapitalismo ; tial la ŝtata kapitalismo havas ne multe da peno adopti kiel oficialan ideologion tutajn partojn de la marksisma doktrino. Krome, en la evoluintaj kapitalistaj landoj la teknologia progreso igis kaduka unu el la plej gravaj kialoj por starigo de "socialisma ŝtato", nome la neceson, laŭ la vortoj de Marks kaj Engels, "kreskigi la aron de la produktivaj fortoj kiel eble plej rapide." Daŭre diskutaĉi pri "planita ekonomio" kaj "socialisma ŝtato - nocioj naskiĝintaj en la antaŭa stadio de l'kapitalismo kaj en malsupera stadio de la teknologia disvolviĝo - apartenas al sekta kretenismo. La revolucia projekto devas vastiĝi ĝis la kolosaj dimensioj de la socieblo j de nia epoko ; ĉar se la antaŭkondiĉoj de la libereco disvolviĝis transe de la plej aŭdacaj revoj de la pasinteco, same estas koncerne la prezenton, kiun oni povas fari al si pri tiu libereco. Atinginte la sojlon de postmankotempa socio, ni vidas maturiĝi la prisocian dialektikon, kaj preciziĝi same tio, kio estas abolenda, kiel tio, kio estas kreenda. Ni devas meti finon ne nur al la sociaj rilatoj ekzistantaj en la burĝa socio, sed ankaŭ al tiu heredaĵo el superregado akumulita dum miljaroj da hierarkia organizado. Kion ni kreu anstataŭ la burĝa socio, tio estas ne nur la senklasa socio de la socialisma projekto, sed ankaŭ la nesubprema utopio de la projekto anarkiisma.

Ĉis nun ni parolis precipe pri la teknologia kapableco de la burĝa socio, pri la fundamento el eblecoj, kiun ĝi tiel oferas al la formado de postmankotempa socio, kaj pri la streĉado, kiu el tio rezultas inter kio estas kaj kio povus esti. Oni ne imagu tiun streĉadon kiel svagan nocion flosantan inter aliaj filozofiaj konceptoj. Tiu streĉado estas realaĵo, kiu

ĉiutage esprimiĝas en la vivo de milionoj da homoj. Eĉ se nur intuicie, oni komencas trovi netolereblaj la sociajn ekonomiajn kaj kulturajn kondiĉojn de ekzistado, kiujn oni pasive akceptis antaŭ nur deko da jaroj. La kreskado dum la tutaj sesdekaj jaroj de la movado por la liberiĝo de la Nigruloj, kiu pliakrigis la percepton de la nigrula popolo pri ĉiuj aspektoj de ties subpremo, estas eksploda pruvo de tiu evoluo. Al la nigrula movado aldoniĝis la movado por la liberiĝo de la virinoj, la movado de la junularo, de la infanoj, de la samseksemuloj. Preskaŭ ne estas etna aŭ profesia grupo, kiu ne konas boladon nekonceptеblan en la antaŭa generacio. La renverso, kiu faras la hieraŭajn "privilegiojn" la hodiaŭaj rajtoj, disvastiĝas kvazaŭ vertiĝe inter la studentoj, la junuloj ĝenerale, la virinoj, la etnaj minoritatoj, kaj post tempopaso inter la tavoloj mem, sur kiuj la sistemo tradicie sin apogis. Sed la koncepto mem pri rajto estas trafita de suspekto, kiel implicanta arogante indulgan eliton, kiu koncesias aŭ rifuzas "rajtojn" kaj "privilegiojn" al malsuperuloj. La batalo kontraŭ elitismo kaj hierarkio, kiel tiaj, elpuŝas la batalon por la "rajtoj". Oni postulas ne plu tiom la <u>justecon</u> kiom la <u>liberecon</u>. La incitiĝemo rilate la ekscesojn - eĉ la plej negravajn laŭ la antaŭaj kriterioj - atingas akrecon antaŭ nelonge neimageblan.

La liberala eŭfemismo, kiu signas tiun streĉon inter la realo kaj la ebleco, estas la "kresko de la esperoj". Sed kion tiu sociologieska formulo estas nekapabla manifesti, tio estas, ke tiuj "esperoj" plu kreskos ĝis la realiĝo mem de la utopio. Ĉar la instigilo, kiu tiujn "esperojn" tiel devigas "kreski" - aŭ pliverdire grimpi kun ĉiu nova agnoskita rajto - ĝi estas la fundamenta malracieco de la kapitalisma sistemo. De kiam la cibernetiko kaj aŭtomatigo ebligas redukti al preskaŭ nenio la laboron, nenio povas aspekti al la junularo pli sensence ol ŝvitlabori dum tuta vivo. De kiam la moderna industrio kapablas produkti abundecon por ĉiuj, nenio aspektas pli perverse al la malriĉuloj ol esti devigataj pasigi tutan sian vivon en mizero. De kiam ekzistas vivrimedoj, kiuj ebligas la socialan egalecon, la subigo en kiu estas plutenataj la etnaj

minoritatoj, la virinoj kaj samseksemuloj, estas de ili sentata kiel krimo. Tiajn kontraŭecojn oni povus eldiri tiom, kiom elŝprucis da problemoj naskantaj la nunajn angorojn de nia socio.

En sia klopodo pluteni la mankon, la laboron, la malriĉecon kaj la submetiĝon spite la kreskantan eblecon transpasi la mankon kaj vivi en la libertempo, la abundeco kaj libereco, la kapitalismo pli kaj pli klare montriĝas kiel la socio plej malracia, plej artifika en la historio. La socio de nun aperas kiel forto same fremdigita kiel fremdiga. Ĝi pozas kiel la "alia", se tiel diri, fronte al la plej profundaj deziroj kaj impulsoj de la homaro. Pli kaj pli larĝe la eblo determinas kaj informas la ĉiutagan perceptadon pri la realo ĝis tio, ke ĉio rilatanta al la socio - kaj eĉ ties "logoj" - aperas kiel tute sensenca, kiel generita de ega kolektiva deliro.

En tiaj kondiĉoj ne mirige estas, ke ekaperas subkulturoj, kiuj defendas, kontraŭ la nun kutima sinteza nutrado la naturan nutradon, kontraŭ la monogamia familio la ampleksan familion, kontraŭ la seksa subpremado la seksan liberecon, kontraŭ la atomigo la triban organizadon, kontraŭ la urba vivo la komunecan vivon, kontraŭ la konkurado la interhelpon, kontraŭ la proprieto la komunismon kaj fine kontraŭ la ŝtata hierarkio la anarkiismon. La ago mem rifuzi la vivon laŭ la burĝaj trudoj preparas utopian vivmanieron. La negacio fariĝas aserto ; la forĵeto de la nuntempo fariĝas formulado pri la estonteco, kaj tio ĉi en la propra kerno de la kapitalisma putriĝo. La "dropping out", la fuĝo el la tempo, fariĝas ia "dropping in", ia maniero sin engaĝi - sin engaĝi en formon de sociaj rilatoj hezitaj, eksperimentaj kaj ankoraŭ dubasencaj, sed kiuj estas tiuj de la utopio. Konsiderata kiel fincelo, tiu vivostilo ne estas la utopio, ĝi povas esti eĉ plorinde fiaska. Sed se oni ĝin konsideras kiel etapon, tiu vivostilo kaj la vojoj, kiuj kondukas al ĝi, estas nepre necesaj por la redifinado de la revoluciulo, por la konscia taksado, kiun li devas fari pri ĉio transformenda, se li volas, ke la revolucio sukcesu. La revoluciulo devas meti antaŭ sin la problemon pri la vivostilo, se li nepre volas antaŭŝirmi sian integrecon kaj disponi pri la psikologiaj rimedoj, kiuj malebligos la subfoson de la re-

volucia projekto fare de la burĝaj valoroj.

La streĉo inter la realo kaj la eblo, inter la nuntempo kaj la estonteco atingas apokalipsajn dimensiojn en la ekologia krizo, kiun ni travivas. Kvankam granda parto de tiu ĉi libro traktas la problemojn pri la medio, konvenas jam nun formuli kelkajn ĝeneralajn konkludojn. Ĉia provo solvi la median krizon interne de la burĝa kadro estas denuncenda kiel ĥimero. La kapitalismo estas esence anti-ekologia. Konkurenco kaj akumulado estas la leĝo de ĝia funkciado, kiun oni povas resumi kiel Marks jene : "la produktado por la produktado". Ĉia io, eĉ rara aŭ sakrala, "havas sian prezon" kaj taŭgas por la merkato. Socio de tiu tipo necese traktas la naturon kiel krudan riĉaĵon ekspluatindan kaj prirabindan. La detruo de la natura mondo ne devenas de megalomania frenezo, sed neeviteble rezultas el la logiko mem de la kapitalisma produktado.

Oni ne leĝere denuncu la skizoidan sintenon de la publiko rilate la teknologion, sintenon,kiu asocias teruron kaj esperon. Efektive ĝi instinkte esprimas fundamentan veron : tiu sama teknologio, kiu povus liberigi la homon en socio organizita cele al kontentigo de liaj bezonoj, povas lin nur detrui en socio nure celanta "la produktadon por la produktado". Certe estas, ke la maniĥea ambaŭvaloreco imputita al la teknologio estas trajto de la teknologio kiel tia. La kapableco krei kaj detrui enhavata en la moderna teknologio estas nur la du facoj de la socia dialektiko, la speguliĝo de la pozitiveco kaj negativeco de la hierarkia socio. Se estas iel vere aserti, kiel Marks, ke la hierarkia socio estis "historie necesa" por regi la naturon, oni pro tio ne forgesu, ke tiu nocio pri "regado super la naturo" estas mem deveninta de la regado super la homo fare de l'homo. La homo kaj la naturo ĉiam estis asociitaj kiel viktimoj de la hierarkia socio. Unu kaj la alia hodiaŭ estas minacataj de ekologia kataklismo, kaj tio pruvas, ke la produktinstrumentoj fine fariĝis tro potencaj por utili kiel regaj instrumentoj.

Hodiaŭ, fine de la disvolviĝo de la hierarkia socio, estas neeble reakordigi ties pozitivajn kaj negativajn aspektojn. Ili fariĝis du entoj, kiuj ekskluzivas unu la alian. Ĉiuj institucioj kaj valoroj de la hierarkia socio eluzis siajn funkciojn "historie necesajn". Ekzistas plu nenia socia racieco praviganta la privatan proprieton kaj la klasojn, la monogamion kaj patriarkecon, la hierarkion kaj aŭtoritaton, la burokratismon kaj ŝtaton. Tiuj institucioj kaj valoroj, samkiel la urbo, la lernejo kaj la privilegisistemo atingas sian historian finon. Male al Marks, ni povus nemulte kontraŭiĝi al Bakunin diranta, ke la institucioj kaj valoroj de la hierarkia socio ĉiam estis "malbono historie necesa". Se la verdikto de Bakunin hodiaŭ povas ŝajni morale supera al tiu de Marks, estas pro tio, ke tiuj institucioj fine perdis ĉian moralan aŭtoritaton.(2)

La revolucio venonta kaj la utopio, kiun ĝi naskos, devas esti konceptitaj kiel tutoj. Ili povus lasi neŝanĝita nenian vivaspekton antaŭe infektitan de la superregado (3). La revolucio kondukos al socio, kiu

-------

(2) El kio rezultas la reakcia aspekto de la socialisma projekto, kiu konservas la konceptojn pri hierarkio, aŭtoritato kaj ŝtato kiel integrajn partojn de la post-revolucia socio. De tio sekvas, ke ĝi konservas ankaŭ la konceptojn pri proprieto ("naciigita") kaj pri klasoj ("proletara diktaturo"). La diversaj ortodoksaj marksistoj (maŭistoj, trockiistoj, stalinistoj plus ĉiuj hibridoj, kiuj kombinas ĉi tiujn tri variojn) ideologie manipulas la pozitivecon kaj negativecon de la tuta socia evoluado - tio en la ĝusta momento, kiam ili pli ol iam aperas objektive ne repacigeblaj.

(3) El kio sekvas la signifo profunde revolucia de la movado por liberiĝo de la virinoj, kiu nudigis same la sintakson kaj la nervan sistemon de la superregado. Tion farante, la movado pridiskutis la ĉiutagan vivon mem kaj ne nur abstraktaĵojn tiajn, kiaj la "Socio", la "Klasoj", la "Proletaro". Mi ĉi tie esprimas miajn bedaŭrojn pri tio, ke mi devis uzi tiajn terminojn kiel "la homo" aŭ "la homaro", kaj la viran genron. Krom se uzi tiajn anstataŭaĵojn kiel "personojn" aŭ "individuojn", mia esprimado estus ja embarasita. Ankaŭ la lingvo estas liberigenda.

transcendos ĉiujn disigojn de la pasinteco kaj instigos ĉiun fari el sia vivo multforman eksperimenton plenan kaj totalan.

Mi difinas tiun utopion per la vorto "anarkiismo", sed mi povus same uzi la ekvivalentan esprimon "anarki-komunismo". Tiuj du terminoj signas socion senŝtatan, senklasan kaj malcentralizitan, kiu transpasas la kontraŭecojn hereditajn de la uzurpada socio, kreante novan, nefremdigitan tipon de homaj interrilatoj. La anarkiista aŭ anarki-komunista socio implicas la abolon de la privata proprieto, la disdonadon de la havaĵoj laŭ la individuaj bezonoj, la kompletan eliminadon de la komercaj rilatoj, la rotacion de la taskoj kaj decidigan redukton de la tempo dediĉita al la laboro. Tia priskribo tamen liveras al ni nur la anatomion de libera socio. Ĝi lasas flanke la fiziologion de la libereco komprenata en la senco de procezo de ĉiesigo. Ĝi lasas flanke la subjektivan dimension, kiu ligas la socian transformadon al la transformado psika.

Sendube, la anarkiistoj pli atentis la subjektivajn problemojn de la revolucio ol kiu ajn alia movado. En historia perspektivo anarkiismo aperas kiel la esprimo de iu libida puŝo de la popolo, de iu bolado de la socia nekonscio, kiu fontas, sub nenombreblaj malsamaj nomoj, el la unuaj bataloj de la homaro kontraŭ superrego kaj aŭtoritato. Ĝi estas tre malmulte ligita al doktrino. Ĝi ĉiam aktive zorgis pri la ĉiutaga vivo : vivostilo, sekseco, komunuma organizado aŭ liberiĝo de la virinoj. Ĝia centra celo ĉiam estis la sola, kiu povus igi signifa socian revolucion : rekonstrui la mondon tiel, ke la homa estaĵo fariĝu fincelo kaj la homa vivo, respektata mirindaĵo. Por la plimulto de la ekstrem-maldekstraj ideologioj tio ĉi estis nur marĝena celo. Tiuj ideologioj plej ofte pli akcentis la abstraktaĵojn ol la homojn, ĉi tiujn reduktante nur al <u>rimedoj</u> - nome de la "Popolo" kaj de la "Libereco", kompreneble.

La diferenco inter socialistoj kaj anarkiistoj manifestiĝas ne nur per diverĝantaj teorioj, sed ankaŭ per kontraŭaj tipoj de organizado kaj praktika agado. La socialistoj, ĉi tion mi jam observigis, adoptas hierarkian organizadon. Male, la organizadaj strukturoj de la anarkiistoj sin apogas sur la "afineca

grupo", kolektivo el intimaj amikoj, kiuj interesiĝas tiom pri siaj interhomaj rilatoj kiom pri siaj politikaj celoj. Pro propra formo la anarkiisma organizado transcendas la tradician kontraŭiĝon inter tio psikologia kaj tio socia. Nenio malhelpas la afinecajn grupojn laŭbezone kunordiĝi en vastaj movadoj ; estas tiel, ke la hispanaj anarkiistoj formis el tiaj unuaj kernoj federon firme sin apogantan sur miloj da membroj. Sed tiuj movadoj havas tian avantaĝon, ke la kontrolo sur la granda organizo restas inter la manoj de la afinecaj grupoj multe pli ol en la manoj de la kunordigaj organoj. Same por la agado oni petas memvolecon kaj memdisciplinon, kaj ne komandon kaj trudodevigon. En tia organizo la praktika agado estas liberiga tiel sur la individua kampo kiel sur la socia. Pro propra naturo la grupo kuraĝigas la revoluciulon revolucii sin mem.

Tiu liberiga koncepto de la praktika agado iras ankoraŭ pli malproksimen per tio, kion la anarkiistoj nomas "rekta agado". Oni kutime konsideras la rektan agadon kiel metodon por aboli la ŝtaton sen sin helpi per la institucioj kaj teknikoj ŝtataj. Tiu ĉi interpretado estas ĝusta sed ne sufiĉa. La rekta agado konsistigas fundamentan revolucian strategion, ĉar ĝi strebas iniciati la disindividuigon de la "homamasoj". Ĝi havas kiel funkcion firmigi la identecon de la apartaĵo en la sino de la ĝeneralaĵo. Ĝiaj psikologiaj efikoj estas ankoraŭ pli gravaj ol ĝiaj politikaj rezultoj, ĉar per la rekta agado la homoj ekkonscias pri si mem kiel pri individuoj povantaj orienti sian propran destinon. (4)

Fine, la agado anarkiista same akcentas la spontan-

---

(4) Ni aldonu ĉi tie, ke la slogano "La povo al la popolo" povas esti praktikata, nur kiam la povo tia, kiel la elitoj ĝin praktikas, troviĝas dissolvita en la popolo. Ĉiu individuo tiam povas estri sian ĉiutagan vivon. Se "La povo al la popolo" signifas nenion alian ol "La povo al la kondukantoj de la popolo", nu, la popolo restas nediferencigita maso manipulebla kaj same senigita je povo post la revolucio kiel antaŭe. Se ĝisfunde analizi, la popolo ne povus posedi la regpovon antaŭ ol malaperi kiel "popolo".

econ ; t.e., ĝi estas konceptita kiel procezo interna sed ne ekstera kaj manipulita. Kion ajn diras ĝiaj kontraŭuloj, tia koncepto neniel fetiĉigas la "impulson", kia ajn ĝi estas. Kiel la vivo mem, la spontaneco povas manifestiĝi ĉe malsamaj niveloj : ĝi povas esti pli-malpli penetrita de sciado, de subtileco kaj spertado ; ĉi tiuj malsame efikos sur trijaran kaj sur tridekjaran individuon... Ili ankaŭ ne same influos iun afinecan grupon kaj alian.

Sed la spontaneco ne estas pli organizada "tekniko", ol la rekta agado estas taktiko. La kredo je la spontana agado estas ero de pli larĝa kredo je spontana disvolviĝo. Ĉiu aparta disvolviĝo devas esti libera trovi sian propran ekvilibron. Spontaneco estas la malo de ĥaoso ; liberigante la internajn fortojn, ĝi ebligas malkovri ties aŭtentan principon de ordo kaj stabileco. Mi aliloke klarigas kiel konverĝas la spontaneco de la socia vivo kaj la spontaneco de la naturo por krei la bazojn de ekologia socio. La ekologiaj principoj, kiuj certigis la funkciadon de la organaj socioj, retroviĝas en la sociaj principoj, kiuj difinas la utopion. Sed hodiaŭ tiuj principoj estas la emano de la materialaj kaj kulturaj progresoj de la historio. La natura ekologio fariĝas ekologio socia. La utopio ne pli rekondukas la homon al la antikva senperanteco de la kontakto kun la naturo, ol la anarki-komunismo lin rekondukas al la primitiva komunismo. En la estonteco samkiel nun la homaj rilatoj kun la naturo ĉiam estiĝos pere de la scienco, tekniko kaj sciado. Sed ĉu la scienco, tekniko kaj sciado plivalorigos la naturon ? Tio ĉi dependas de la homa kapableco plibonigi la socian sistemon. Aŭ la revolucio kondukos al ekologia socio kun ties eko-komunumoj kaj eko-teknologio, aŭ la homaro kaj la natura mondo, kiujn ni hodiaŭ konas, pereos.

En ĉia revolucia epoko produktiĝas konverĝo inter ŝajne apartaj procezoj, kiuj kununuiĝas por naski eksplodan socian krizon. Se la revolucia epoko, kiun ni travivas, ofte ŝajnas al ni pli kompleksa ol la antaŭaj, estas pro tio, ke la procezoj nun konverĝantaj havas karakteron pli universalan ol en la pasinteco. Ĉe la deirpunkto, kie ni troviĝas, ni povas baz-

iĝi sur neniu historia precedento trankviliga. En la antaŭaj revoluciaj epokoj, restis fiksaj almenaŭ la fundamentaj instituciaj kategorioj : la familio, la religio, la proprieto, la laboro kaj la ŝtato estis nature akceptitaj, nur iliaj formoj estis pridiskutitaj. (5) La hierarkia socio ankoraŭ ne estis irinta ĝis la ekstremo de ĉi tiuj kategorioj.Restis kompletigota la evoluo direkte al masiva kaj integrita sistemo de sociaj rilatoj.

Sed hodiaŭ tiu evoluo atingis saturpunkton. La hierarkia socio povas pretendi pri nenia estonteco, kaj por ni jen estas la alternativo : utopio aŭ finiĝo de la socio. Ni estas en la sama tempo tiel ŝarĝitaj per la restaĵoj de la pasinteco kaj gravedaj je tiom da ebloj por la estonteco, ke nia sento de strangeco rilate la mondon transformiĝas en angoron. La pasinteco kaj la estonteco superpresiĝas laŭ la maniero de latentaj bildoj en duobla eksponado. La familiaraĵo ja estas tie sed, kiel en la psikedelikaj*) dekorafiŝoj, kies skribaĵo aspektas kvazaŭ homaj distorditaj membroj, ĝi trompe miksiĝas kun la strangaĵo. Ĉe la plej eta delokiĝo la ŝajna senco de la realo inversiĝas. Lernado de la vera vivo prezentiĝas al ni kiel la sola maniero de pluvivado, ludo kiel la sola maniero de laboro, individueco kiel la sola maniero de socialeco, abolo de la roldispartigo inter la seksoj kiel la sola maniero de sekseco, la tribo kiel la sola formo de familio, la sensamo kiel la sola racieco. Tiu intermikseco de la malnova kaj de la nova, ĝiaj neverŝajnaj renversoj, ne apartenas al la banala "duobla ludo" de la establita ordo ; ili estas objektiva fakto esprimanta la egajn sociajn transformojn, kiuj prepariĝas.

Krome, en ĉia revolucia epoko, tiu kunfandiĝo, kiun ĝi determinas inter procezoj laŭŝajne izolitaj, elektas, por aperigi la krizon en ties maksimuma akreco, privilegian punkton en la tempo kaj spaco. En la XVII-a

-------

(5) La rusa Revolucio ŝanĝis nenion en tiu situacio, ankaŭ ne la "socialismaj" revolucioj, kiuj okazis poste. La instituciaj kategorioj ne malaperis ; ili ŝanĝis nur sian nomon.

*) psikedelika : kiu aperigas la psikon - kiu elvokas la viziojn de la psiko.

jarcento tiu centro estis Anglio ; en la XVIII-a kaj XIX-a jarcentoj, Francio ; komence de la XX-a, Rusio. La centro de la socia krizo fine de la XX-a jarcento estas Usono - industria koloso, kiu liveras pli ol la duonon de la tutmonda produktado, kun apenaŭ pli ol kvin procentoj de la terloĝantaro. Tie staras la Romo de la tutmonda kapitalismo, la volba ŝlosilŝtono de ties imperia arko, ties laborejo kaj butiko, la ĉefsidejo de ties financa magio, la templo de ties kulturo, kaj ties arsenalo. Tie sidas ankaŭ la centro de la tutmonda kontraŭ-revolucio - kaj la centro de la socia revolucio, kiu povas balai la hierarkian socion kiel historian sistemon ampleksantan la tutan mondon.

Ignori la strategian pozicion same historie kiel geografie okupitan de Usono estus montri nekredeblan blindecon. Ne konsideri ĉiujn implikojn de tiu strategia pozicio kaj ne agi konsekvence, estus krima malatento. La riskoj estas tro gravaj, por ke oni toleru obskurantismon. Usono, oni tion substreku, havas la socion plej evoluintan en la mondo. Usono pli ol ĉia alia lando estas graveda je la socia krizo plej grava en la mondo. Ne estas unu sola el la problemoj, kiujn levas la abolo de la hierarkia socio kaj la konstruo de utopio, kiu ne stariĝas tie en maniero pli akuta ol aliloke. Tie, oni trovas la rimedojn, kiuj ebligos forviŝi kaj transcendi tion, kion Marks nomis la "prahistorio" de la homaro. Ankaŭ tie, la kontraŭecoj generas la plej avangardajn formojn de revolucia batalo. La ruiniĝo de la usona institucia sistemo ne rezultas el mi ne scias kiun "perdon de vitaleco", nek el ĝiaj imperiismaj misaventuroj en la tria-mondo, sed ĉefe el la super-matureco de ĝia teknologia kapablo. Samkiel matura frukto la strukturo minacas fali ĉe la unua skuo. Tiu skuo povas deveni de la tria-mondo, de pleja ekonomia krizo aŭ eĉ de antaŭtempa politika subpremado, sed la falo estas nepra.

Tia ampleksa krizo ebligas fingrotuŝi la fundamentajn problemojn de la hierarkia socio en ĉiuj vivoaspektoj, individuaj aŭ sociaj, ekologiaj aŭ politikaj, materialaj aŭ moralaj. Ĉia peraga kritiko subfosas la konstruon de la nacio kaj de la imperio. Forteni la esprimon de malkontenteco nome de sektaj

argumentoj pruntitaj al epokoj el sociaj konfliktoj tute malsamaj, tio estas pura kaj nura blindeco. En sia ekstrema logiko la batalo por liberigo de la Nigruloj estas la batalo kontraŭ imperiismo, same la batalo por ekologia ekvilibro estas la batalo kontraŭ la porkomerca produktado, ankoraŭ same la batalo por liberiĝo de la virinoj estas la batalo por la homa libereco.

Certe estas, ke granda parto de tiu malkontenteco povas esti moderigita per la establitaj institucioj, almenaŭ por ioma tempo. Sed nur por ioma tempo. La socia krizo estas tro profunde ankrita en la tutmonda historio, por ke la establitaj institucioj povu ĝin reteni. Se la sistemo ne sukcesis asimili la nigrulan movadon, la hipiojn kaj la boladon de la sesdekaj jaroj, tio ne estas pro manko de rimedoj nek de institucia fleksebleco. Spite la Kasandra-jn de la usona "maldekstro" tiuj movadoj ĝenerale forĵetis, kion la institucioj al ili povis oferi. Pli ekzakte iliaj depostuloj kreskis ĉiufoje, kiam unu el tiuj estis kontentigita. Samtempe tiuj movadoj ampleksiĝis. Radiante ekde kelkaj izolitaj urbaj centroj, la radikala spirito de la Nigruloj, hipioj kaj studentoj disvastiĝis tra la lando kaj penetris same en la liceojn kiel en la universitatojn, en la ĉirkaŭurbojn kiel en la gettojn, en la kamparojn kiel en la urbojn.

Kontesti la valoron de tiuj movadoj pretekste, ke ties partoprenantoj ofte estas junaj Blankuloj el la mezklasoj, tio estas sofismi. Eble ne ekzistas pli bona atesto pri la malstabileco de la burĝa socio, ol la nombro de la revoluciaj aktivuloj, kiuj devenas de la relative prosperaj tavoloj. Oni tro volonte forgesas, ke en la kvindekaj jaroj regis alia speco de Kasandra, la "Orwela* generacio", kiu denuncis la fabrikadon, fare de la burokratisma sistemo, de usona junularo kun senmanka konformismo rilate la establitan regpovon. Se kredi la antaŭdirojn de tiu epoko, la burokratisma socio trovus sian ĉefan subtenon ĉe la junaj generacioj. La maljuniĝanta generacio de la

-------

*) de Orwel, angla verkisto, aŭtoro de "1984", kiu elvokas kun forto kaj sentemeco la malhomecigon, kiu minacas nian mondon fascinitan de la totalismaj teknikoj.

tridekaj jaroj, pretendis oni, estus la lasta tenanto de la revoluciaj kaj humanismaj valoroj. Okazis ekzakte la inverso. La generacio de la tridekaj jaroj montriĝis kiel unu el la sektoroj plej obstinege reakciaj de la socio, dum la junuloj de la sesdekaj jaroj fariĝis la sektoro plej revolucia.

En tiu ŝajna paradokso, la kontraŭeco inter la mankotempo kaj la ebla transpaso trans la mankotempo eksplodas en aperta konfrontado. Generacio, kies mensostato estis tute modlita de la manko - de la deprimo kaj nesekureco de la tridekaj jaroj - kontraŭiĝas al alia generacio, kies psiko estas influata de la kapablo de postmankotempa socio. La vera privilegio de la junaj mezklasaj Blankuloj estas mem forĵeti sian falsan "privilegion". Kontraŭe al siaj gepatroj obsedataj de la deprimo, la junuloj liberiĝis de la malsaneca konsumadismo, kiu mildigas sed neniam kontentigas. Inter la generacioj la fosaĵo estas tre reala. Ĝi manifestas objektivan fosaĵon, kiu pli kaj pli disigas la hodiaŭan Usonon disde sia propra historio, disde pasinteco, kiu fariĝas arkaika. Certe restas tiun enterigi, sed generacio aperis, kiu ja povus esti tiu de la tombofosistoj.

Riproĉi al tiu generacio ties "burĝajn originojn", tio estas konduti samkiel tiuj kretenoj, kiuj ne konscias, ke iliaj plej seriozaj diroj levas nur ridojn. Kiu ajn vivas en burĝa socio havas "burĝajn originojn", ĉu li estas laboristo aŭ studento, junulo aŭ maljunulo, Nigrulo aŭ Blankulo. En kia mezuro oni fariĝas burĝo, ĝi ekskluzive dependas de tio, kion oni akceptas de la burĝa socio. Ekde kiam la junuloj forĵetas la konsumadon, la labormoralon, la hierarkion kaj aŭtoritaton, ili estas pli "proletaj" ol la proletaro - kaj semantika absurdaĵo devus kuraĝigi nin enterigi la sekigitajn restaĵojn de la socialisma ideologio samtempe kiel la arkaikan pasintecon, kies emano ĝi estas.

Se tamen tia absurdaĵo ankoraŭ nun kaptas la atenton, tio estas pro la debileco de la revolucia projekto en Usono. La usonaj revoluciuloj ne ĉiam trovis, rilate la problemojn de Usono, la adekvatan solvoproponon. La problemoj de la "unua mondo" ne estas tiuj de la tria-mondo ; kaj oni ne povus rilatigi unujn kun la aliaj per reveno al ideologioj, kiuj ankoraŭ havas zorgojn el la XIX-a jarcento. Laŭmezure kiel la nordamerikaj revoluciuloj pruntas siajn skemojn kaj sloganojn rekte de

Azio kaj Latinameriko, ili ege malutilas al la tria-mondo. Kion bezonas la tria-mondo, tio estas revolucio en Usono kaj ne izolitaj sektoj nekapablaj modifi la iradon de la aferoj. Iniciati tian revolucion estus la efika manifestado de internaciismo kaj de solidareco kun la subpremataj popoloj de la cetera mondo ; kaj tio implicus teorian kaj praktikan klopodadon, kiu alfrontus la specifajn problemojn de Usono. Usona revoluciulo ne povas ne esti internaciisto pro la pozicio okupita de Usono en la mondo ; tial, mi sentas nenian bezonon senkulpigi min pro la intereso, kiun mi montras por tiu lando.

Se mi dediĉas la esencon de miaj analizoj al kio estas nova en la nuntempa evoluado socia, tio absolute ne estas tial, ke mi ignoras tion, kio estas malnova. La ekspluatado, rasismo, malriĉeco, klasbatalo kaj imperiismo plu malbonfaras ĉirkaŭ ni, kaj ilia influo sur la socion estas multrilate eĉ pli forta ol iam. Tiaj demandoj evidente ne malaperos el la revoluciaj teorio kaj praktiko antaŭ ol esti definitive solvitaj. Mi tamen ne taksas min kapabla alporti multon novan al la analizo de tiuj problemoj, kiujn tiom da aliaj jam funde traktis. Mi kompense insistas pri la problemo de utopio tial, ke oni ĝis nun preskaŭ ne ekzamenis nian epokon konsiderante ties eblecojn. Se ni ne strebas al pli profunda esploro de ĉi tiuj, la tradiciajn problemojn mem ni alpaŝos per erara maniero, tradicia, ĝuste. Nia perceptado de la familiaraĵo troviĝos pro tio falsita. Eĉ se la problemoj pri fremdiĝo ne eliminas tiujn de ekspluatado, la evoluo de ĉi-lastaj estas profunde kondiĉita de la evoluo de la unuaj.

Ni klarigu tiun punkton per ekzemplo. La tradicia laborista movado neniam reaperos. Spite kelkajn ribeloj de la bazo, la depostuloj pri salajro estas ĝenerale tro bone baritaj de la burĝa sindikatismo por utili kiel bazo al renovigo de la malnovaj socialismaj formojde laboristaj asocioj. Ja povas esti, ke la laboristoj starigos radikalajn organizojn por elŝiri per la batalo kvalitajn transformojn de sia ekzistado kaj laboro - kaj finfine la laboristan administradon de la produktado. Sed ili starigos tiun tipon de organizoj nur kiam ili perceptos la saman streĉadon inter la realo kaj la eblo, kian tiom da junuloj hodiaŭ sentas.

Mi kredas, ke ili devos multrilate ŝanĝi la valorojn, ne nur koncerne la uzinon, sed ankaŭ la ĉiutagan vivon. Nur kiam la vivoproblemoj superos la uzinoproblemojn, ĉi-lastaj fandiĝos en la unuaj. Tiuokaze, la ekonomia striko eble fariĝos iam socia striko por konduki al masiva sturmo kontraŭ la burĝa socio.

La junuloj de la laboristaj medioj estas sentivigitaj de la moroj kaj valoroj de la mezklasaj junuloj, kaj tio estas unu el la signoj plej promesoplenaj pri la kapablo de la uzinanaro akcepti la revoluciajn ideojn. Tuj kiam ĝi ie ekradikiĝis, la kultura progreso samkiel la teknika progreso nerezisteble disvastiĝas, precipe inter la homoj, kies menso ne malmoliĝis pro aĝo aŭ kondiĉado. La junulara kulturo, tiu libereco de la sensoj kaj de la spirito, havas denaskan allogopovon. Ĝia diskonigo en la lernejoj duagradaj kaj eĉ unuagradaj estas unu el la sociaj fenomenoj plej renversemaj de la nuntempa mondo.

° °
°

# SPONTANECO KAJ ORGANIZADO

Teksto aperinta en 1972 en la revuo "Anarchos", n°4.

# I

La socialisma movado - ho ironio! - anstataŭ stari avangarde de la transformoj en nia socio kaj nia civilizacio, estas laŭ preskaŭ ĉiuj vidpunktoj, de ili remorkata. Ĝia nekompreno rilate la kontraŭ-kulturon, ĝia mizera interpretado de la virinliberiĝo, ĝia indiferenteco pri ekologio kaj ĝia ignoro de la tendencoj eĉ novaj, kiuj ŝprucas en la uzinoj (precipe inter la junaj laboristoj) fariĝas nepre karikaturaj, kiam oni konsideras la simpligismon de ĝia "klasanalizo", ĝian guston por la hierarkia organizado kaj ĝiajn ritajn helpopetojn al "strategioj" kaj "taktikoj", kiuj jam montriĝis neadaptitaj tridek jarojn antaŭe.

La nuntempa socialisma fluo apenaŭ ekrimarkis, ke milionope la homoj iom post iom formulas novan difinon de la vorto libereco. La aŭdaco, kun kiu oni tiel forŝovis la limojn de la konkreta prezento pri liberiĝo, estus en la antaŭaj epokoj aspektinta kiel rezulto de la plej senesperiga utopiismo. Pli kaj pli multnombraj homoj ekkonscias, ke la socio disvolvis teknologion, kiu ebligus plene aboli la materialan mankon kaj senlime redukti la laborŝarĝon. Antaŭ la ebleco de senklasa socio liberigita de la manko, antaŭ la absurdeco de la hierarkiaj rilatoj, ili iom post iom metas antaŭ si la problemon pri komunismo kaj ne tiun pri socialismo.(1) Instinkte ili strebas

-------

(1) "Komunismo" signas senŝtatan socion fonditan sur la maksimo "de ĉiu laŭ liaj kapabloj, al ĉiu laŭ liaj bezonoj". La socio estas rekte regata "de malsupre" kaj la produktrimedoj estas kolektiva posedaĵo. Tiu formo de socio estas la komuna celo de la marksistoj kaj de la anarkiistoj (almenaŭ la anarkikomunistoj). Ili esence diverĝas pri la karaktero kaj la rolo de la organizita revolucia movado dum la revolucio kaj pri la interaj "etapoj" necesaj al la realigo de la komunisma socio. La anarkiistoj energie kontraŭiĝas al tiu ĉi koncepto, kaj pri tio mi same opinias.

al eliminado de la superrego, kia ajn estas ties koloro aŭ formo, kaj ne nur de la materiala ekspluatado. El kio rezultas ĝenerala erodo de la aŭtoritato kiel tia - en la familio, la lernejo, eklezio, armeo, en la profesioj same manaj kiel intelektaj, fakte en ĉiuj institucioj, kiuj allasas hierarkian povon, en ĉia eĉ plej simpla rilato stampita de superrego. El kio rezultas ankaŭ la profunde persona karaktero de la tra la socio disvastiĝanta ribelo, ties karaktero intense subjektiva, ekzistada, kultura. Tiu ribelo tuŝas la ĉiutagan vivon antaŭ ol evidente tuŝi la pli ĝeneralajn aspektojn de la socia vivo ; ĝi subfosas la konkretan vasalecon, kiu ligas la individuon al la sistemo, antaŭ ol ataki la abstraktajn principojn de la sistemo en la politika kaj morala sfero.

II

Ni finis kompletan historian ciklon. Ni refoje stariĝas antaŭ la problemoj de organa socio sed de nova tipo, difinita per teknologia kaj pli ĝenerale historia, nova nivelo : organa socio, kiu povus forviŝi kaj transpasi la internajn apartigojn de la socio samkiel tiujn, kiuj kontraŭigas ĉi-lastan al la naturo aŭ tiujn, kiuj frakcias la homan psikon kaj kiuj rezultas el jarmiloj da hierarkia sistemo. La hierarkia socio sukcesis en la pereiga "miraklo" transformi la homajn estaĵojn al nuraj produktinstrumentoj malaltigitaj kiel objektoj ĝis la nivelo de laboriloj kaj maŝinoj, tiel konsiderante ilian homecon laŭ la fruktuzo, kiun ili povas liveri en sistemo de ĝenerala manko, de superrego kaj, koncerne la kapitalismon, de merkantilisma interŝanĝo. Eĉ antaŭ ol stariĝis la regado de la homo super la homo, la hierarkia socio jam sukcesis subigi la virinon al la viro, tiel inaŭgurante la eraon de la superrego iasence superanta la ekspluatadon, la eraon de la superrego por ĉi-lasta mem, la superrego sub formo plej rigida. La superrego enŝoviĝinta en la plej forajn profundojn de la personeco, faris el ni ricevantojn de heredaĵo plurjarmile malnova, kiu fasonas nian lingvon, niajn gestojn, niajn sintenojn plej kutimajn. Ĉiuj revo-

lucioj de la pasinteco restis tro "olimpiaj" por tuŝi vivaspektojn tiel intimajn, tiel trivialajn ; per tio klariĝas la ideologia karaktero de iliaj laŭdire liberigaj celoj, la malvasteco de ilia libereco-vizio.

La nova movado, kiu disvolviĝas direkte al komunismo, donas al si kiel celon la konstruon de socio fondita sur la memadministrado, en kiu ĉiu individuo plene, rekte kaj sur perfekte egaleca bazo senpere partoprenas en la administrado de la kolektivo. Se oni ĝin konsideras laŭ la vidpunkto de ĝiaj konkretaj homaj aspektoj, tia kolektivo ne povus esti io alia ol la plenumado de la liberigita memo, de la libera subjekto malimplikita je ĉio, kio faris el li objekton, de tiu memo konkrete kapabla fari el la mastrumado de la kolektivo aŭtentan mem-mastrumadon. La konsiderinda progreso, kiun prezentas la kontraŭ-kultura movado kompare kun la socialisma movado, ĝuste aperas en valorigo de la persono ; ĉi tiu valorigo igas la personon denunci la nepersonajn celojn kaj eĉ la konvenregulojn de lingvo, gestoj, kondutado kaj vestado, kiel pluiĝon de la superrego enŝoviĝinta en la nekonscion. Eĉ tiom falsita de la ĝenerala etoso de ne-libereco, en kiu ĝi baniĝas, la kontraŭ-kultura movado ja konkrete redifinis per maniero aŭtente revolucia la vorton fariĝintan tiel sendanĝeran : "revolucio" ; ĝi redifinis ĉi-lastan kiel praktikon, kiu renversas ĉiujn abstraktaĵojn kaj dubindajn teoriojn.

Kvalifiki "burĝa individuismo" la depostulojn de la ekaperanta memo estas kruda ignorado de la plej fundamentaj ekzistadaj aspiroj al liberiĝo. La kapitalismo ne produktas individuojn, sed egoistajn atomojn. Tiel ignori la depostulojn de memmastrumada socio kaj redukti al ekonomia vizio de la "libereco" la aspirojn de la revolucia subjekto, rekte kondukas al tiu "kruda komunismo", kiun la juna Marks tiel juste kondamnis en la Manuskriptoj de 44. La komunist-libereca celo de la memmastrumada socio kreas la rajton de ĉiu individuo akiri la plenan regadon de sia ĉiutaga vivo kaj tiom, kiom li povas, fari el ĉiu tago ion ĝojan kaj mirindan. Forpuŝante tian celon nome de la abstraktaj interesoj de la "Socio", de la "Historio", de la "Proletaro", kaj per maniero eĉ pli evidenta, nome de la "Partio", oni akceptas kaj akcentas la burĝan antitezon inter la

individuo kaj la kolektivo, kaj tio profite por la burokrata manipulado, por la dezirrezigno kaj por la subigo same de la individuo kiel de la kolektivo al la interesoj de la ŝtato.

## III

Ne povus ekzisti memmastrumada socio sen aŭtonoma aktiveco. Fakte la revolucio estas la aŭtonoma aktiveco sub ties formo plej alta : la rekta agado plutenata ĝis tiam, kiam la aŭtonoma popolo ekposedas la stratojn, la grundon kaj la uzinojn. Tiom longe dum ne estas atingita tia konsciordo, almenaŭ sur la sociala tereno, la konscio restas konscio de popolamaso, objekto de manipulado por la elitoj. Eĉ nur pro tio, la aŭtentaj revoluciuloj devas aserti, ke la plej alta formo de klaskonscio estas la memkonscio, la konscio pri la disindividuigo de la "amasoj" en konsciajn estaĵojn kapablajn rekte kaj senpere kontroli la socion kaj siajn proprajn vivojn. Same, eĉ nur pro tio, la aŭtentaj revoluciuloj devas aserti, ke la sole vera "regpovokapto" fare de la "amasoj" estas la disdetruo de la regpovo : t.e. de la povo de l'homo super la homo, de la urbo super la kamparo, de la ŝtato super la komunumo kaj de la spirito super la sentemeco.

## IV

Ni analizu la rilatojn inter spontaneco kaj organizado en tiu perspektivo de socio fondita sur memmastrumado iniciatita de la aŭtonoma aktiveco kaj subtenata de la memkonscio. Ĉiufoje kiam oni asertas, ke la "amasoj" bezonas la "direktadon" de avangardo, oni implice esprimas la konvinkon, ke la revolucio estas pli "strategia" kaj "taktika" problemo ol socia procezo (2), ke la "amasoj" estas ne-

-------

(2) La uzado de militista aŭ kvazaŭ militista vortprovizo - "avangardo", "strategio", "taktiko", ktp... estas rivelanta. Dum la studentoj ili kvalifikas "etburĝoj" kaj "flavbekuloj", la "profesiaj revoluciuloj" ĉiam hontinde admiris la plej malhumanan el ĉiuj hierarkiaj institucioj, la armeon. Male, la kontraŭ-kulturo manifestas profundan antipation por la soldataj aspektoj kaj "militistaj virtoj".

kapablaj krei mem liberigajn instituciojn, sed ke ili devas fidi iun ŝtatan povon - la "diktaturon de l'proletaro" - por organizi la socion kaj venkobati la kontraŭ-revolucion. Ĉiujn tiujn asertojn dementas la historio, eĉ la historio de la partaj revolucioj, kiuj nur anstataŭis unu regnan klason per alia. Oni konsideru la francan Revolucion, la insurekciojn de 1848, la Parizan Komunon, la rusajn revoluciojn de 1905 kaj de februaro 1917, la germanan revolucion de 1918, la hispanajn revoluciojn de 1934 kaj 1936, aŭ la hungaran revolucion de 1956 ; oni observas socian movadon iafoje ekstreme vastan, kiu kulminas en la renverso de la ekzistantaj institucioj, sen ke "avangarda" partio rolas kiel gvidanto (fakte, kiam tia partio ekzistas, ĝi ĝenerale restas remorke de la eventoj). Oni observas la kreadon fare de la amasoj de ties propraj liberigaj institucioj, ĉu en la parizaj sekcioj de 1793-94, la kluboj kaj la milicioj de 1848 kaj 1871, ĉu en la fabrikkomitatoj, la laboristaj konsilioj, la popolaj asembleoj aŭ la agadkomitatoj de la postaj ribeloj.

Pretendi, ke la kontraŭ-revolucio povis resupriĝi - kiam ĝi tion faris - pro la nura kaŭzo, ke la "amasoj" ne kapablis kunordigi sian agadon kaj ke mankis al ili la direktado de centraliza kaj disciplina partio, tio estus kruda simpligo de la eventoj. Ni en tio tuŝas unu el la problemoj plej diskutitaj, problemon starigitan de la revolucia procezo, problemon, kiun la socialisma movado neniam perceptis per ĝusta maniero. Se la kunordigado mankis aŭ fiaskis, eĉ se la kontraŭ-revolucio estis ebla, tio ĉi levas problemon pli fundamentan ol tiun de la "regada tekniko". Kiam la radikalaj revolucioj fiaskas, tio estas esence tial, ke ili ne disponis pri la materiala bazo, kiu ebligus al ili determini la ĝeneralan intereson de la socio, kies plej konsciaj elementoj jam antaŭpreparis tiun materialan bazon. La signalvorto de la ĝenerala intereso estu "Libereco, egaleco, frateco" aŭ "Vivo, libereco kaj strebo al feliĉo", la nuda realo estas sama, nome la foresto de teknologia substrukturo, kiu en harmonia socio ebligus materialigi tiun ĝeneralan intereson. Se dum la irado de la revolucia procezo tiu ĝenerala intereso denove disrompiĝus en privatajn kaj antagonismajn interesojn, transpasante de la

eŭforia "repaciĝo" - pri kiu atestas la grandaj naciaj festoj sekvintaj la falon de Bastilo, - al la inkubsonĝo de la klasbatalo, de la teruro kaj kontraŭ-revolucio, - tio klariĝus esence per la materialaj limoj de la socia disvolviĝo, ne per la teknika problemo de la politika kunordigo.

La grandaj burĝaj revolucioj estis sociale venkaj, eĉ kiam ili ŝajnis "teknike" malvenkaj (t.e. kiam ili devis lasi la povon al la ekstremistoj, al la "viziaj teroristoj"), tial, ke ili estis plene adekvataj al sia epoko. Nek la armeoj, nek la institucioj de la absolutisma socio povis elteni iliajn sturmojn. Almenaŭ en siaj komencoj tiuj revolucioj aspektis kiel la esprimo de la "ĝenerala volo" kaj sukcesis unuigi preskaŭ ĉiujn sociajn klasojn kontraŭ la aristokratio kaj absolutismo. Male, ĉiuj "proletaraj revolucioj" fiaskis tial, ke la ekzistantaj teknologiaj premisoj ne ebligis la materialan firmiĝon de la "ĝenerala volo", ĉar en tio kuŝas la nura bazo, sur kiu la regato povas neinversigeble forigi la regadon. Tiele, la Oktobra Revolucio sociale fiaskis kvankam ĝi ŝajnis "teknike" sukcesi - kaj tio spite la en kontraŭa senco fabelojn de la leninistoj, trockiistoj kaj stalinistoj - kaj same estis kun la "socialismaj revolucioj" en Azio kaj Latinameriko. Kiam la "proletara revolucio" estos adekvata al sia epoko - kaj ĝuste ĉar ĝi estos tia - la revolucio ne plu estos "proletara", ne plu estos la faro de aparta kategorio de kreitaĵoj de la burĝa socio, de la labormoralo, de la uzindisciplino, de la industria hierarkio kaj de ties valoroj. La revolucio estos revolucio de l'popolo (3) laŭ la aŭtenta signifo de ĉi tiu vorto.

-------

(3) kaj ne en la mistifika senco, kiun donis al ĝi la Jakobenoj de la franca Revolucio aŭ pli freŝdate la stalinistoj kaj maŭistoj, kaj per kiu estis kaŝitaj la antagonismaj klasinteresoj ekzistantaj en la sino de la revolucia movado. En la cirkonstancaro, pri kiu ni parolas, tiu vorto spegulos la ĝeneralan intereson tia, kia ĝi povas esti subtenata de aŭtente homa movado esprimanta la materialajn eblecojn realigi senklasan socion.

V

Ne pro manko de organizado la radikalaj elementoj de la pasintaj revolucioj finfine ĉiam fiaskis ; sed tial, ke ĉiuj antaŭaj socioj estis nur la organizado de la manko. En nia epoko, kiu estas tiu de la fina ĝenerala revolucio, la teknologio, kiu transpasis la mankoeraon, ebligas tuj determini la ĝeneralan intereson sur la firmaj bazoj de la materiala abundo por ĉiuj kaj de la forigo de l'laboro kiel fatalo esence propra al la homa kondiĉo. Dank'al tiu senprecedenca efikilo el materiala abundo, la revolucio kapablas elimini la fundamentan premison de la kontraŭ-revolucio : la mankon, nutraĵon de la privilegioj kaj pravigon de la superrego. La perspektivo de komunisma revolucio havas plu nenian kaŭzon "tremigi" iun ajn socian tavolon kaj konvenas igi ĉi tion perfekte klara por ĉiuj eĉ por la malplej inklinaj al aŭskulto. (4)

-------

(4) Oni ne povus kun sufiĉa energio denunci la egan sensencaĵon, kiu konsistis, fare de la usona "maldekstro" fine de la sesdekaj jaroj, en la ekuzo de frenezula "polariza politiko" kaj en arbitra humiligo de tiom da elementoj de la mezklaso - kaj eĉ, ni kuraĝu ĝin diri, de tiom da burĝoj - kiuj estis pretaj aŭskulti kaj sin instrui. Blinda pri tiu escepta konstelacio el eblecoj, kiu glimis sub ĝiaj okuloj, la "maldekstro" intencis nur plifaciligi sian malpuran konsciencon kaj sian mankon de memfido, tiel direktante kontraŭ si ĉiujn fortojn vere kapablajn radikaligi la usonan socion. Tiu sensenca politiko rilate la "trian mondon", politiko kombinita kun stulta mimetismo, kun malnobliga frazeologio (la policanoj nomitaj "porkoj", la oponantoj nomitaj "faŝistoj") kaj kun tre malhumana valorsistemo, dementas ĉiujn siajn pretendojn esti "liberiga movado". Estas tamen rimarkinde, ke la disfalo de SDS, la movado de la radikalaj studentoj, ne naskis marksism-leninisman partion kun kelka amplekso, sed ja diseriĝon de la "Movado" kaj solenan reaserton pri la humanismaj valoroj de la komenco de la sesdekaj jaroj, kiujn la maldekstro antaŭe tiel fortege denuncis ĉe la fino de tiu sama jardeko - evoluo, kiu atestas pri la fekundeco de la kontraŭ-kulturo.

Kiam venos la momento, la kadro difinita per tiuj kondiĉoj kvalite novaj rezultigos radikalan simpligon de la "socia demando" heredigita de la historio. Kiel ĝin substrekis Josef Weber en "The Great Utopia" (La Granda Utopio), tiu revolucio en sia universaleco kaj sia tuteco prezentiĝos kiel "la venonta praktika etapo", la agado tuj implicita en la socia rekonstruo. Fakte, paŝon post paŝo la kontraŭ-kulturo ektraktis subjektive sed ankaŭ kaj precipe konkrete kaj praktike amason da demandoj, kiuj rekte pezas sur la utopia homara estonteco kaj kiujn la antaŭa generacio povis starigi nur (se ĝi tion ĉi faris) kiel problemojn plej esoterajn de la teorio. La amplekso de la leviĝintaj demandoj kaj la vertiĝa rapideco, per kiu ili stariĝis, estas absolute senprecedencaj en la historio. Ni citu la plej elstarajn : aŭtonomecon de la memo kaj rajton pri memplenumado ; peton pri amo, sensamo kaj senĝena korpa esprimo ; spontanan esprimon de la sentoj ; malfremdiĝon de la interindividuaj rilatoj ; formadon de komunumoj ; ĉies rajton pri ĉiuj ekzistorimedoj ; forpuŝon de la varmondo, artifiko kaj karieroj, kiujn tiu proponas; praktikon de la interhelpo ; akiron de teknikoj kaj ellaboradon de kontraŭ-teknikoj ; novan respekton al la vivo kaj al la naturekvilibro ; anstataŭ la laboro kiel devo, la laboron kiel signifon ; depostulon pri la ĝuo - t.e. fakte praktikan redifinon de la libereco, kies teorion iu Fourier, iu Marks aŭ iu Bakunin nur malofte esploris.

Substrekinda fakto : ni ĉeestas novan eraon de la Lumoj (ankoraŭ pli ampleksan ol tiun de la kvindek jaroj antaŭintaj la francan Revolucion), kiu pridiskutas ne nur la instituciojn kaj la establitajn valorojn, sed ankaŭ la aŭtoritaton kiel tian. Tiu "lumiĝo", kiu atingas unu post alia ĉiujn sociajn tavolojn ekde la intelektularo kaj tra la mezklasoj kaj la junularo, malrapide diserigas la patriarkan familion, la lernejon kiel sistemon de subprema socialigo, la ŝtatan institucion kaj la uzinan hierarkion. Ĝi korodas la labormoralon, la sanktan karakteron de la proprieto kaj la komplekson de rezigno kaj kulpeco, kiuj rifuzas al ĉiu viro kaj ĉiu virino la rajton de kompleta plenumado de siaj ĝuoj kaj ka-

pabloj. De nun ne nur la kapitalismon la historio akuzas, sed ankaŭ la akumulitan heredon de tiu superrego, kiu dum miljaroj de interne subigis la individuon, ankaŭ la "arketipojn" de la superrego en la plej-profundo de nia nekonscio, kaj aparte la ŝtaton.

La ega malfacilo, kiun levas la kompreno de tiu "lumiĝo", estas, ke tiu fenomeno estas nekaptebla per la klasikaj analizoj. Ĝi ne estas simpla evoluo de la konscio, evoluo ofte supraĵa en foresto de aliaj transformoj. La transformoj de la konscio, kiuj stampis la antaŭajn periodojn de radikaliĝo, ĝenerale havis la karakteron iel leĝeran de teorioj, de opinioj, de intelekta saĝo, kiu facile kontentiĝis esprimi sin ekster la vivofluo. La signifo de tiu nova periodo de "lumiĝo" estas, ke ĝi falsas la nekonscian strukturon de la individuo eĉ antaŭ ol povi konscie formuliĝi kiel teorio de la socio aŭ kiel politikaj konvinkoj.

Laŭ la vidpunkto de la klasika socialisma analizo, kiu konsideras preskaŭ ekskluzive la "konscion" kaj praktike ignoras ĉian psikologian perspektivon, tiu nova erao de la Lumoj liveras sur la politika kampo nur bagatelajn rezultojn. Videblas, ke la kontraŭkulturo produktis nek revolucian partion "amasan" nek konsekvencan politikan transformon. Male, laŭ la vidpunkto de la komunisma analizo, t.e. analizo, kiu atentas pri la nekonscia heredo de la superrego, oni konstatas, ke tiu "lumiĝo" estas laŭgrade solvanta la subiĝon de la individuo al la institucioj, al la aŭtoritatoj kaj valoroj, kiuj devojigis ĉiujn liberigajn batalojn. Tiu profunda evoluo tuŝas la individuojn preskaŭ sen ties scio ; ekzemple, multnombraj laboristoj praktikas en la konkreta sfero de la ĉiutaga vivo preskaŭ sisteman sabotadon kaj malasiduismon, manifestas plenan indiferentecon pri sia laboro, rezistas al ĉiaforma aŭtoritato, konsumas drogojn kaj adoptas la propraĵojn de la marĝenuloj, dum en la abstrakta sfero de la politiko kaj socifilozofio ili aplaŭdas kredokonfesojn plej konvenciajn de la sistemo. Oni povas kompreni la karakteron eksplodan, subitan, neantaŭvideblan de la revolucio nur kiel ekeniron en la konscion de la transformoj okazintaj en la nekonscio kaj kiel solviĝon de la streĉo inter nekonsciaj deziroj kaj konscia prezento en aperta konfront-

ado kun la ekzistanta sociordo. La erodo de la nekonsciaj limigoj al la deziroj plej profunde kaŝitaj en la individuo kaj la plena esprimo de ĉi-lastaj konsistigas la antaŭajn kondiĉojn por starigo de liberiga socio. Iasence oni povas diri, ke la nekonscio estas la garantiaĵo de ĉia lukto por transformi la konscion, same rilate la malhelpojn, kiuj limigas la dezirojn, kiel rilate la dezirojn mem.

VI

Hodiaŭ la demando ne plu estas, ĉu la spontaneco estas "bona" aŭ "malbona", "dezirinda" aŭ ne. La spontaneco estas integriĝa parto de la dialektiko pri ekkonscio kaj de la malfremdiĝo, kiu rompas la bridojn lokitajn de la ekzistanta ordo en la subjektiveco. Nei la valoron de la spontaneco estas nei tion, kio estas la plej liberiga en la niatempe disvolviĝanta dialektiko : kiel tia, ĝi konsistigu por ni akiraĵon, kies ekzisto bezonas nenian pravigon.

Tamen konvenas difini la terminon, se ne, ĝia enhavo riskas malaperi en la semantikajn subtilaĵojn. La spontaneco ne estas simpla impulso, almenaŭ en sia formo plej evoluinta kaj plej aŭtente homa, la sola, kiu valoras, ke oni ĝin pridiskutu. La spontaneco ankaŭ ne signifas neintencajn sentojn aŭ kondutadon. La spontaneco estas kondutado, sentoj kaj pensoj liberaj de eksteraj trudoj kaj devigaj limigoj. Ĝi estas kondutado, sentoj, pensoj memdirektitaj, direktitaj de interne kaj ne nekontrolita ŝprucado de pasio kaj agado. Laŭ la vidpunkto de la libereca komunismo la spontaneco konsistas en la kapablo de la individuo trudi al si memdisciplinon kaj saĝe formuli principojn, kiuj gvidas sian agadon en la socio. En la mezuro, kiel individuo eliminis la bridojn, per kiuj la superrego sufokis lian aŭtonoman aktivecon, tiu individuo agas, sentas kaj pensas spontanece. Rezigni la koncepton pri spontaneco en la kompreno de la nova erao de la Lumoj, de la revolucio kaj komunismo, estus forigi la ideon pri la konscienca reflektiveco, bari la vorton "mem" en memmastrumado. Se estas vere, ke la nuntempa revolucia movado neprigas komunisman konscienon, ekzistas nenia ŝanco, ke ĉi-lasta konsistiĝu

ekster la spontaneco.

La spontaneco ekskluzivas nek la organizadon nek la strukturon. Male, ĝi kutime estigas organizformojn ne hierarkiajn, aŭtente organajn, memkreitajn, memvolajn. La nura serioza demando levita de la spontaneco estas, ĉu ĝi fondiĝas aŭ ne sur scioj, ĉu ĝi estas informita aŭ ne. Kiel mi jam havis okazon ĝin substreki, en liberiga socio la spontaneco de infano ne estos samspeca kiel tiu de adoleskanto, nek tiu de adoleskanto kiel tiu de plenkreskulo ; ĉiu disponos pri pli da informado, sciado kaj spertado ol sia postnaskito (5). La hodiaŭaj revoluciuloj devus strebi al iniciato de tia informada procezo ; sed se ili penas ĝin teni aŭ rompi per la starigo de hierarkiaj organizoj, ili bremsas la procezon de memrealiĝo, kiu devas konduki al aŭtonoma aktiveco kaj memmastrumada socio.

Alia esenca konsidero por ĉia revolucia movado : nur la spontaneco de revolucio prezentas konvenan garantion, ke oni vidos la "necesan kondiĉon" de la revolucio ŝanĝiĝi en ties "sufiĉan kondiĉon", por tiel diri. Ĉia ribelo preparita de elito kaj konceptita kiel la konfronto de iu regpovo kontraŭ alia hodiaŭ preskaŭ certe kondukus al la katastrofo. La ŝtata povo, kiu frontas nin, estas tro terura, ĝia armilaro tro detruiva kaj, kiam ĝia strukturo restas netuŝita, ĝia efikeco estas tro nerezistebla, por ke defio esence bazita sur la armilforto povu ĝin serioze minaci. Endas, ke la sistemo falu, ne endas, ke ĝi batalu, kaj ĝi falos, nur kiam ĝiaj institucioj estos de la novaj Lumoj tiom senigitaj je sia enhavo, kiam ĝia povo estos tiom profunde materiale kaj morale subfosita, ke la insurekcio ludos plu nur sim-

-------

(5) Ja evidente mi ne kredas, ke la hodiaŭaj plenkreskuloj disponas "pli da informoj, sciado kaj spertado" ol la junuloj pri ĉio, kio povas havi revolucian signifon. Tute male, en tiu nia socio la plimulto de la plenkreskuloj havas menson plenegan je absurdaj konvinkoj, kaj se ili volas lerni ion valoran, endas, ke ili unue kaj longatempe mallernu.

bolan kaj ne realan rolon. Estas neeble antaŭvidi kiam kaj kiel ekokazos tiu tiel karakteriza "magia momento" de la revolucio. Sed kiam loka striko, kiu okazus nevidite en "normalaj" cirkonstancoj, servas kiel eksplodilo por ĝenerala striko revolucieca, tiam oni povas pensi, ke la kondiĉoj maturiĝis - kaj tio povas okazi, nur kiam la revolucia procezo sukcesis trovi la nivelon, sur kiu konvenas, ke ĝi loku sian batalon (6).

## VII

Se estas vere, ke hodiaŭ la revolucio estas ago de konscio en la plej larĝa senco de la termino kaj estas akompanata de malmistifiko de la realo, kiu eliminas el ĝi ĉiujn ideologiajn kaptilojn, ne sufiĉas diri, ke "la konscio sekvas la eston". Konsideri la disvolviĝon de la konscio, nur kiel speguliĝon sur la subjektiva disvolva kampo de la materiala produktado, aserti kiel la maturiĝinta Marks,

-------

(6) Unu ekzemplo ebligos pli bone kapti tiun tre gravan punkton. Se la fama striko, kiu eksplodis la 13an de majo 1968 en la uzinoj Sud-Aviado en Nantes kaj startigis ĝeneralan strikon de la amaso, estus okazinta eĉ nur unu semajnon pli frue, ĝi verŝajne havus nur lokan signifon kaj estus nekonata de la ĝenerala publiko. Sed tiel anstataŭante la studentan ribelon, ĝi ekflamigis la pulvon. Estas klare, ke eksploda ŝargo antaŭe akumuliĝis malrapide, nepercepteble. La striko de Sud-Aviado ne kreis la movadon, ĝi tiun rivelis. Kion mi volas substreki, tio estas ke verŝajne minoritata agado - kies radikala signifo eble restas al ĝi mem kaŝita - rivelis per la sola ebla maniero, ke ĝi estis la fakto de majoritato. La socia materialo por ĝenerala striko ekzistis, kaj iu ajn striko eĉ perfekte enskribita en la normala aferirado povus ĝin ekestigi. La nekonscia karaktero de tiuj procezoj malebligas, ke oni antaŭdiru, kiam produktiĝos tia movado (kiu cetere produktiĝos nur se oni ne kontraŭos al ĝi). Tio ne signifas, ke la volo ne rolas aktive en la sociaj procezoj ; tio signifas nur, ke la volo de la revolucia individuo devas por konduki al revolucio transformiĝi en socian volon, en volon de la granda plimulto de la socianoj.

ke la moralo, religio kaj filozofio estas nur "la ideologiaj reflektoj kaj eĥoj" de la realo kaj konas "nek historion nek disvolviĝon" proprajn, tio estas loki la formadon de komunista konscio sur la sama kampo, kiel la formado de ideologio, kaj konsekvence rifuzi al tiu konscio ĉian aŭtentan bazon por transcendi la donitaĵon de la mondo (7). La komunista konscio mem tiam estas nur "eĥo" de la realo. Per maniero tipe instrumenta, la "kialo" de la ekspliko pri tiu konscio estas ŝanĝita al iu "kielo". Kaj la subjektivaj elementoj implicitaj en la konscitransformo troviĝas plene objektivigitaj. La subjektiveco ĉesante ekzisti por si mem, sekvigas la nekapablecon de la marksismo ellabori propran revolucian psikologion kaj percepti la novan fenomenon de la Lumoj, kiu antaŭ niaj okuloj transformas la subjektivecon en ĉiuj ties aspektoj.

Kun la tre ĝenerala koncepto - iafoje mistikigita - pri "spirito", la klasika okcidenta filozofio ne kontestis, ke iom post iom la materia mondo iĝis klarigebla per la racio ; aŭ, por uzi pli materiisman formulon, ke la racio dum la irado de la natura kaj socia historio, ellaboras, se tiel diri, sian "ŝelon". Naturo kaj socio igitaj konsciaj, jen estas la ekstrema formo de la racio. Laŭ ĉi tiu vidpunkto estas do nesufiĉe diri, ke "la konscio sekvas la eston" ; pli ĝuste ni diru, ke la esto disvolviĝas direkte al la konscio ; ke la konscio havas propran historion interne de la materia mondo kaj pli kaj pli potence influas ties evoluon. La homaro havas la kapablon transcendi la regnon de blinda neceseco kaj doni same al la naturo kiel al la socio raciajn direkton kaj fincelon.

Tiu interpretado de la rilatoj inter la konscio kaj la esto tute ne estas nebula filozofia abstraktaĵo. Tute male, ĝi estas eminente praktika. Ĝia logika konkludo kondukas al fundamenta rekonsidero de la tradicia koncepto pri la revolucia konscio kiel

-------

(7) En "Por kritikado pri la filozofio de l'rajto de Hegel", la juna Marks elmetas ja malsaman koncepton.

klaskonscio. Se ekzemple oni konceptas la proletaron kiel nuran produkton de ties konkreta esto, t.e. kiel objekton por la burĝa ekspluato kaj kreitaĵo de la uzinsistemo, oni reduktas ĝian esencon mem al tiu de iu kategorio de la politika ekonomiko. Marks neniel igas nin dubi pri tiu koncepto. Kiel klaso la plej komplete malhomecigita la proletaro transcendas sian kondiĉon kaj fine simbolas la homan tutecon "sub la nerezistebla, ne pli longtempe evitebla urĝanta premo de la bezono..." Konsekvence, "la demando ne estas : kion tia aŭ tia proletaro, nek eĉ la tuto de la proletaro en tiama momento konsideras kiel sian celon. La demando estas : kio estas la proletaro, kion, laŭ kio ĝi estas, ĝi estos devigata fari." (Substrekas Marks, kiu tiel liveras al ni elokventan komentarion rilate la malsubjektivigon de la proletaro). Ni preterlasu la pravigojn, kiujn tiaj formuloj liveras al ĉia elitista organizo. Momente, plej grave estas rimarki kiel Marks, tiel sekvante la tradicion de la klasika politika ekonomiko burĝa, plene objektigas la proletaron kaj ĝin forpuŝas kiel subjekton. La ribelo de la proletaro kaj ties homecigo mem ĉesas esti fenomeno homa ; ili dependas de senkompataj ekonomiaj leĝoj kaj de "la absolute truda premo de la bezono". La subjektiveco de la proletaro apartenas al la kategorio de la kruda neceseco pri kiu atestas la ekonomia leĝo. La proletara psikologio, tio estas la politika ekonomiko.

La reala proletaro ne lasas redukti sian subjektivon al pura produkto de la bezono kaj pli kaj pli vivas en la sfero de la eblo, de la deziro. Tion farante, ĝi fariĝas pli kaj pli racia en la klasika senco kaj ne en la instrumentisma senco de la termino. Konkrete, se la laboristo rezistas al la labormoralo, estas pro tio, ke ĉi-lasta fariĝis neracia kompare kun la ebleco de ne-hierarkia socio. Tiusence la laboristo transcendas sian naturon de kreitaĵo kaj pli kaj pli fariĝas subjekto, malpli kaj malpli objekto ; li ĉesas esti proleto por transformiĝi en ne-proleton. En la ellaborado de lia memo, en lia aŭtonoma aktiveco ekestas la deziro apud la bezono, la eblo apud la neceso. La laboristo komen-

cas formeti de si tion, kio en lia statuso estas laboro, pura klasa estaĵo, pura objekto de ekonomiaj fortoj, eĉ pura "esto" ; li pograde apertiĝas al la novaj Lumoj.

Laŭmezure kiel la esenco homa de la proletaro anstataŭas ties uzinistan esencon, la laboristo fariĝas ĉeestanto same ekstere kiel interne de la uzino. Konkrete, kio el la laboristo venas sur la unuan planon, tio estas pli kaj pli liaj aspektoj de individuo vira aŭ ina, de patro aŭ patrino, urbano, junulo, de viktimo de la media difektado, de revulo, ktp... La uzinaj muroj fariĝis tralasivaj por la kontraŭ-kulturo en tia grado, ke ĉi-lasta ekkonkurencas la "proletarajn" zorgojn kaj valorojn de la laboristo.

Nenia "laborista grupo" fariĝos vere revolucia, se ĝi ne agnoskos la homajn aspirojn de la laboristo kiel individuo, se ĝi ne partoprenos en la malfremdiĝo de ties privata medio, se ĝi ne penos transcendi la uzinan universon. Se la laborista klaso fariĝas revolucia, tio ne estas malgraŭ ĝi ; ĝi estas mem la kaŭzo kaj la agento de tiu evoluo. Ĉi-lasta rezultas el la vekiĝo de ĝia aŭtonoma konscio (8).

VIII

La tasko de la revoluciuloj estas helpi la aliajn fariĝi revoluciaj, kaj ne "fari" revoluciojn. Kaj tiu aktiveco komenciĝas, nur kiam la revolucia individuo entreprenas transformi sin. Sed tiu transformado ne povas efektiviĝi en la soleco : ĝi supozigas spertitajn rilatojn de amo kaj interhelpo kun aliaj

-------

(8) Tion oni povis jam nete ekvidi dum la eventoj en majo-junio 1968 en Francio kaj interalie dum la kolektiĝo laboristoj-studentoj la 12an de majo sur "le Champ-de-Mars" : la laboristoj sin intersekvis ĉe la mikrofono por paroli pri siaj vivoj, siaj valoroj kaj siaj revoj de homaj estaĵoj kaj ne nur pri siaj klasinteresoj. La stalinistoj, male, faris ĉion eblan por substreki la "proletarecon" de la laboristoj kaj la "sociajn diferencojn", kiuj ilin kontraŭigis al la "burĝaj studentoj".

samgenraj individuoj. Estas la koncepto pri revolucia organizado, kiu fondas la afinecajn grupojn anarkiistajn. La membroj de afineca grupo sin konceptas kiel gefratojn, kies aktivecoj kaj rilatmanieroj estas, kiel diras Josef Weber, "travideblaj por ĉiuj". Tiuj grupoj rolas en la socia vivo kiel katalizilo kaj ne kiel elitoj ; ili penas progresigi la konscion kaj la batalojn en la pli vasta komunumo en kiu ili funkcias, kaj ne ekkapti la regpovajn postenojn.

Tradicie la revolucia aktiveco estis lokita sub signo de la "sufero", de la "rezigno", de la "sinofero", temoj, kiuj en larĝa mezuro spegulis la kulposentojn de la intelektaj kadroj de la movado. La ironio de la nuntempa situacio estas ke, laŭmezure kiel tiuj temoj pluvalidas, ili ĝuste simbolas de la establita ordo la anti-humanajn aspektojn, kiujn la "amasoj" penas elimini. La revolucia movado (se ĝi hodiaŭ plu meritas ĉi tiun nomon) tiel tendencas fariĝi la "eĥo" de la reganta sistemo eĉ pli bone ol ties ideologia propagando ; kaj, kio estas eĉ pli grava, ĝi tendencas kondiĉi la "amasojn" por la "sufero", "rezigno" kaj "sinofero" en sia propra intereso kaj celante la morgaŭojn de la revolucio. Kontraŭe de tiu moderna versio de la "respublikana virto", la afinecaj grupoj anarkiistaj asertas ne nur la racieon de la revolucio, sed ankaŭ ties aspektojn ĝojajn, voluptajn, estetikajn. Ili asertas, ke la revolucio ne estas nur sturmo kontraŭ la establita ordo, sed ankaŭ la festo en la stratoj. La revolucio, ĝi estas la deziro transportita sur la terenon socian kaj universalan. Tio ne okazas sen risko, sen tragedioj kaj sen suferoj, sed ili estas la riskoj, la tragedioj kaj la suferoj de la nasko kaj de la renovigita vivo, kaj ne de la pento kaj de la morto. La afinecaj grupoj asertas, ke sole nur revolucia movado animita de tia spirito kapablas elpensi "revolucian propagandon" (por uzi plu tiun esprimon), kiu eĥe resonas en la nova sentivo popola - "propagando", kiu estu samkiel la arto de iu Daumier, de iu John Milton aŭ de iu John Lennon. Hodiaŭ, ververe, la vero povas esti nur arto, kaj la arto povas esti nur vero (9).

-------

La disvolviĝo de revolucia movado implicas la prisemadon de Usono per afinecaj grupoj, per komunumoj kaj kolektivoj, en la urboj, en la kamparo, en la lernejoj kaj universitatoj, en la uzinoj. Tiaj grupoj konsistigus integritajn kaj malcentralizitajn ĉelojn, lasante ekster sia aktiveca sfero nenian aspekton de la vivo kaj de la eksperimento. Ĉiu grupo estus centro por eksperimentado kaj novigado celanta la transformon tiom de la ĉiutaga vivo kiom de la konscio ; kaj ĝia strukturo devus ebligi al ĝi en la ĝusta momento solviĝi en la revoluciaj institucioj kreitaj de la popolo, por malaperi kiel aparta socia fincelo. Fine, ĉiu el ili penus plej bone speguli la liberigitajn formojn de la estonteco kaj ne, kiel faras la tradicia "maldekstro", tiujn de la ekzistanta mondo. Ĝi konsistigus per si mem energidonan centron por la socia transformo kaj koloniado de la nuntempo fare de la estonteco.

Tiaj grupoj povus interligiĝi, federiĝi, kaj se bezone organizi inter si regionajn aŭ naciajn komunikiĝojn, sed sen rezigni sian aŭtonomecon nek sian apartecon. Ili estus organaj grupoj estigitaj de deziroj kaj vivproblemoj kaj ne fremdaĵo, kiun etelito plakas sur la konkreta socio. Same, ili ne povus toleri iun organizon el kadroj, kies nura ligilo estus la "priprograma interkonsento" kaj obeado al la respondeculoj kaj superaj instancoj.

Oni povas sin demandi, se iu "amasa organizo" povas esti revolucia organizo en periodo ankoraŭ ne matura por la komunisma revolucio. La kontraŭdiro aperas mem de tiam, kiam oni apudigas la vortojn "amaso" kaj "komunisma revolucio" (10). Certe, amasmovadoj estis

-------

(9) kiel atestas la malkreskiĝo de la fikcia literaturo. La vivo estas multe pli interesa ol la fikcio, ne nur en sia socia aspekto sed ankaŭ sub la formo de persona spertado kaj membiografio.

(10) Laŭ mi, ni ne estas en "revolucia periodo" nek eĉ en "antaŭrevolucia periodo", por uzi la leninistan terminaron, sed en revolucia epoko. Per tiu termino mi nomas pludaŭran fazon de socia diseriĝo markita ĝuste de tiu "lumiĝo", pri kiu mi parolis pli supre.

starigitaj nome de socialismo kaj komunismo en periodoj, kiuj ne estis revoluciaj, sed ili atingis dimensiojn "de amaso" nur koste de denaturigo de la konceptoj pri socialismo, komunismo kaj revolucio. Eĉ pli malbone, ili ne nur perfidis siajn idealojn, ĉi-lastajn denaturigante, sed ili transformiĝis en obstaklojn kontraŭ la revolucio. Anstataŭ elpensi la socian estontecon, ili fariĝis la kreitaĵoj de la socio mem, kiun ili deklaris kontraŭbatalenda.

La tento nuligi la diferencon inter la ekzistanta sociordo kaj la estonteca estas propre perfida. La revolucio estas ne nur rompo kun la establita ordo, sed ankaŭ kun la psikaj kaj mensaj strukturoj de ĉi-lasta generitaj. Laboristoj, studentoj, kamparanoj, intelektuloj, ĉiuj kiuj apartenas al la tavoloj virtuale revoluciaj, laŭlitere rompas <u>kun si mem</u>, kiam ili estas trafitaj de la revolucia skuo kaj ne nur kun la abstrakta ideologio de la sistemo. Kaj tiom longe dum ili ne efektivigis tiun rompon, ili ne estas revoluciaj. Unu t.n. "revolucia" movado, kiu, dank'al "provizora programo" aŭ alia vanaĵo, penas asimili tiujn tavolojn, ricevos ties subtenon nur pro malbonaj kialoj. Estas la movado, kiu estos fakte stampita de la homoj, kiujn ĝi vane penas asimili, kaj ne inverse. Kaj estas sciate, ke la nombro de la revoluciuloj estas hodiaŭ malgrandega, kaj krome la granda plimulto de la loĝantaro estas absorbita de problemoj pri la pluvivo kaj ne de tiuj pri la vivo. Nu, ĝuste tiuj pezaj zorgoj por la pluvivo, ankaŭ la valoroj kaj bezonoj, kiujn ili generas, <u>neebligas</u>, ke la homoj sin dediĉu al la problemoj pri la vivo - kaj sekve ankaŭ ne al la revolucia agado. La rompo kun la ekzistanta ordo estos plenumita, nur post kiam la problemoj pri la vivo sorbos kaj digestos la problemojn pri la pluvivo ; ĝi ne efektiviĝos per forpuŝo de la problemoj pri la vivo profite al tiuj de la pluvivo, nek per plua konsidero al la vivo kiel al simpla antaŭa kondiĉo de la pluvivo.

Magia momento la revolucio estas tial, ke ĝi estas neantaŭvidebla, kaj ankaŭ tial, ke en tempo de kelkaj semajnoj kaj eĉ de kelkaj tagoj ĝi povas transformi en ekkonscion tion, kio estis nur malengaĝo profunde kaŝita en la nekonscio. Sed ni ne vidu la

revolucion nur kiel "momenton" ; ĝi estas dialektika procezo kompleksa eĉ en la irado de ĝia disvolviĝo. Se la revolucio estas majoritata, tio ne signifas, ke la granda plimulto de la loĝantaro devas sammomente eniri en la revolucian fluon. Ja povas esti, ke ĉe la komenco tiu fluo grupigu nur minoritaton - minoritaton gravan, popolan, spontanan, certe, kaj ne "disciplinitan", centralizitan eteliton. La akordo de la majoritato kun tiu minoritato aperos eble nur en la fakto, ke la unua ĉesos defendi la establitan ordon. Ĝia agado povos esti rifuzi agi kiel subtenanto de la institucioj ; tiu sinteno de "wait and see" celanta determini, ĉu, rifuzante sian kunhelpon al la reganta klaso, ĝi ĉi tiun senigas je ties povo. Nur post sondado de la situacio per sia pasiveco la majoritato eventuale decidos ekagi. Sed la rapideco kaj amplekso de tiu agado balaas en iometa tempo instituciojn, rilatojn, sintenojn kaj valorojn, kiuj bezonis jarcentojn por ellaboriĝi.

## IX

En Usono ĉia organizita movado "revolucia", kies celoj estus denaturigitaj, estus senlime pli malbona, ol foresto de movado. Jam nun, la "maldekstro" kaŭzis teruran damaĝon same al la kontraŭ-kulturo kiel al la movado por liberiĝo de la virinoj aŭ al la studenta movado. Ĝiaj senmezuraj pretendoj, ĝiaj malhomecigaj kondutoj kaj manipulaj praktikoj havas pezegan respondecon en la demoralizado hodiaŭ ĉion superanta. Ja povos esti, ke en ĉia revolucia situacio estonta, la "maldekstro" (kaj aparte ties aŭtoritataj varioj) levos problemojn pli timindajn ol tiujn de la burĝaro - krom se la revolucia procezo transformos la "revoluciulojn".

Sed estas ne malmulto transformenda, ne nur en la sfero de la konceptoj pri la socio aŭ pri la personaj sintenoj, sed ankaŭ en la maniero kiel la "revoluciuloj" (precipe la masklaj "revoluciuloj") interpretas la senseblan eksperimenton. La "revoluciulo" ne malpli ol la "amasoj" havas kondutojn, kiuj tradukas, rilate la eksteran mondon, sintenon esence superregan. La okcidenta perceptado tradicie difinas la memon per terminoj de antagonismo, en la kadro de opozicio in-

ter subjektoj kaj objektoj. La memo estas ne nur persono, kiu distingiĝas de la "aliaj", ĝi estas persono, kiu penas ĉi tiujn regi kaj subigi. La rilato subjekto/objekto difinas la subjektivecon kiel regfunkcion - regadon super la objektoj kaj redukton de la aliaj subjektoj al la rango de objektoj. La okcidenta memo, almenaŭ sub siaj viraj formoj, estas memo de alproprigo kaj manipulado same en sia difino pri si mem kiel en sia difino de la rilatoj. Tiu ĉi difino pri si kaj pri la aliaj estas aktiva aŭ pasiva, aŭ ĝi manifestiĝas ĝuste en reciproka atribuo de la roloj de reganto kaj regato, sed ĉiuokaze la superrego preskaŭ universale penetras en la nuntempan manieron percepti la realon.

Praktike ĉiuj tendencoj de la okcidenta civilizacio plifortigas tiun manieron percepti la mondon, ne nur la fluoj burĝaj kaj judkristanaj, sed ankaŭ la marksisma fluo. La difino fare de Marks pri la laborprocedo kiel maniero sin determini, koncepto, kiun li prunteprenis de Hegel, allasas eksplicite la alproprigon kaj implicite la ekspluatadon. La homo konsistiĝas, transformante la mondon ; li ĝin alproprigas al si, ĝin rearanĝas laŭ siaj "bezonoj" kaj tiel reflektiĝas, materiiĝas kaj konfirmiĝas en la objektoj de sia laboro. Tiu ĉi koncepto de la memdifino de la homo konsistigas la deirpunkton de la historia materiismo. "Oni povas distingi la homojn disde la animaloj per la konscio, per la religio kaj per ĉio ajn", notas Marks en fama loko de "Germana ideologio"."Ili mem sin ekdistingas de la animaloj, tuj kiam ili komencas produkti siajn ekzistorimedojn (...). La maniero, kiel la individuoj manifestas sian vivon,tre ekzakte spegulas tion, kio ili estas. Do, kio ili estas, koincidas kun ilia produktado, same kun la produktaĵo kiel kun la maniero produkti. Do, kio estas la individuo, dependas de la materialaj kondiĉoj de ilia produktado."

En "Fenomenologio de la spirito" Hegel tuŝas la laborproblemon en la rilato mastro-sklavo. Tie ĉi la subjekto fariĝas objekto en duobla senco : alia subjekto (la sklavo) estas objektigita kaj sammomente

reduktita al produktada instrumento. Tamen la sklava laboro fariĝas la fundamento de aŭtonomaj konscio kaj memo. Tra la laboro "la sklava konscio rekuniĝas", notas Hegel. "La laboro estas retenata apetito, haltigita malapero - alidirite la laboro fasonas la objekton". Tiu "formodona aktiveco" estas "pura esti-por-si de la konscio (de la sklavo), kiu nun eniĝas en la permanentan elementon kaj eksteriĝîs en sia laboro. Per tio la laborista konscio sukcesas percepti la sendependan ekziston kiel sin mem".

Por Hegel la laboro ne restas enfermita en la rilato mastro-sklavo, t.e. en la kadro de la superrego ; tiu "momento" generas dialektikan movon, kiu ĝin superas. La disigo kaj opozicio inter la subjekto kaj objekto estos transcendita eĉ nur kiel racio plenumiĝanta en la tuteco de la vero, en la Absoluta Ideo. Sed Marks ja ne transpasas la momenton de la rilato mastro-sklavo. Tiun momenton li rigidigas kaj plivastigas por liveri la teorion pri klasbatalo - kio laŭ mi estas io grave nesufiĉa, ĉar la ekapero de la konscio estas tiel ekskluzivita for de la historia dialektiko - kaj la fosaĵo inter la subjekto kaj la objekto neniam plene malaperas. Kiel ajn oni interpretas la "feuerbach'an naturalismon" de la juna Marks, la homaro laŭ Marks transpasas la superregadon nur per maniero ambaŭvalora : regante la naturon. La naturo fariĝas iasence la "sklavo" de la harmonia socio kaj la personeco konservas sian prometean esencon (11). Do, la marksa koncepto pri komunismo latente konservas la temon de superrego : la naturo restas objekto de superrego por la homo. Tiu koncepto pri la naturo - spite la multe pli nuancitajn esprimojn de la juna Marks - falsas la repaciĝon inter la subjekto kaj la objekto, kiun la harmonia socio laŭsupoze realigas.

-------

(11) Tio bone aperas en la nesatigebla flanko de la praktiko kaj "bezono" laŭ Marks, aparte la bezono, kiu povas preskaŭ senfine ampleksiĝi. Tio aperas ankoraŭ pli bone en la ekzegezoj de la marksistaj teoriistoj, kies konceptoj pri la praktiko prezentas karakteron de infiniteco, de volismo kaj de forto-demonstracio, kiu preskaŭ similas la dionizan deliron.

La "objektoj" <u>ekzistas</u>, kaj estas <u>necese</u> ilin manipuli, tio ĉi evidente estas fundamenta postulato de la homa pluvivo kaj nenia socio eĉ harmonia povas tion ignori. La demando - tute malsama - kiu stariĝas estas : ĉu tiuj "objektoj" ekzistas <u>nure</u> kiel objektoj kaj ĉu ilia "manipulado" devas resti <u>pura</u> manipulado ; aŭ eĉ ĉu la laboro, kompare kun la arto kaj ludo, konsistigas la unuan manieron de la homo sin difini mem. La temo, kiu troviĝas en la kerno de tiuj distingoj, estas nenio alia ol la superrego, t.e. alpropriga rilato bazita sur neobjektiva koncepto pri la bezono (12). En la mezuro kiel la bezonoj de la memo ekzistas nur por si mem kaj ignoras alies integrecon (kion Hegel verŝajne nomus la "subjektiveco"), aliulo restas por la memo nura objekto kaj la manipulado al tiu objekto fariĝas pura alproprigo. Sed en la mezuro kiel aliulo estas agnoskita kiel memcelo kaj kiel la bezono difiniĝas kiel reciproka subteno, la memo kaj aliulo starigas rilaton de <u>kompletigeco</u>. Tia rilato atingas sian plenan ĝustecon en la aŭtenta arto, samkiel la aktiveco pure luda estas la plej harmonia esprimo de la deziro (13).

-------

(12) Kaj la"bezono" ĉi tie estas komprenata en la senco de manifestiĝoj de la egoismo same psikologia kiel materiala. La superrego estas konceptenda kiel io ne limiĝanta je la materiala ekspluatado, je la simpla alproprigo de la plus-valoro. Povas esti, ke la psikologia ekspluato, interalie tiu al la infanoj kaj virinoj antaŭis la materialan ekspluatadon, kaj eĉ ke ĝi establis la valorojn kaj kondutadojn, kiuj igis ebla ĉi tiun. Kaj tiom longe dum tiu tipo de ekspluatado ne estos tute eliminita, la homoj ne progresos en sia homeco.

(13) La muziko estas la plej frapanta ekzemplo pri arto, kiu povas ekzisti por si mem kaj ankaŭ kombiniĝi kun la ludo por la ludo mem. La konkuradaj sportoj estas, ĉe la alia ekstremo, ludformoj preskaŭ komplete malaltigitaj ĝis komercaj rilatoj. Ni ne forgesu, ke arto kaj ludo estas konceptoj, kiuj enhavas internan dialektikon, kio klarigas mian uzadon de esprimoj kiel "aŭtenta arto" aŭ "aŭtenta ludo", alidirite arto kaj ludo sin mem celantaj.

Ĉar ĝi ekskluzivas la superregon, la kompletigeco - eĉ sub siaj plej banalaj formoj de kontraktaj kaj interhelpaj rilatoj lokitaj sub la signo de "reciprokeco" - antaŭsupozigas specon de nova spiriteco implicanta la respekton al aliulo por ĉi tiu mem, aktivan, inventeman, amantan, simbiozan simpation.

La dependeco ĉiam ekzistas. Sed se oni volas kompreni la distingon inter superrego kaj kompletigeco, estas esence vidi kiel kaj kial ĝi ekzistas. La infanetoj ĉiam dependos de la plenkreskuloj por la kontentigo de siaj plej elementaj fiziologiaj bezonoj, kaj la junuloj ĉiam bezonos, ke iliaj antaŭnaskitoj ilin helpu per sia sciado kaj sperto. Siaflanke, la plej aĝaj generacioj restos dependaj de la pli junaj pri la reprodukto de la socio kaj pri la nemalhavebla stimulilo, kiu estas la esplorada kaj noviga spirito. En la hierarkia socio la dependeco kutime sekvigas la subigon de aliulo kaj la rifuzon de ties identeco. La diferencoj en la aĝo, sekso, labormaniero, scionivelo, intelektaj, artaj kaj koraj inklinoj, fizika aspekto, ktp... - tiu tuta senlima diverseco, kiu povus naski konstelacion da riĉigaj rilatoj kaj interdependoj - ĉio ĉi estas ŝanĝita en objektivan sistemon de aŭtoritato kaj obeado, de supereco kaj malsupereco, de rajtoj kaj devoj, de privilegioj kaj senigoj. Tiu hierarkia organizado de la signoj manifestiĝas ne nur en la socia mondo ; ĝi eniĝas interne de la individuo, en ties maniero percepti la fenomenojn naturajn, sociajn aŭ intimajn. En la hierarkia socio ne nur la maniero agi kaj komuniki estas hierarkiigita; sed la penskapablo kaj sensiveco, kiuj en sia organizlaboro de la ega diversa materialo liverita al la sensoj, memoro, valoroj, pasioj, pensoj, ankaŭ aplikas hierarkiajn principojn.

La penso de la organaj komunumoj primitivaj, almenaŭ de tiuj, kiuj ŝajnas la plej harmoniaj, restis por la esenco senigita je hierarkiaj skemoj ; verdire oni povas demandi al si, ĉu la homaro estus iam sukcesinta leviĝi super la animaleco en sistemo de sociaj reciprokaĵoj kapablaj anstataŭi la fizikajn mankojn de gracila primato en savano vivanta. En larĝa mezuro tiuj primitivaj konceptoj estis ja mitaj, ĉar ekzemple ili konsideris ne nur la animalojn kaj plantojn, sed eĉ la venton kaj ŝtonojn kiel vivajn estaĵojn. Tamen ĉi-lastaj

estis elementoj el spirita tuto, en kiu partoprenis ankaŭ la homoj nek super nek sub la cetero. Ĉi tiu vizio pri la mondo estis fundamente egaliga kaj spegulis la egalismon de la komunumo. Se oni fidas la analizon faritan de Dorothy Lee pri la lingvo de la Indianoj Wintu, tiu ĉi lingvo sub nenia ajn formo konis la nocion pri regado. La natura mondo estis dotita per nenia hierarkia organizado, almenaŭ tiom longe dum la homa komunumo ne ekhierarkiiĝis. Poste la sensebla sperto mem hierarkiiĝis, tiel spegulante la disigojn, kiuj rompis la organan unuecon de la primitivaj komunumoj laŭ procezo, kies ĉefajn etapojn ni aliloke priskribas. (Vd. "Por ekologia socio" IVa ĉapitro).

La burĝa socio, kiu malaltigis ĉian socian rilaton al komerca rilato kaj ĉian produktivan aktivecon al "produktado cele al produktado", faris el la hierarkia koncepto la fundamenton de konduto neredukteble antagonisma rilate la naturan mondon. Ja ĝuste estas diri, ke tiu koncepto, kaj la diversaj labormanieroj, kiuj ĝin naskis, ebligis nekredeblajn teknikajn progresojn ; tamen tiuj progresoj efektiviĝis nur koste de konflikto tiel grava inter la homaro kaj la naturo, ke ĝi minacas la fundamenton de la vivo. La institucioj naskitaj de la hierarkia socio nun atingis sian historian finon. Antaŭ nelonge motoroj de la teknika progreso, ili nun estas nereteneblaj kulpantoj de ekologia malekvilibro. La patriarka familio, la klassistemo, la urbo kaj la ŝtato estas laŭ siaj propraj kriterioj bankrotantaj ; sed, fakto pli danĝera, ili laŭ ega skalo estigas en la socio konfliktojn kaj diserigojn. Kiel mi jam havis okazon ĝin montri, la produktrimedoj fariĝis tro imponaj por pluservi kiel rimedoj de superrego. Finiĝu la superrego mem kaj kun ĝi la historia heredo, kiu pluigas la hierarkian percepton al ĉio sensebla.

## X

La apero de ekologio kiel socia problemo montras kiel altrudiĝas al ni la problemoj de la organaj socioj, tiuj organaj socioj, kiuj ignoras la apartigojn same interne de si kiel inter si kaj la naturo. Neniel estas hazardo, se la kontraŭ-kulturo penas inspiriĝi

el la maniero percepti la realon karakteriza de la Indianoj kaj Azianoj. Se la arkaikaj mitoj, filozofioj kaj religioj naskiĝintaj en pli integriĝinta, pli organa mondo, reviviĝas, tio estas nur, ĉar la demandoj al kiuj ili respondis akute reaktualiĝis. La vorto "komunismo" atingas la du ekstremojn de la historia disvolviĝo : unuflanke, la primitivan socion teknologie malkleran, al kiu la naturo inspiras sanktan teruron ; aliflanke, utopion kun ekstreme perfektigita teknologio, kiu respektus la naturon kaj kun konscienco servus la vivon. Unuflanke, reton da reciprokaĵoj rigore difinitaj, bazitaj sur la kutimo kaj la neceseco ; aliflanke, la eblon de konstelacio da kompletigaj rilatoj inspiritaj de la racio kaj deziro. Inter tiuj du limoj sidas fabela disvolviĝo teknologia ebliganta transcendi la imperion de la neceso.

La socialista fluo estas tute nekapabla kompreni la implikojn de la komunisma problemaro hodiaŭ aperanta ; tion oni povas prijuĝi laŭ ĝia sinteno rilate la ekologion - sinteno kiu, se ĝi ne estas nur el indulga ironio, apenaŭ denuncas la skandalojn. Mi tie ĉi parolas pri <u>ekologio</u> kaj ne pri mediismo. Kio interesas la mediismon, tio estas la disponigo al la homo de ties "loĝloko", tiu ĉi konceptita kiel pasiva aro da "naturaj riĉofontoj" kaj "urbaj rimedoj", kiujn la homoj <u>uzas</u>. Se aparte konsiderataj, la demandoj starigitaj de la mediismo petas ne pli la saĝon ol la metodojn kaj instrumentajn formojn de rezonado, kiujn uzas la urbanizistoj, inĝenieroj, kuracistoj, juristoj... kaj socialistoj. Kontraŭe, la ekologio en tio, kio estas en ĝi plej bona, estas formo de poezio, kiu unuigas la arton kaj sciencon en sintezo tute unika (14). Plej grave estas, ke la

-------

(14) "Arto" en tiu senco, ke ekologio postulas daŭran improvizadon. Kaj tiu postulo rezultas el la varieco de ĝia studobjekto : la eko-sistemo, t.e. la vivanta komunumo kaj ties medio, kiuj estas la baza unuo de la ekologia serĉado. Nenia eko-sistemo estas reduktebla al alia kaj la ekologiistoj estas konstante devigataj konsideri tiun absolutan apartaĵon. Malgraŭ la subprema provo redukti la ekologion al io kiel la sistemanalizo, la objekto de tiu scienco ĉiumomente manifestas sian rezist-
(fino de la piednoto p.52)

ekologia starpunkto kondukas al tio : interpreti en nehierarkia maniero la interdependajn rilatojn ĉu sociajn, psikologiajn aŭ naturajn. Laŭ la ekologio oni ne povas kompreni la naturon, se oni sin lokas sur hierarkia starpunkto. Ĝi asertas, ke la diverseco kaj la spontana disvolviĝo konsistigas per si mem respektendajn celojn. En terminoj de "eko-sistemoj" tio signifas, ke ĉiu vivoformo okupas unikan lokon en la natura ekvilibro, kaj ke ĝia forigo endanĝerigas la stabilecon de la tuto. Se lasita al si mem, la natura mondo tendencas koloniigi la planedon per vivoformoj ĉiam pli diversigitaj kaj per rilatoj ĉiam pli kompleksaj inter la specioj, ĉu temas pri nutroĉenoj aŭ nutroretoj.

Ĉiuj vivoformoj havas sian lokon en la biosfero, kaj la biologia evoluo tendencas ilin senĉese diversigi. En eko-sistemo tiuj formoj organiziĝas en aparta tuteco, kiu ne havas alian celon, ol sin mem. Ankaŭ la homoj apartenas al la tuteco, sed ili konsistigas nur unu solan el ties partoj. Ili povas interveni en tiu parto kaj eĉ konscie provi ĝin direkti, kondiĉe ke ili agu tiom en ties intereso, kiom en tiu de la socio. Sed se ili klopodas ĝin superregi, t.e. ĝin prirabi, ili riskas subfosi en ĝi la naturajn fundamentojn de la socia vivo.

La dialektika naturo de la ekologia penso, ĉar ĝi akcentas la diferencigon, la internan disvolviĝon kaj la unuecon en la diverseco, devus klare aperi al kiu ajn legis Hegel'on. Eĉ rilate la lingvon, la dialektikaj ekologio kaj filozofio rimarkinde renkontas unu la alian. Estas paradokse la ekologio, kiu plej proksimiĝas al la marksa koncepto pri la scienco kiel dialektiko ; ĝi estas al tiu eĉ pli proksima ol la politika ekonomio tiel kara al Marks. Tiun privilegian lokon la ekologio ŝuldas al tio, ke ĝi ebligas, tiel sur la biologia kampo, kiel sur la socia, ruinigan kritikon pri la hierarkia socio en ties tuto, samtempe sugestante la

-------

adon, kaj ofte okazas, ke la plej sensprita el la aŭtoroj estas devigata elpensi tre poeziajn metaforojn por trakti tiujn fenomenojn.

agadprincipojn de vivipova kaj harmonia utopio. Ĝi ja havigas sciencan starejon al la ideo pri malcentralizita socio bazita samtempe sur nova teknologio kaj sur novaj formoj de socia organizado, unu kiel alia modlante sin samkiel artaĵo sur la eko-sistemo, kiu ilin akceptas. Kaj oni tiel povas rajte konsideri la afinecan grupon kaj eĉ la "kompletan homon" laŭ la tradicia senco, kiel ekologiajn konceptojn. Kiu ajn estas la sfero, al kiu oni ĝin aplikas, la ekologia koncepto konsideras la unuecon en la diverseco kiel la principon de dinamika tuteco, kiu tendencas harmonie integri siajn diversajn elementojn, kaj ne kiel agregaĵon el elementoj kunekzistantaj en la neŭtraleco.

Ne nur ĝia stulteco malhelpas al la socialisma fluo kompreni la ekologian starpunkton. Ni diru ĝin nete, la marksismo ne plu ebligas adekvate percepti la komunisman vizion, kiu nuntempe formiĝas. Sed la socialisma fluo krome pligravigis tion, kio estas plej strikta en la ideoj de Marks, kaj ĝi ne komprenis ties fekundecon. Kio konsistigas la "modus operandi" de tiu fluo, tio ne estas la marksa vizio pri homaro integrita kaj repaciĝinta kun la naturo, sed la dubasencaĵoj de la latenta instrumentismo, kiuj ĝin makulas.

## XI

La historio moktrompis nin. El la hieraŭaj veroj ĝi faris erarojn hodiaŭajn, ne liverante al ni novajn argumentojn por tiujn verojn refuti, sed tutsimple malfermante al la socio novan kampon el ebloj. Ni komencas kompreni, ke la sfero de la superrego estas pli vasta ol tiu de la materiala ekspluatado. La tragedio de la socialisma fluo estas ke, sub influo de la pasinteco, ĝi uzas la superregajn metodojn por provi "liberigi" nin de la materiala ekspluatado.

Ni komencas kompreni, ke la plej evoluinta formo de klaskonscio estas la memkonscio. La tragedio de la socialisma movado estas, ke ĝi kontraŭmetas klaskonscion kontraŭ memkonscion kaj rigardas "individuismo" la ekaperon de la "sio", dum ĉi-lasta estas

la fundamento de la plej evoluinta formo de kolektivo, la memregata kolektivo.

Ni komencas kompreni, ke la spontaneco naskas siajn proprajn formojn de socia organizado liberigita. La tragedio de la socialisma movado estas, ke ĝi kontraŭmetas organizadon kontraŭ spontaneco kaj kredas, ke ĝi povas similigi la socian procezon al la politika kaj organizada instrumentismo.

Ni komencas kompreni, ke eblas nun kontentigi la ĝeneralan intereson transe de la revolucio dank'al teknologio, kiu forigas la mankon. La tragedio de la socialisma movado estas, ke ĝi subtenas la apartan intereson de la proletaro kontraŭ la ĝenerala intereso de ĉiuj superregatoj - ĉu ili estas tiaj pro sia aparteno al socia tavolo, al sekso, al aĝoklaso aŭ al etna grupo.

Endas ekkomenci rompon kun la donitaĵo, kun la socia formo, kiun ni havas antaŭ la okuloj, kaj peni kompreni, ke ni partoprenas en procezo havanta malantaŭ si longan historion kaj antaŭ si longan estontecon. En apenaŭ kelkaj jaroj oni povis vidi verojn kaj establitajn valorojn rapidege diseriĝi kaj laŭ skalo nekonceptebla dek jarojn antaŭe. Kaj tamen ni estas eble nur ĉe la komenco de tiu diseriĝa procezo. Ni travivas revolucian epokon, senmezuran historian fluon, kiu naskiĝas kaj vastiĝas, ofte sen nia scio, en la plej foraj regionoj de la nekonscio, kaj kies perspektivoj ampleksiĝas laŭmezure kiel ĝi disvolviĝas. Hodiaŭ pli ol iam, unu fakto sin trudas al ni, spertada fakto kaj ne produkto de teorio : la konscio povas rapide transformiĝi, kun rapideco iafoje neeltenebla por la observanto. En revolucia epoko, unu jaro, eĉ kelkaj monatoj, povas sufiĉi, por ke estiĝu evoluo de la konscio kaj de la popola spiritostato, kiu en aliaj tempoj estus postulinta jardekojn.

Ni nepre sciu, kion ni volas, se ne, ni uzos rimedojn, kiuj radikale falsos niajn celojn. Komunismo estas nun ĉe la tagordo de la socio, kaj ne socialisma aĉaĵaro el "etapoj" kaj "transiroj", kiu povas nur impliki nin en la mondon mem, kiun ni strebas transpasi. Kio estas ĉe la tagordo, tio es-

tas senhierarkia socio memregata kaj senbalastigita je ĉiaforma superregado, kaj ne hierarkiigita sistemo stariganta la ruĝan standardon. La dialektika klopodo kiun ni advokatas, konsistas nek en prometea volo, kiu rigardas la "alian" kiel antagoniston, nek en pasiveco kiu sen reago subiĝas al la fenomenoj. Ĝi ankaŭ ne estas serĉado de la feliĉo kaj kvietiĝo en eterna antaŭstato. La vivo komenciĝas, tuj kiam ni estas pretaj plenumi malpermesatajn eksperimentojn, kiuj ne kompromitas la pluvivadon. La deziro estas la homa sento de tio ebla, kiu ekaperas samtempe kiel la vivo ; la plezuro estas la plenumo de tiu eblo. Tiel, la dialektika klopodo, kiun ni provas elpensi estas la movo de konstanta transcendo delikata, kies esprimoj plej homaj estas la arto kaj la ludo. Ni atingos difinon pri ni mem ekde tiu "alia" homecigita, kiun estigas la arto kaj ludo, kaj ne ekde la "alia" bestigita de la laboro kaj superregado.

Ni nepre serĉu senĉese ion novan kaj, laŭmezure kiel la mondo disvolviĝas, la maturiĝantajn eblecojn kaj la novajn perspektivojn de ĉi-lastaj malfermitajn. Koncepto, kiu nome de la "realismo" rezignas konsideri la novecon kaj eblecon, perdas kontakton kun la nuntempo, ĉar la nuntempo ĉiam estas kondiĉita de la estonteco. La reala disvolviĝo estas kumula kaj ne linia; ĝi estas kresko kaj ne sinsekvo. La noveco ĉiam reprezentas la pasintecon kaj la nuntempon, sed ĝi ilin pliriĉigas integrante ilin en pli vasta sintezo.

° ° °

# EKOLOGIO
# KAJ REVOLUCIA PENSO

Teksto aperinta en "Anarchos" kaj poste en "Scarcity Anarchism".

De post la Renesanco la disvolviĝo de la revolucia penso, je preskaŭ ĉiu etapo, estis signita de la precipa influo de scienco ofte en rilato kun filozofia skolo.

En la epoko de Koperniko kaj Galileo, ja la astronomio helpis la kritikan penson transpasi de la mezepoka mondo penetrita de superstiĉoj al tiu de la racionalismo, naturalismo kaj humanismo. En la erao de la Lumoj, kiu kulminas dum la Franca Revolucio, al la impeto de la liberigaj ideoj kontribuas la progresoj efektivigitaj de la meĥaniko kaj matematiko. Kaj la Viktoria epoko troviĝis ĝisfunde ŝancelita de la evoluismaj teorioj pri biologio kaj antropologio, de la politika ekonomio marksisma kaj de la freŭda psikologio.

Hodiaŭ la establita sociordo perfekte asimilis tiujn iam liberigajn sciencojn. Ni diru eĉ, ke la scienco kiel tia pli kaj pli montriĝas al ni kiel instrumento por kontrolo de la mensaj procezoj de la homo kaj por kondiĉado de ties materiala estaĵo. Kaj tiu suspekto pri la scienco kaj scienca metodo ne estas senbaza. "Multaj sentemaj homoj, precipe inter la artistoj, timas, ke la scienco difektus kaj malnobligus la aferojn, ke ĝi tiujn disigus anstataŭ interligi, tiel estigante pliĝuste morton ol kreadon", skribis Abraham Maslow (1). Sed kio ankoraŭ pli gravas, tio estas ke la scienco perdis sian kritikan efikon. Ĉar, koncerne la esencon, penetritaj de funkcia kaj instrumenta spirito, tiuj samaj sciencoj, kiuj iam minacis rompi la katenojn de l'homo, hodiaŭ servas por ilin pluigi, por ilin ori. Eĉ la filozofio cedis al la instrumentismo kaj emas esti ne multe pli ol aro da logikaj kombinoj ; ĝi estas la ĉiofara servistino de la komputoro kaj ne de la revoluciulo.

--------

(1) Abraham Maslow, Toward a Psychology of Being (Direkte al psikologio de la estaĵo), Nov-Jorko 1962, p.VIII.

Tamen ekzistas scienco, kiu ankoraŭ povas retrovi kaj eĉ superpasi la liberigan valoron de la iamaj sciencoj kaj filozofioj. Oni ĝin relative svage nomas "ekologio", termino antaŭ cent jaroj forĝita de Haeckel por signi "la studadon pri la rilataro inter la animalo kaj ties organika samkiel neorganika medio". Unuavide la difino de Haeckel estas ja sendanĝera ; kaj pro tio ekologio strikte konceptita kiel branĉo de la biologio ofte limiĝas je serio de biometraj° mezuroj, per kiuj la serĉistoj surterene determinas la nutroĉenojn aŭ starigas statistikan inventaron de la animalaj loĝantaroj. Ekzistas saneca ekologio, kiu neniel vundus la ofendiĝemon de la Usona Medicina Asocio, kaj koncepto pri socia ekologio ĉiel konforma al la plej ellaboritaj teorioj de la Komisiono por Urboplanismo de la Urbo Nov-Jorko.

Sed en pli larĝa perspektivo, la celo de ekologio estas la ekvilibro de l'naturo. Nu, en la mezuro kiel la naturo ampleksas la homon, tio traktita de tiu scienco fundamente estas la harmoniigo inter la homo kaj la naturo. Tia esplormaniero enhavas eksplodajn implicadojn, ne nur ĉar ekologio estas esence kritikeca scienco - laŭ grado kiun neniam atingis la plej radikalaj konceptoj de la ekonomia politiko - sed ankaŭ tial, ke ĝi estas scienco, kiu integras kaj sintezas. Kaj ĉi-lasta aspekto, se oni konsideras ĉiujn ties implicadojn, maldetale similas la anarkiisman kritikon al la socio. Ĉar, finanalize, neeblas atingi harmonion de l'homo kun la naturo sen starigi homan komunumon kiu vivus en daŭrema ekvilibro kun sia natura medio.

## La kritika valoro de ekologio.

La kritika forto de ekologio estas trajto unika en la nuntempa scienca mondo karakterizita de ĝenerala obeemo. Ĝi devenas de sia objekto, de sia propra sfero. La problemoj traktitaj de ekologio estas

-------

°) Biometro : Scienco, kiu helpe de matematikoj studas la biologiajn variojn interne de difinita grupo.

netranspaseblaj : oni ne povus ilin malatenti sen endanĝerigi la pluvivon de l'homo kaj eĉ la pluvivon de la planedo. Tiu kritika forto estas ŝuldata ne tiom al la potenco de la homa racio, eĉ se ĉi tiun la scienco en siaj revoluciaj periodoj alte levis, kiom al la suverena potenco de la naturo mem. Povas esti, ke la homo estas manipulebla, kiel tion pretendas la mastroj de la amaskomunikiloj, aŭ ke la elementoj de l'naturo estas manipuleblaj kiel tion demonstras la inĝenieroj ; sed kion instruas ekologio, tio estas, ke la natura mondo kiel tuteco, - t.e. la naturo konsiderata laŭ ĉiuj siaj aspektoj, je ĉiuj stadioj de siaj cikloj kaj en ĉiuj siaj interkonektoj, - rifuzas al la homo ĉian pretendon pri mastreco super la planedo. La dezertigo de la mediteranea baseno, kie iam abundis la vegetalaro same natura kiel kultivita, atestas por la historio pri tio, kiel la naturo repagas al la homa parazitismo.

Sed la historio montras neniun precedenton laŭ amplekso kaj graveco kompareblan al la damaĝoj kaŭzitaj de la homo - nek al la repagoj de la naturo - de post la komenco de la Industria Revolucio kaj precipe de post la dua tutmonda milito. La antaŭaj ekzemploj de homa parazitismo estis esence lokaj ; ili estis, ĝuste, nur ekzemploj de la homa detrukapablo. Ili estis ofte kompensataj per rimarkindaj plibonigoj farataj al la natura ekologio de iu regiono, kiel la admirinda remodlado de la grundo dume de la jarcentoj efektivigita de la eŭropa kampistaro, aŭ en la Andoj la terase kultivitaj montoj de la antaŭkolombieraaj Inkaoj.

Samkiel la imperiismo, laŭskale de la terglobo hodiaŭ vastiĝas la detruo de la medio. Ĝi eĉ transas la terajn limojn, kiel tion pruvas la freŝdataj difektiĝoj de la zono Van Allen. La parazitismo de la moderna homo ne limiĝas je la perturbo de la atmosfero, klimato, akvoj, grundo, flaŭro kaj faŭno de iu regiono ; ĝi praktike endanĝerigas la fundamentajn ciklojn de l'naturo kaj minacas la stabilecon de la medio laŭ planeda skalo.

Por ilustri la amplekson de la malbonfaroj de l' moderna homo, ni memorigu, ke oni taksas je ses cent

milionoj da tunoj la kvanton da karbonoksido ĉiujare eligata pro uzo de fosiliaj brulaĵoj (petrolo kaj karbo), t.e. ĉirkaŭ 0,03 % de la totala atmosfermaso, sen kalkuli ĉiujn aliajn toksaĵojn. De post la Industria Revolucio la totala maso da karbonoksido entenata en la atmosfero kreskis je 25%. Oni havas tre firmajn teoriajn kialojn por aserti, ke tiu pli kaj pli dika kovrilo el karbonoksido, malhelpante la disiĝon de la termika terradiado, naskos tipojn de pli kaj pli danĝeraj atmosferaj perturboj kaj post tempopaso riskos estigi fandiĝon de la polusaj glacikalotoj kaj la submergon de vastaj etendaĵoj da grundoj. Eĉ se tempe fora ŝajnas tiu diluvo, la modifo de la proporcio de karbonoksido rilate al la aliaj atmosferaj gasoj estas alarma signo pri la influo, kiun povas havi la homo sur la naturajn ekvilibrojn.

Pli tuja ekologia problemo sidas en la poluado fare de l'homo de tre granda nombro de la teraj riveroj. Kio estas grava, ne estas tiom la fakto, ke la homo malpurigas tian rojon, tian riveron aŭ tian lagon, kion li ĉiam faris, kiom la vastiĝo de tiu fenomeno dum la du lastaj generacioj. En Usono, praktike ĉiuj surfacaj akvoj estas hodiaŭ poluitaj. Granda nombro de la usonaj akvofluoj estas publikaj rubejoj kaj fakte rolas nur kiel vastiĝejo de la kloaka reto. Nur eŭfemisme oni nomas ilin lagoj aŭ riveroj. Tre granda parto de la subteraj akvoj ne plu estas trinkeblaj kaj multaj lokaj epidemioj de virusa hepatito originas el la poluo de la akvoj kaptitaj en la urbaj ĉirkaŭoj. En diferenco de la poluado de la surfacaj akvoj, tiu de la akvoj subteraj estas ege malfacile eliminebla kaj emas persisti dum dekoj da jaroj post kiam oni forigis ĝiajn kaŭzojn.

Artikolo aperinta en populara magazino povis prave priskribi la usonajn akvofluojn kiel "mortiĝantajn akvojn". Kvankam ĝi senesperige kaj apokalipse aspektas, tiu formulo povas aplikiĝi al la tutmondo. La akvoj de la planedo estas laŭlitere mortantaj. Same la riveroj kaj lagoj de Afriko, Azio kaj Latinameriko kiel la akvofluoj jam de longe

superekspluatataj de la industriaj landoj, estas kiel vivofontoj, pro la masiva poluado, detruataj. Mi celas ne nur la radioaktivajn poluantaĵojn de la nukleaj bomboj kaj reaktoroj, kiuj difektas la tutajn oceanajn flaŭron kaj faŭnon ; ankaŭ elverŝoj de la petrolproduktaĵoj starigas kolosan problemon kaj ĉiujare amase detruas la enmaran vivon. Ne estas sektoro de la biosfero, kiu efektive eskapas el tiaj fenomenoj. Necesus paĝoj kaj paĝoj por raporti pri la egaj perdoj de plugebla grundo, kiuj ĉiujare okazas sur ĉiuj kontinentoj, pri la mortoj kaŭzitaj de aerpoluo de la grandurboj, pri la planeda difuzo de agentoj tiom same toksaj kiel plumbo kaj radioaktivaj izotopoj, pri la kemipoluo de la medio de l'homo kaj eĉ de ties ĉiutaga menuo per pesticidaj reziduoj kaj ennutraj aldonaĵoj. Kombinitaj kiel puzlopecoj, tiuj atencoj kontraŭ la medio konsistigas senprecedentan detruagadon dum la longa historio de la homo sur la Tero.

Oni evidente povus difini la homon kiel paraziton kun tre alta detrupovo, kiu minacas neniigi la naturan mondon - sian gastiganton - antaŭ ol sin mem neniigi. Por la ekologio la termino "parazito" tamen ne estas solvo, ĝi male starigas problemon. La ekologiistoj scias, ke detrua parazito tiutipa ĝenerale rivelas rompon de la ekvilibro. Fakte, multaj specioj, kiuj ŝajnas ekstreme detruaj en aro da donitaj kondiĉoj, riveliĝas tre utilaj en malsamaj kondiĉoj. Kio investas ekologion de profunde kritika funkcio, tio estas la demando levita de la detrukapablo de l'homo, nome : kio estas la ekvilibro-rompo, kiu faris el la homo detruan paraziton ? Kio generis formon de parazitismo tian, ke ĝi kaŭzas gravajn perturbojn en la naturaj cikloj kaj eĉ minacas la ekzistadon de la homaro ?

Ne nur en la naturo la homo kreis malekvilibrojn, sed ankaŭ kaj pli fundamente en sia rilato kun sia proksimulo kaj en la strukturo mem de la socio. Kaj la malekvilibroj, kiujn li kaŭzis en la natura mondo, rezultas el tiuj, kiujn li kaŭzis en la socio. Antaŭ unu jarcento oni ankoraŭ povis konsideri, ke la poluado de la aero kaj akvo rezultis el la pro-

fit- kaj potencavido de la grandindustriistoj kaj burokratoj. En nia tempo, tiu morala klarigo aspektas kiel kruda simpligo. Estas nenia dubo, ke la plejparto de la burĝaj entreprenoj tute malŝatas la publikan bonon, kiel atestas la sinteno de la trustoj por energio, ŝtalo kaj aŭtomobilo fronte al la problemoj de poluado. Sed estas problemo pli grava ol tiu de la kondutado de la regantoj de tiuj firmaoj ; ĝi estas la problemo de la amplekso de la entreprenoj mem, de ties gigantismo kaj de ĉio, kion tiu implicas por la regiono, kie ili stariĝas, por la homaj kolektivoj kiel por la riveroj, la problemo de iliaj bezonoj de krudaj materialoj kaj de akvo, tiu de ilia loko en la nacia divido de l'laboro.

Kion oni hodiaŭ observas, tio estas krizo en la socia ekologio. La moderna socio tia, kia ni ĝin konas precipe en Usono kaj Eŭropo, sin apogas sur grandegaj urbaj zonoj, sur alte industriigita agrikulturo kaj, ĉapelanta la tuton, ŝtata aparato hipertrofiita, burokratisma kaj anonima. Se oni preterlasas ĉian moralan konsideron por konsideri nur la materialan strukturon de tia socio, oni nepre estas frapita de la nekredeblaj problemoj de loĝistiko de ĝi solvendaj - problemoj de transporto, de provizado (krudaj materialoj, manufakturaĵoj kaj nutrovaroj), de ekonomia kaj politika organizado, de lokado de la industrioj, ktp. Urbanizita kaj centralizita socio tiutipa prezentas por iu ajn kontinenta etendaĵo egan ŝarĝon.

Diverseco kaj simpleco

Sed la fundo de la problemo sidas ankoraŭ pli fore. La homa devigo regi la naturon rekte devenas de la superrego de la homo super la homo. La patriarka familio enkondukis la regan ĝermon en la bazan ĉelon de la sociaj rilatoj ; la antikveco disvolvis tiun ĝermon, disigante la spiriton disde la realeco - aŭ pliverdire la penson disde la produktiva laboro ; ĝi poste sin nutris per la kontraŭnaturalismaj antaŭjuĝoj de la kristanismo. Sed nur post kiam la rilatoj komunumaj, feŭdaj aŭ kamparanaj aliiĝis en merkantilismajn rilatojn, la planedo mem troviĝis

reduktita al la statuso de ekspluatenda riĉofonto. Tiu plurjarcente malnova provo kulminas en la moderna kapitalismo. La konkurenceca naturo de la burĝa socio kontraŭigas ne nur ĉiun homon kontraŭ la aliaj, sed ankaŭ la tutan homaron kontraŭ la natura mondo. Samkiel la homoj, la naturo en ĉiuj siaj aspektoj estas konvertita en varon, en transformotan kaj vendotan materialon. La liberalismo baptas tiujn procezojn "kreskado", "industria socio", aŭ "urba plago", aŭ eĉ "konsumsocio". Sed ĉeradike de la fenomeno oni ĉiam trovas la regadon de la homo super la homo. La sistema ekspluatado de la grundo fare de la kapitalo akompanas la sisteman ekspluatadon de la homa spirito fare de la merkato. La liberala terminologio celas nur kamufli la socian signifon de la ekologia krizo.

Oni vane indigne protestas kontraŭ la demografia kreskado ; la procentoj, kiuj strategie gravas por la ekologia krizo, ne estas tiuj de la demografia kreskado en Hindio, sed ja tiuj de la Usona produktado, kiu reprezentas la duonon de la tutmonda produktado. Pri tio liberalismo denove uzas eŭfemismojn tiajn, kiel "abundo", por ne krude paroli pri "malŝparado". Usono, kiu dediĉas la naŭonon de sia industria kapablo al la militaj produktoj, laŭlitere disrabas la planedon kaj rompas la ekologiajn interligojn esencajn por la homa pluvivo. Se la nuntempaj antaŭkalkuloj koncerne la industrion konfirmiĝos, en la tridek lastaj jaroj de la jarcento oni konstatos la kvinobliĝon de la elektrenergia produktado precipe bazita sur la karbo kaj la nukleaj brulaĵoj. Senutilas priskribi la kolosan ŝarĝon da radioaktivaj ruboj kaj aliaj elfluoj, kiun tia kreskado igos pezi sur la planeda ekologio.

Eĉ antaŭ tiu tempo, la situacio ne estos malpli maltrankviliga. Dum la venontaj kvin jaroj la produktado de ligno kreskos probable je 20% ; tiu de papero, je 5% ĉiujare ; tiu de la kartonaj pakmaterialoj je 3% ĉiujare ; tiu de la plastoj (kiuj hodiaŭ reprezentas de 1 ĝis 2% el la hejmaj rubaĵoj) je 7% ĉiujare. Nu, tiuj produktaĵoj estas inter la plej danĝere poluantaj. Oni eble ne povus pli bone ilustri la absurdecon de la moderna industria aktiveco, ol rememorigante la malpliiĝon de la nombro da bierboteloj fakturitaj (kaj reuzeblaj) de 54 miliardoj en 1960 ĝis

26 miliardoj hodiaŭ. Dume, la boteloj nereuzeblaj pasis de 8 ĝis 28 miliardoj kaj la metalaj skatoloj de 38 ĝis 53 miliardoj. El kio evidente rezultas kolosa problemo pri forĵeto de la solidaj senutilaĵoj.

Se la planedo estus amaso da inertaj mineraloj, ĝi ja certe povus adaptiĝi al tia sensenca kreskado de la ruboproduktado. Sed certe ne, se oni konsideras, ke ĝi estas histo vivanta kaj kompleksa. La nura demando estas : ĉu tiun disrabon ĝi sufiĉe longe transvivos por ebligi al la homo anstataŭigi la nuntempan detruan sistemon per humanisma socio bazita sur la ekologiaj principoj.

Oni ofte insistas ĉe la ekologiistoj, ke ili determinu kun scienca precizeco la ekologian rompopunkton de la naturo, la momenton kiam la natura mondo enterigos la homon. Same estus demandi la psikiatron pri la ekzakta momento, kiam la neŭrozulo transformiĝos en nefunkcian psikozulon. Neesperende estas ricevi respondon al tiela demando. Kompense la ekologiisto povas indiki kelkajn strategiajn gvidosignojn por kompreni la direktojn, en kiuj la homo ŝajnas ekiranta de post sia divorco disde la naturo.

Laŭ la ekologia vidpunkto la homo estas danĝere simpligonta sian medion. La moderna vivo prezentas regresan iompostioman anstataŭigon de tio natura per tio sinteza, de tio organika per tio neorganika (cemento, metalo kaj vitro), anstataŭigon de stimuliloj variaj laŭ ties naturo kaj origino, per krudaj kaj elementaj stimuliloj. La vastaj urbaj zonoj, kiuj daŭre etendiĝas en la industriigitaj regionoj, grave malutilas al la vidado kaj aŭdo ; la nebulo ilin sufokas kaj la trafikŝtopadoj ilin paralizas.

Tiu procezo de simpligo de la medio, kiu tiun igas pli kaj pli elementa kaj kruda, havas signifon ne nur materialan sed ankaŭ kulturan. La neceseco regi egajn urbajn loĝantarojn, transporti, nutri, laborigi, instrui kaj iel distri milionojn da homoj arigitaj sur limigita spaco, kondukas al tre

grava ekfiniĝo de la civitaj kaj sociaj valoroj. Iu amaskoncepto pri la rilatoj inter la homoj kun tendenco al totalismo, centralizado kaj engrupigado forŝovas en la pasintecon la individuajn valorojn. La burokrataj teknikoj de socia administrado tendencas anstataŭi la humanismajn metodojn. Ĉio, kio estas spontaneco, kreiveco, individueco, estas ĉirkaŭbarita per tio, kio estas normigita, kondiĉita, masigita. La spaco atribuita al la individuo estas senĉese ronĝata per la limigoj trudataj de socia aparato nepersona kaj senvizaĝa. Ĉio, kio estas la unikeca kvalito de la persono, troviĝas pli kaj pli strikte submetita, por esti agnoskita, al la kontrolo de la plej eta komuna denominatoro de la amaso. Oni traktas la homon samkiel en formikejo, laŭ maniero kvanta, statistika, domaĝe al ĉia esplormaniero emfazanta la individuan unikecon, la liberan esprimon kaj la kulturan riĉecon.

La sama regresa simpligo de la medio efektiviĝas en la agrokulturo. Tiun manipulatan loĝantaron de la modernaj urboj oni devas nutri, kaj tio implicas plivastiĝon de la industria agrokulturo. La nutraj plantoj devas esti tiel kultivataj, ke ebliĝu maksimuma meĥanizado - ne por redukti la penon de l'homoj, sed por pliigi la efikecon kaj produktivecon, por igi profitdonaj la investaĵojn, kaj tiel ekspluati la biosferon. Tio implicas ankaŭ la niveladon de la grundo, kiu estos ne pli, se tiel diri, ol uzina planko, kaj oni kiom eble plej reduktos la topografiajn malebenaĵojn. La kreskado de la vegetaloj estos rigore kontrolata, por ke ĝi kongruu kun la strikta planizado de la uzinoj por nutroproduktoj. Plugado, fekundigado, prisemado kaj rikoltado estos faràtaj laŭ la plejeble granda skalo, ofte spite la naturan ekologion de la lando. Oni dediĉos vastajn etendaĵojn al iu sama kultivaĵo, kio favoras la meĥanizadon sed ankaŭ la propagadon de la parazitoj kaj malsanoj. Ĉar kultivejo kun ununura specio estas la ideala medio por iliamultobliĝo. Do, por fronti la problemojn kreitajn de la insektoj, trudherboj kaj plantomalsanoj, oni devos larĝe sin helpi per kemiaj agentoj, por reguligi la produktadon kaj plejigi la ekspluatadon de la grundo. La vera simbolo de la moderna

agrokulturo ne plu estas la falĉileto eĉ ne la traktoro ; ĝi estas la aviadilo. La moderna kultivisto ne plu estas la kamparano eĉ ne la agronomo, kiuj kulturis intiman rilaton kun la apartaj kvalitoj de la grundo, kiun ili kultivis ; li estas la piloto aŭ la kemiisto, por kiu la grundo estas nur simpla kruda materialo minerala. La simpligoprocezo estas eĉ pligravigita per la ekscesoj en la labordivido sur la kampo regiona kaj eĉ nacia. Pli kaj pli vastaj etendaĵoj de la planedo estas dediĉitaj al industriaj funkcioj pli kaj pli specialigitaj, aŭ reduktitaj al deponejoj por krudaj materialoj. Aliaj plu estas nur urbaj centroj esence dediĉitaj al la interŝanĝoj. Urboj kaj regionoj, eĉ landoj kaj tutaj kontinentoj estas signitaj per specifaj produktoj : Pitsburgo, Klevlando kaj Youngstown estas la ŝtalo ; Novjorko estas la financo ; Bolivio, la stano ; Arabio, la petrolo ; Eŭropo kaj Usono, la manufakturaĵoj ; la cetera mondo estas la krudaj materialoj de ia aŭ tia tipo. La kompleksaj eko-sistemoj, kiuj konsistigas la diversajn regionojn de la kontinentoj malaperas sub organizado, kiu faras el tutaj nacioj raciigitajn ekonomiajn entojn, simplajn etapojn de la planeda produktoĉeno. Post paso de pli-malpli mallonga tempo la plej allogaj kamparoj subfalos sub la betonilo, samkiel la plej granda parto de la Usona marbordo jam plu estas nur terpartiĝoj kaj pavilonaj zonoj. Kio restos el la naturaj belaĵoj, tio estos tute difektita per la barakurbaĉoj el tendoj kaj ruldomoj, per la turistaj aŭtovojoj, moteloj, restoracioj kaj la mazutaj etendaĵoj de la motorboatoj.

La plej grava fakto estas, ke la homo estas malfaranta la laboraĵon de la vivevoluado. Kreante vastajn domarojn el cemento, metalo kaj vitro, ruinigante aŭ minante la kompleksajn kaj subtilajn eko-sistemojn, kiuj konsistigas la tutan lokan diversecon de la natura mondo, unuvorte anstataŭigante organikan kaj kompleksan medion per medio neorganika kaj simpligita, la homo estas malmuntanta la biotikan° piramidon, kiu lin portis dum nenombr-

------

° biotika = kiu koncernas la vivantajn estaĵojn.

eblaj miljaroj. Kiam li anstataŭigas la kompleksajn ekologiajn interligojn, de kiuj dependas ĉiuj superaj vivantaj estaĵoj, per interligoj pli elementaj, la homo iom post iom kondukas la biosferon al stadio, kiu ne plu ebligos la pluvivon de multe pli simplaj vivantaj estaĵoj. Se tiu granda renverso devus daŭri plu, estas neniel fantazie pensi, ke la kondiĉoj, kiuj ebligas la superajn formojn de vivo, estus por ĉiam detruitaj, kaj ke la tero ne plu estus kapabla sekurigi la pluvivon de la homa specio.

Kio donas al ekologio ties kritikecan efikon, tio ne estas nure, ĉar ĝi estas la sola el ĉiuj sciencoj, kiu adresas al la homaro tiun teruran averton ; tio estas ankaŭ la socia situacio, en kiun enmetiĝas tia mesaĝo. Laŭ la vidpunkto ekologia la renverso de la ekologia evoluo rezultas el fortaj kontraŭecoj, kiuj kontraŭigas la urbon al la kamparo, la ŝtaton al la kolektivo, la industrion al la agrikulturo, la seriproduktadon al la metiista produktado, la centralizismon al la regionismo, la burokratan skalon al la skalo homa.

## Ekologio kaj rekonstruo de la socio.

Freŝdataj penoj por solvi la kontraŭecojn generitajn de la urbanizado, centralizado, burokratizado kaj ŝtatismo, montriĝis kiel vanaj baradoj kontraŭ la "progreso" kaj oni ilin kvalifikis ĥimeraj kaj reakciaj. Oni rigardis la anarkiiston forvaganta viziulo, socia renegato, al la vilaĝo kaj mezepoka civito sopiranta. Kiu aspiris al malcentralizita socio, al humanisma komunumo harmonianta kun la naturo kaj la bezonoj de la individuo - la individuo spontana, ne submetita al la aŭtoritato - tiu povus esti nur romantikulo, elklasiĝinta metiisto aŭ "neadaptiĝinta" intelektulo. La denunco kontraŭ la ŝtatismo kaj la centralizado ŝajnis tiom malpli konvinka, ke ĝi baziĝis esence sur etikaj konsideroj, sur utopia, "nerealista" koncepto pri tio, kio povus esti la homo, kaj ne pri tio, kio li estas. Al tiaj denuncoj la kontraŭuloj de la anarkiisma penso - la liberaluloj, la dekstro kaj la aŭtoritata maldekstro - rebatis, aroge pretendante esti la voĉo de la historia realeco kaj bazi siajn ŝtatismajn kaj centralizismajn konceptojn sur la mondo

de objektiveco kaj praktiko.

La tempo ne estas indulga por la idearaj bataloj. Kia ajn estis antaŭ kelkaj jaroj la valoro de la libereca kaj nelibereca tezoj, la historia evoluo igis sensignifaj preskaŭ ĉiujn argumentojn kontraŭ la anarkiismaj ideoj. La moderna urbo kaj la ŝtato, la amasteknologio bazita sur la karbo kaj ŝtalo kaj heredita de la Industria Revolucio, la pli novaj kaj pli raciigitaj sistemoj de seriproduktado kun labororganizado regata de la ĉeno, la centralizita nacio, la burokrata maŝino - ĉio ĉi atingis sian limon. Kia ajn estis la progresiga aŭ liberiga rolo de tiuj historiaj produktoj, tiuj nun plu estas nur regresaj kaj premantaj. Regresaj ne nur ĉar ili stultigas la homojn kaj senigas la kolektivon je ĉiuj ties valoroj solidarecaj, koheremaj, moralaj kaj kulturaj ; sed ankaŭ laŭ objektiva, ekologia vidpunkto. Ĉar ili ne nur malnobligas la spiriton de la homoj kaj de la socio, sed ankaŭ ĉar ili atakas la vivipovecon de la planedo kaj la pluvivadon de ĉiuj estaĵoj.

Oni ne tro substrekos, ke la anarkiismaj konceptoj pri ekvilibraj komunumoj, rekta demokratio, teknologio en la servo de l'homo, malcentralizita socio, estas ne nur dezirindaj sed ankaŭ necesaj. Pro la socievoluo tiuj liberecaj ideoj perdis sian etikan kaj subjektivan karakteron kaj de nun apartenas al la mondo de objektiveco kaj praktiko. Kio estis antaŭ nelonge vizia kaj nerealigebla, de nun estas tio, kies realigo plej urĝas. Kontraŭe, kio estis konsiderata kiel la sfero de la praktiko kaj objektiveco iĝis absolute nepraktikebla kaj netaŭga por sekurigi la disvolviĝon de l'homo en la direkto al pli granda disflorado kaj pli granda libereco. La liberecaj ideoj havas de nun fortajn argumentojn valorigendajn por postuli sian aplikadon.

La vigleco de la "ne", kiun tiuj ideoj kontraŭmetas al la nuntempaj vivkondiĉoj, klarigas la fulmsubitan sukceson inter la hodiaŭa junularo de speco de intuicia anarkiismo. La amo de tiu junularo al la naturo estas reago kontraŭ la sinteza urbo kaj ties

mornaj produktoj. Ĝiaj neformalemaj vestoj kaj manieroj esprimas la rifuzon pri formalismo, normigo kaj instituciigo de la moderna ekzistado. Ĝia inklino al la rekta agado opozicias al la burokratizado kaj centralizado de la socio. Ĝia tendenco vivi marĝene, eviti la laboron kaj karierismon, esprimas kreskantan rankoron kontraŭ la brutigan rutinon disvolvitan de la amasproduktado ĉe la uzino, oficejo aŭ universitato. Ĝia ekstrema individuismo elemente konsistigas faktan malcentralizadon de la socia vivo : la persono retiriĝas for de la amaso.

La plej riĉa alportaĵo de ekologio sidas en ties povo transformi tiun ofte nihilisman rifuzon pri la nuntempa situacio en viglan manifestadon de la vivo, en programon por rekonstruo de la socio sur humanismaj bazoj. Kaj tiu pozitiva mesaĝo de ekologio povas resumiĝi en unu sola vorto : "diverseco". Laŭ ekologio, realiĝon de la ekvilibro kaj harmonio en la naturo, la socio kaj sekve en la kondutado, ebligas la organika diferencigo - kaj ne ĝia malo, la meĥanika normigo. Ni klarigu tiun tezon, ekzamenante ties praktikajn implicojn.

Kaj por komenci, ni vidu kion signifas la principo de diverseco - kiun Karlo Elton nomas "konservo de la varieco" - kiam oni ĝin aplikas al la biologio kaj pli precize al la agrikulturo. La esploro en tiu sfero iras de la matematika modelo de Lotka kaj Volterra ĝis la surterenaj fundaj enketoj, sen forgesi tiajn eksperimentojn kiel tiujn de Bause pri protozooj kaj tineoj en kontrolitaj medioj. Ili klare demonstras, ke la fluktuadoj de la animalaj kaj vegetalaj populacioj, de la etaj kvantoj ĝis la parazitaraj kvantoj, esence dependas de la nombro de la specioj, el kiuj konsistas la konsiderata eko-sistemo, kaj de la pli-malpli granda diverseco de la medio. Ju pli granda estas la varieco de la predoj kaj predantoj, des pli stabila estas la populacio ; ju pli la medio estas diversfaŭna kaj diversflaŭra, des malpli riskas okazi ekologia malekvilibro. La stabileco dependas de la varieco kaj diverseco : tuj kiam intervenas simpligo de la medio kaj malpliiĝo de la varieco de la animalaj kaj vegetalaj specioj, la fluktuadoj de la populacioj

intensiĝas, eskapas la reguligajn meĥanismojn kaj tendencas favori multobliĝon de la parazitoj.

Koncerne la batalon kontraŭ la parazitoj, multaj ekologiistoj opinias, ke oni povus eviti ripetitan uzadon de tiaj toksaj kemiaj produktaĵoj kiel herbicidoj kaj insekticidoj, lasante pli libere agi la naturajn vivofortojn. Oni devus konsenti pli da ebloj al la natura spontaneco, al la diversaj biologiaj fortoj, kiuj konsistigas donitan ekologian staton. "Eŭropaj entomologoj nun projektas kontroli la tutecon de la ensemblo plantoj-insektoj", notas Robert L. Rudd. "Tion oni nomas manipulado de la biocenozo* (2). La biocenoza medio estas varia, kompleksa kaj dinamika. Kvankam la individuaj varioj estas multnombraj, neniu specio normale disvolviĝos ĝis fariĝi parazitaro. La apartaj kondiĉoj, kiuj ebligas la multobliĝon de unu sola specio tre malofte kuniĝas en unu kompleksa eko-sistemo. Eĉ se tio estas tre malfacila, ni devus celadi al la kontrolo de la biocenozo aŭ de la eko-sistemo".(3)

Bonefike "manipuli" la biocenozon tamen antaŭsupozigas tre disvolvitan malcentralizadon de la agrokulturo. Ĉie, kie eblas, la industria agrokulturo cedu la lokon al vera ekonomio pri la grundo kaj kultivejoj. La uzina planko iĝos legom- kaj florĝardeno. Per tio mi ne volas diri, ke ni devus forlasi

-------

* biocenozo : asocio de animaloj kaj vegetaĵoj, kiuj ekvilibre vivas en donita medio.

(2)La uzo fare de Rudd de la vorto "manipulado" riskas doni la eraran impreson, ke oni raportas pri ekologia situacio per terminoj pure meĥanikaj. Mi insistas pri tiu fakto, ke la sciado, kiun ni povas akiri pri ekologia situacio, kaj la praktika utiligado, kiun oni povas fari el tiu sciado, estas aferoj de subtileco kaj ne de potenco. Tion tre bone esprimas Charles Elton, kiam li skribas : "Estas necese direkti la mondan estontecon, sed ne kiel ŝakpartion, prefere kiel boaton."

(3)Robert L. Rudd, Pesticides : The Real Peril (Pesticidoj : La reala danĝero). The Nation, vol. 189, 1959, p. 401.

ĉiujn akiraĵojn de la grandskala kultivado kaj de la meĥanizado. Sed mi insistas, ke konvenas kultivi la kampojn, kvazaŭ ili estus ĝardeno kun flaŭro diversa kaj bone zorgata, ekvilibrigita per faŭno kaj ŝirmejo el arboj adaptitaj al la regiono. Krome, la malcentralizado estas multvalora ne nur por la disvolviĝo de la agrikulturo, sed ankaŭ por tiu de la agrikulturisto. Praktikate kun aŭtenta ekologia spirito, la nutra kultivado antaŭsupozigas ĉe la kultivisto precizan konon de ĉiuj apartaĵoj de la grundo, kiun li prilaboras, de la fizika geografio de la lando, de ties diversaj grundoj - tiuj taŭgaj por la kulturoj, por la arbaro, por la paŝtejoj - de ties mikro-klimatoj, kaj daŭran studadon de la efiko rezultanta de la nove enkondukitaj animaloj kaj vegetaĵoj. Li devos iĝi tre sensiva por la eblecoj kaj bezonoj de la grundo ĝis tio, ke li mem iĝos vivanta elemento en la agrikultura tuto. Oni ne esperu, ke la agrikulturisto atingos tian nivelon de sensiveco kaj integriĝo, se oni ne restarigos laŭ homa skalo la agrikulturon, se tiu restos super la mezuro de la individuo. Por respondi al la ekologiaj postuloj koncerne agrikulturon, oni denove starigu kulturejojn kun mezaj dimensioj.

La sama rezonado aplikiĝas al la disvolvado de la energidonaj riĉofontoj. La Industria Revolucio kreskigis la kvanton da energio uzata de la homo. Ja estas vero, ke la antaŭindustriaj socioj uzis esence la animalan energion kaj la homan muskolan forton. Sed en multaj eŭropaj regionoj, finpretigitaj kompleksaj sistemoj por energiproduktado subtile integris diversajn energifontojn tiajn, kiel la venton kaj la akvofluojn, kaj ankaŭ tutan gamon da brulaĵoj - ligno, torfo, karbo, vegetalaj sukoj kaj animalaj grasoj.

La Industria Revolucio balais kaj grandparte detruis tiujn lokajn energidonajn sistemojn, por ilin anstataŭigi unue per sistemo kun unu sola elemento, la karbo kaj la petrolo. La regiono malaperis kiel integrita energidona sistemo - fakte estas la koncepto mem pri integriĝo en la diverseco, kiu troviĝis kaduka. Kiel ni ĝin indikis ĉi-supre, multnombraj regionoj sin dediĉis esence al la mino, limiĝante al la ekspluatado de unu sola riĉofonto, dum aliaj estis konvertitaj en vastajn industriajn zonojn ofte speci-

aligitajn por malgranda nombro da produktaĵoj. Neniel necesas revui la malbonegajn efikojn de tia disfalo de la regionaj strukturoj favora al la aera kaj akva poluado, de la ruinigo de vastaj kamparaj etendaĵoj kaj de la baldaŭa elĉerpiĝo de niaj alte ŝatataj hidrokarbidoj.

Oni povus evidente sin helpi per la nukleaj brulaĵoj, sed oni terurtremas ĉe la sola penso pri la amaso da mortigaj radioaktivaj ruboj, kiuj estus elĵetendaj, se la nukleaj reaktoroj iĝus la ununura fonto de energiproduktado. Post tempopaso, energidona sistemo bazita sur la radioaktivaj substancoj sekvigus kvazaŭ ĝeneralan infektadon de la medio unue insidan, poste masivan kaj kaŭzantan videblajn detruojn. La alia rimedo estas aplikado de la ekologiaj principoj al la solvo de la prienergiaj problemoj, revivigo de la malnovaj energidonaj sistemoj regionaj, kiuj integras diversajn fontojn tiajn kiel la eola, hidraŭlika kaj suna energioj. Kaj por tio ni hodiaŭ disponas procedojn multe pli diversajn ol en la pasinteco.

La sunaj kaptaparatoj kaj ĉeloj, la ventoturbinoj kaj la forto hidroelektra izole uzataj ne povas solvi la prienergiajn problemojn nek la ekologian malekvilibron rezultantajn el la uzado de klasikaj brulaĵoj. Sed se oni interkombinas ilin por konsistigi energidonan sistemon organike disvolvitan dank'al regionaj riĉofontoj, ili povas larĝe sufiĉi por la bezonoj de malcentralizita socio. Ĉe la sunriĉaj latitudoj oni kalkulus pli kun la sunenergio ol kun la brulaĵoj. En la regionoj kun forta atmosfera tumulto la ventomotoroj povus konsistigi la ĉefan elementon ; oni uzus hidroelektron precipe sur la marbordoj por tio taŭgaj kaj en la riverriĉaj regionoj. Ĉiuokaze oni utiligus veran mozaikon el ne brulivaj energifontoj, kaj la klasikajn aŭ nukleajn brulaĵojn por ŝtopi la breĉojn. Kaj oni povas esperi, ke pli poste la procedoj por senbrulaj energifontoj estos sufiĉe perfektigitaj, por ke oni povu tute seniĝi je danĝeraj energidonaj riĉofontoj.

Sed, kiel por la agrikulturo, la aplikado de la

ekologiaj principoj al la energidona sfero antaŭsupozigas malproksime pelatan malcentralizadon de la socio kaj aŭtente regionisman koncepton pri la socia organizado. La funkciado de grandurbo neprigas egajn kvantojn da karbo kaj petrolo. Male, la energio suna, venta kaj tajda alvenas al ni nur dise ; escepte de kelkaj spektindaj uzinoj tajdomovaj, la uzeblaj procedoj liveras samtempe ne multe pli ol kelkajn milojn da horkiloŭatoj de elektro. Estas malmulte probable, ke oni iam realigos sunajn kaptaparatojn kapablajn liveri tiom da elektro kiel granda termika centralo ; oni same malbone imagas baterion el ventomotoroj, kiu kapablus lumigi la insulon Manhattan. Se la domoj kaj uzinoj restos koncentritaj, la meĥanismoj ebligantaj produkti puran energion restos "gaĝetoj" *. Sed se oni reduktus la dimension de la urbaj komunumoj kaj se oni larĝe ilin dislokus sur la teritorio, nenio kontraŭiĝus al kombinado de tiuj diversaj procedoj tiel, ke ili estus kapablaj liveri al ni ĉiujn avantaĝojn de la industria civilizacio. La efika utiligado de la suno, vento, tajdoj kaj riveroj neprigas dismembrigon de la "megalopolis" **. Nova tipo de komunumo zorge adaptita al la apartaĵoj kaj riĉofontoj de la regiono devas anstataŭi la tentaklajn domaregojn, kiujn ni konas.

Pledo favora al malcentralizado ja ne povas limiĝi al analizo de la agrikulturaj kaj prienergiaj problemoj. La saman demonstradon oni povas fari por preskaŭ ĉiuj niaepokaj "loĝistikaj" problemoj. Ni prenu por ekzemplo la transportojn. Oni skribis volumojn pri la pereigaj efikoj de la benzinvehikloj, pri la malŝparoj, kiujn ili sekvigas, pri ilia respondeco en la atmosfera poluado de la urboj, pri la bruo, kiun ili okazigas, pri la enormeco de la tributo el mortoj ĉiujare pagata en la urboj kaj sur la aŭtoŝoseoj. En superurbanizita civilizacio, estus vane pensi anstataŭigi tiujn nocajn vehiklojn per vehikloj kun baterioj el

-------

* gaĝetoj : senutilaj umoj, amuzaĵoj.
** megalopolis : giganta urbo.

akumulatoroj, kiuj estas puraj, efikaj, preskaŭ silentaj kaj certe malpli danĝeraj ; la plej perfektigitaj el la elektraj veturiloj bezonas reŝargi siajn akumulatorojn proksimume ĉiujn cent kvindek kilometrojn, kio ekskluzivas ilian ĝeneralan uzadon en la grandurboj; Kontraŭe, en malcentralizita domaro kun reduktitaj dimensioj, la elektraj vehikloj perfekte taŭgus por la urbaj kaj eĉ regionaj transportoj.

Hodiaŭ, neniu plu ignoras, ke la benzinvehikloj ege kontribuas al la poluado de la urbaero kaj oni aktive serĉas teknikajn procedojn, kiuj ebligus forgesi la plej nocajn flankojn de l'aŭtomobilo. Nia epoko karakteriziĝas per tio, ke ĝi penas solvi per vanaj artifikoj ĉiujn malraciaĵojn, kiujn ĝi generas : bruliloj por ellasogasoj, antibiotikoj aŭ trankviligiloj. Sed ne per artifikoj oni solvos la problemon de atmosfera poluado. La fundamenta kaŭzo de la atmosfera poluado estas la alta koncentriteco de la loĝantaro, ĝi estas la koncentrado de tro granda nombro da homoj en tro malvasta spaco. Milionoj da homoj amasigitaj en urbo necese generas gravan lokan poluadon, eĉ se nur per iliaj ĉiutagaj aktivecoj. Ili devas uzi brulaĵojn en sia domo kaj en sia laborejo ; starigi aŭ detrui konstruaĵojn (la polvoj eligataj el tiuj laboroj grandparte kaŭzas la aerpoluon) ; elĵeti kvantegojn da ruboj, cirkuli sur la vojoj per vehikloj kun pneŭoj (la eretoj produktitaj de la pneŭa eluziĝo kaj de la voja tegaĵo estas atentinda faktoro de poluado). Kiaj ajn estos la kontraŭpoluaj aranĝoj, kiujn oni adaptos al la veturiloj kaj uzinoj, estas klare ke la pliboniĝoj de ili alportitaj al la aerkvalito estos nuligitaj kaj eĉ pli per la estonta kreskado de la "megalopolis".

Anarkiismo ne limiĝas al la malcentralizado de la homaj grupoj. Se mi iom detale ekzamenis ĉi tiun flankon, tio estas por montri, ke anarkiista socio ne estas idealo perdita en la pratempoj, sed iĝis la necese antaŭa kondiĉo por la ekpraktiko de la ekologiaj principoj. Ni resumu la kritikecan mesaĝon de ekologio : se oni reduktas la variecon de la natura mondo, oni endanĝerigas ties unuecon ; oni de-

truas la fortojn nemalhaveblajn por la harmonio kaj daŭra ekvilibro de la naturo, kaj kio estas eĉ pli grava, oni direktas la evoluon de la natura mondo al procezo de absoluta regreso, kiu post tempopaso riskas igi la medion netaŭga por la superaj formoj de la vivo. Ni ankaŭ resumu ĝian pozitivan mesaĝon: se oni deziras progresigi la unuecon kaj stabilecon de la natura mondo kaj ankaŭ ties harmonion, endas antaŭŝirmi kaj disvolvi la variecon. Estas ja certe, ke serĉi la variecon por la varieco havas nemulte da senco. En la naturo la varieco spontane generiĝas. La vivkapablo de nova specio estas provita de la klimata akreco, de ĝia kapableco rezisti al la pred-antoj kaj de ĝiaj eblecoj establi kaj pliriĉigi sian ekologian vivejon. Sed la specio, kiu sukcesas pli-riĉigi sian vivejon en la medio, same pliriĉigas la ekologian staton de la ensemblo. Laŭ la esprimo de E.A. Gutkind, ĝi "kontribuas al la plivastiĝo de la medio" (4), same por si mem kiel por la specioj kun kiuj ĝi havas ekvilibrajn rilatojn.

Kiel tiuj konceptoj aplikiĝas al la socia teorio? Multaj legantoj kontentiĝus, mi kredas, per la ideo ke, ĉar la homo estas parto de la naturo, natura plivastiĝanta medio liveras pli riĉan fundamenton al la disvolviĝo de la socio. Fakte, la respondo al tiu demando situas ĉe pli profunda nivelo ol ĝin ofte kredas la ekologiistoj kaj la liberecanoj. Ni revenu al la ekologia principo, laŭ kiu unueco kaj ekvilibro rezultas el diverseco, kaj ni referencu pecon de la libro de Herbert Read pri "La filozofio de anarkiis-mo", kiu liveros al ni unuan elementon de respondo. Por enkonduki sian koncepton pri "mezuro de l'pro-greso", Read skribis : "La progreso mezuriĝas per la grado de interna diferencigo de iu socio. Se la in-dividuo estos nur la baza unuo de integrita amaso, lia ekzistado estos strikta, morna kaj meĥanika. Se la individuo konsistigas unuon por si mem kaj dispo-nas spacon kaj eblecojn por persona agado, li eble estos pli elmetita al la akcidentoj kaj sortobatoj, sed li povos almenaŭ sin disvolvi kaj esprimi. Li

-------

(4) E.A. Gutkind, Le crépuscule des villes (La krepusko de la urboj), trad. G. Montfort, Parizo 1966.

povos disvolvi sin en la vera senco de la termino, disvolvi la konscion, kiun li havas pri sia forto, pri sia vivpleneco, pri sia ĝojo.

Bedaŭrinde la penso de Read ne estas plene disvolvita, sed ĝi konsistigas interesan deirpunkton. Kio ĉefe impresas, estas tio, ke la ekologiisto kiel la anarkiisto forte insistas pri la spontaneco. La ekologiisto, en la mezuro kiel li ne estas nur simpla teknikisto, emas malakcepti la nocion pri "povo super la naturo". Li preferas paroli pri tio : "trabati al si vojon" en donita ekologia situacio, kontroli eko-sistemon prefere ol ĝin rekrei. Siaflanke la anarkiisto parolas pri socia spontaneco ; li aspiras pri liberiĝo de la sociaj kaj homaraj kapabloj, pri liberiĝo de la homa spontaneco. Unu kaj alia, ĉiu laŭ sia vidpunkto, konsideras la aŭtoritaton kiel inhibicion, kiel pezaĵon, kiu limigas la kreivon same de la naturo kiel de la socio. Ilia celo ne estas regi super tia aŭ alia sfero, sed tiun liberigi. Ili konsideras la intuicion, la racion kaj la sciadon kiel rimedojn ebligantajn realigi la eblecojn de iu situacio, plene disvolvi la logikon de tiu situacio, sed ne anstataŭigi tiun eblon per antaŭjuĝoj kaj falsi ties evoluon nome de dogmoj.

Evidentiĝas el la citaĵo de Read, ke la ekologiisto kaj la anarkiisto ambaŭ konsideras la diferencigon kiel signon de progreso. La ekologiisto uzas la esprimon "biotika piramido" por paroli pri la biologia progreso ; la anarkiisto, la vorton "disindividuigo" por karakterizi la socian progreson. Se oni pli malproksimen pelas la ideon de Read, oni konstatas, ke, por la anarkiisto samkiel por la ekologiisto, kreskanta diversiĝo generas pli fortan unuon. La disvolviĝo de la tuteco realiĝas dank'al la diversiĝo kaj pliriĉiĝo de ties partoj.

Kiel la ekologiisto penas diversigi la eko-sistemon kaj favoras la interspecian ludon, same la anarkiisto celas diversigi la socian vivon kaj elimini ĉiujn malhelpojn, kiuj kontraŭiĝas al ĝia disvolviĝo. Anarkiismo ne estas nur senŝtata socio ; ĝi estas ankaŭ socio harmonia, kiu elmetas la homon al la variaj stimuliloj de la agrara vivo kaj de la

vivo urba, de la aktiveco fizika kaj intelekta, de la volupteco kaj de la spiriteco, kiu vekas la solidarecon samkiel la personan disvolviĝon, la regionan specifecon samkiel la memdisciplinon, kiu forigas la penigan laboron kaj donas novan impulson al la metiista laboro. Por nia skizofrenia socio ĉi tiuj celoj ekskluzivas unu la alian. Kio igas ilin aspekti kiel antagonistaj paroj, tio estas la nuna socia strukturo, la disiĝo inter la urbo kaj la kamparo, la specialigo de l'laboro, la atomigo de l' homo. Kaj estus ja vante pensi, ke oni povas solvi tiajn kontraŭecojn sen havi tutampleksan koncepton pri la materiala strukturo de la anarkiisma socio. Oni ja trovas ian prezenton de tia socio en la "Novaĵoj el nenie" de William Morris kaj en la skribaĵoj de Petro Kropotkin. Sed ili estas nur rapidaj skizoj. Tiuj aŭtoroj ne povis antaŭpercepti la teknologiajn renversojn, kiuj sekvis la duan mondmiliton, nek la alporton de ekologio. Mia intenco ne estas entrepreni ĉi tie priutopiajn priskribojn, sed nur evidentigi kelkajn gvidliniojn, kiuj elstaras el tiu ĝenerala analizo. Kaj tion farante, mi nepre insistas ne nur pri la ekologiaj principoj, kiuj ilin kreas, sed ankaŭ pri la principoj humanismaj.

Se gravas, ke la anarkiisma socio estu malcentralizita, tio ne estas nur por establi daŭre harmoniajn rilatojn inter la homo kaj la naturo ; ĝi estas ankaŭ por doni novan gravecon al la interhoma harmonio. La Grekoj, oni ofte tion rememorigas, estus rigardintaj kun hororo iun civiton, kiu estus per sia spaca kaj nombra gigantismo malebliginta ĉian personan kaj eĉ familian rilaton inter siaj civitanoj. Redukti la dimensiojn de la homaj komunumoj estas elementa necesaĵo, unue por solvi la problemojn pri poluado kaj transporto, poste por krei verajn komunumojn. Iasence ni devas humanigi la homaron. La interhomaj rilatoj devus efektiviĝi kiel malplej eble per elektronikaj aparatoj kiel telefono, telegrafo, radio kaj televido. Dum la ellaborado de la kolektivaj decidoj - la "ecclesia"* de la antikva Ateno estas pri tio modelo - estas grave, ke ĉiuj komunumanoj povu

------

* ecclesia : latinaĵo = asembleo.

ĝisfunde taksi kiun ajn, kiu intervenas en la asembleo. Tiucele endas, ke ili havu la eblojn studi liajn sintenojn kaj esprimojn, kaj pesi tiom liajn motivojn kiom liajn ideojn ; do endas, ke okazo estu al ili donita renkontiĝi kaj vizaĝo kontraŭ vizaĝo diskuti.

Tiaj reduktitaj komunumoj havus ekvilibran kaj diversan ekonomion, unuflanke por plene utiligi la krudajn materialojn kaj la lokajn energifontojn, aliflanke por pliriĉigi la agrikulturan kaj industrian sperton de siaj membroj ; tiel ke, kiu inklinas al la meĥaniko estu kuraĝigita enprofundigi siajn manojn en la kulturkampon, la intelektulo ekzerci siajn muskolojn, la "naskita" kamparano familiariĝi kun la funkciado de laminatilo. Disigi la inĝenieron disde la tero, la intelektulon disde la ŝpato kaj la kamparano disde la metiejo, sekvigas profesian superspecialiĝon, kiu danĝere favoras la povokapton fare de la specialistoj. Alia grava konsekvenco de la specialiĝo estas, ke ĝi malebligas al la socio atingi esencan celon : la homecigon de la naturo fare de la tekniko kaj la naturigadon de la socio fare de la biologio.

Tia anarkiisma komunumo proksimiĝus, kredas mi, al perfekte analizebla eko-sistemo ; ĝi estus diversa, ekvilibra kaj harmonia. Oni povas diskuti por scii, ĉu tia eko-sistemo devus ricevi la formon de urba ento kun nete situanta centro kiel la greka civito aŭ la mezepoka komunumo, aŭ se, kiel ĝin sugestas Gutkind, la socio prefere konsistus el disaj grupoj sen difinita centro. Ĉiele, la ekologia skalo de tiaj komunumoj estus determinita de la plej eta eko-sistemo kapabla vivteni loĝantaron kun modera dimensio.

Komunumo, kiu estus en granda mezuro memsufiĉa, evidente ligita al sia medio por siaj vivrimedoj, akirus novan respekton por la organikaj interrilatoj de kiuj ĝi dependus. Mi estas persvadita, ke la serĉado de relativa memsufiĉo havus post longa tempopaso pli grandan ekonomian efikecon ol la ekscesa labordivido, kiu hodiaŭ precipas. Eble estus multaj industrioj, kiuj ripetiĝus de unu komunumo al alia ; sed

la familiareco de ĉiu grupo kun sia aparta medio ebligus al ĝi pli inteligente kaj pli ame uzi sian medion. Mi opinias, ke, anstataŭ generi la provincanismon, la relativa memsufiĉo ebligus novan individuan kaj komunuman disvolviĝon ; tiu unuiĝo kun la medio stimulus la komunumon.

La rotacio de la civitanaj, teknikaj kaj profesiaj respondecoj disvolvus la kapablojn de la individuo, malfermante novajn perspektivojn al la persona disflorado. Oni povas opinii, ke harmonia socio naskos homon harmonian, kompletan. En la okcidenta mondo la Atenanoj, malgraŭ siaj difektoj kaj limigoj, kiel unuaj pripensis tiun nocion pri kompleteco. "La 'polis' * , skribis H.D.F. Kitto, estis farita por la diletanto. Ĝia ideala celo estis, ke ĉiuj civitanoj (pli-malpli grandnombre laŭ tio, ĉu la 'polis' estis demokrata aŭ oligarkia) ludu sian rolon en ĉiuj ĝiaj multaj aktivecoj, idealo, kiu devenas de la homera koncepto pri la 'arètè', majstreco en ĉiuj sferoj kaj aktiveco harmonia kaj kompleta. La 'arètè' implicas respekton al la tuteco de la vivo kaj de ties unueco, kaj konsekvence malŝatas ĉian specialiĝon, ĉian efikecon. Aŭ pliĝuste ĝi havas multe pli altan koncepton pri efikeco ; efikeco, kiu ne kuŝas en aparta vivaspekto, sed en la vivo mem" (5). Anarkiisma socio havus idealon certe pli vastan, sed ne malpli altan.

Se ekologia komunumo iam realiĝos, la socia vivo naskos subtilan diversiĝon same de la homa mondo kiel de la natura mondo, kaj tiujn unuigos en harmonia kaj ekvilibra tuto. De la loka komunumo ĝis la regiono kaj la tutaj kontinentoj, oni ĉeestos buntan diferencigon de la homgrupoj kaj eko-sistemoj, ĉiu disvolvanta siajn unikecajn eblojn kaj elmetanta siajn membrojn al larĝa gamo de ekonomiaj, kulturaj kaj psikologiaj stimuliloj. La homgrupoj prezentos pasiigan variecon ofte intense kontrastan laŭ tio, ĉu ili devos adapti sian arkitekturon kaj siajn industriojn al duonakvaj, herbejaj, arbaraj ekosistemoj...

La spirita inklino, kiu hodiaŭ organizas laŭ hie-

-------

* polis = urbo.

(5)H.D.F. Kitto, The Greeks (La Grekoj), Ĉikago 1951, p.16

rarkiaj kriterioj la diferencojn inter la homoj kaj la aliaj vivestaĵoj, kaj difinas la aliulon per terminoj kun signifo de "supereco" aŭ "malsupereco", anstataŭiĝos per ekologia esploro de la diverseco. Oni respektos kaj oni eĉ pliriĉigos la interindividuajn diferencojn. La tradicia rilato, kiu kontraŭigas la "subjekton" al la "objekto" esence transformiĝos ; la "eksterulo", la "diferenculo", la "alia", estos perceptataj kiel partoj de tuto, kiu estas tiom pli riĉa, ke ĝi estas pli kompleksa. Tiu nova senco de la unueco esprimos harmonion de interesoj inter la individuoj kaj inter la socio kaj la naturo. Liberigita de la rutino, de la subpremoj kaj angoroj, kiuj lin paralizas, de la laborpenoj, de la ŝarĝo de falsaj bezonoj, de la katenoj de la aŭtoritato kaj malraciaj devigoj, la individuo fine kapablos unuafoje en la historio realigi siajn eblecojn de membro de la homa komunumo kaj de la natura mondo.

°°°

# POR EKOLOGIA SOCIO

Teksto aperinta en la revuo "Philosophica", vol. XIII, 1974.

La problemo pri difektiĝo de la medio ŝajnas nuntempe subigata al ja stranga distordo. Malgraŭ la plena subteno alportata de la publiko al la rimedoj por defendo de la medio - subteno, kiu manifestiĝis interalie per pozitivaj rezultoj de la referendumoj freŝdate organizitaj en iuj ŝtatoj pri tiuj demandoj - oni timigas nin per opinireago kontraŭ tiuj "ekstremistoj", kiuj, por batali kontraŭ la difektiĝo de la medio, elmetus "revoluciajn" postulojn. Esence, tiu "reago" estas laŭŝajne vekita de la industriistoj kaj de la Blanka Domo, kie S-ro Nixon plenplezure certigas nin, ke "Usono estas baldaŭ gajnonta la militon kontraŭ difektiĝo de la medio kaj paciĝonta kun la naturo". Tiu retoriko vekas malbonajn rememorojn ; ni ekvidas, ĉu ne ? la "tunelekstremon" en la sfero de la medio. Ĉiaokaze, reklamkampanjoj financitaj de la industrioj de petrolo, aŭtomobilo, ligno kaj kemio sammomente invitas la Usonanojn sin montri pli "prudentaj" koncerne la plibonigon de la medio, pesi "kun seriozeco" la "profitojn" kaj la "perdojn", malaltigi la jam de la oficoj por protektado de la medio adoptitajn normojn por senpoluigo de la aero kaj akvo, "kompreni", fine, la imponajn teknikajn problemojn, al kiuj montreme frontas niaj tiel bonintencaj najbaroj: la industriaj kaj servaj monopoloj.

Mia celo ne estas tie ĉi analizi la skandalajn distordojn, per kiuj sin helpas tia propagando. La gazetaro jam eĥis pri la enketo antaŭ nelonge komencita de iu komitato de la Nacia Akademio por Sciencoj, kiu akuzas la aŭtomobilindustrion pri tio, ke - laŭ la vortoj de "New York Times" ĝi sisteme elektis la "rimedojn plej kostajn kaj malplej kontentigajn" por konformiĝi al la normoj federalaj de 1975 pri la ellasogasoj. Koncerne la trompmildan retorikon de la Blanka Domo, la zorgo de S-ro Nixon paciĝi kun la naturo ŝajnas

eĉ malpli urĝa por li ol la zorgo krei pacon ekzemple en Indonezio. Kiel rimarkigas ĉefartikolo en "Times", la deklaro de S-ro Nixon estas "en plena malakordo kun la faktoj... Se veras, ke la aera kvalito pliboniĝas super niaj urboj, tio estas nur per marĝena maniero. La ĉefa parto de la hidrografia reto estas grave poluita. Vastaj zonoj de Atlantiko estas minacataj transformiĝi en mortan maron. La plastoj, lavlikvaĵoj, kemiaj kaj metalaj produktoj neelteneble premas la biosferon. La grundo estas erodata, infektata, venenata, perfortata".

Anstataŭ esti tro "ekstremismaj", multaj postuloj koncerne la medion estas miaopinie ne sufiĉe ekstremismaj. Fronte al socio, kiu ne nur poluas la planedon, sed kiu ankaŭ subfosas siajn proprajn plej esencajn fundamentojn biokemiajn, mi opinias, ke la mediistoj ne starigis la strategian problemon pri la kreado de nova kaj daŭrema ekvilibro kun la naturo. Ĉu oni povas kontentiĝi ie kaj tie per obstaklo al nuklea centralo aŭ al aŭtovojo ? Ĉu ni forgesis jenan esencan fakton : la media difektiĝo havas kaŭzojn multe pli profundajn ol la eraroj aŭ malbonaj intencoj de la industriistoj kaj ŝtato, kaj la senfinaj jeremiadoj pri la apokalipsa minaco, kiun faras al ni la poluado aŭ la industria ekspansio aŭ la demografia kreskado, nur maskas multe pli fundamentan aspekton de la krizo pri la homa kondiĉo, aspekto, kiu ne limiĝas je la teknologio aŭ je la moralaj valoroj, sed kiu estas profunde socia ? Prefere ol komentarii unu fojon plian pri la amplekso de la medio-krizo, aŭ min ĵeti en la facilan denuncon de tio, ke "la poluado estas rentumdona", aŭ igi respondeca pri la tro granda nombro da infanoj mi-ne-scias kiun abstraktan "ni", aŭ tian industrion pro la tro granda nombro da varoj de tia tipo,

mi volus meti la demandon, ĉu la medio-krizo ne enradikiĝas en la origina strukturo mem de la nuntempa socio, kaj ĉu la transformoj implicitaj en la kreado de nova ekvilibro inter la natura mondo kaj la mondo socia ne neprigas restrukturadon fundamentan kaj eĉ revolucian de la socio laŭ la ekologiaj principoj.

Mi volus insisti pri tiuj terminoj : "ekologiaj principoj". Kiam oni penas ektrakti la problemojn de ekologia socio, la vorto, "mediismo" perfidas nin. Tiu vorto spegulas pli kaj pli instrumentan sintenon, kiu konsideras la naturon kiel pasivan loĝlokon, aglomeraĵon el objektoj kaj eksteraj fortoj, kiujn oni igu pli taŭgaj por la homa uzado, sen zorgi pri tio, kio povas esti tia uzado. Fakte la "mediismo" okupiĝas pri la "naturaj riĉofontoj", pri la "urbaj riĉofontoj" kaj eĉ pri la "homaj riĉofontoj". S-ro Nixon, kial ne? povas esti konsiderata kiel speco de "mediisto" en la mezuro kiel la paco, kiun li volas aranĝi kun la naturo, konsistas en akiro de ia "lerteco", kiu ebligas rabi la naturan mondon, minimume perturbante la loĝatan kadron. La "mediismo" ne pridiskutas la kaŝitan en nia nuntempa socio koncepton, laŭ kiu la homo regu la naturon; ĝi male penas favorigi tiun regadon, alĝustigante teknikojn, kiuj limigas la riskojn estigatajn de tiu regado. La nocio mem de regado ne estas pridiskutata.

Laŭ mi, ekologio proponas pli larĝan koncepton pri la naturo kaj pri la rilato inter la homaro kaj la natura mondo. Mi opinias, ke ĝi konsideras la ekvilibron de la biosfero kaj ties integrecon kiel la celon mem. Konvenas kulturi la naturan diversecon, ne nur ĉar ju pli diversaj estas la konsistigaj elementoj de eko-sistemoj, des pli stabila estas tiu eko-sistemo ; sed ankaŭ konvenas strebi al la diverseco por ĝi mem,

kiel al valoro entenata en ia spiriteca prezento de la vivanta universo. La ekologiistoj jam montris, ke ju pli eko-sistemo estas simpligita - la biomoj* de la poluso aŭ de la dezerto, ekzemple, aŭ la monokulturo - des pli ĝi estas fragila, nestabilema, vundebla de la parazitaj invadoj kaj minacata de disfalo. La sinteza koncepto pri "unueco en la diverseco", kiun oni tiel ofte renkontas en la ekologiaj laboroj plej penetremaj, povus esti prunteprenitaj de Hegelo, kaj tio ne estas, laŭ mi, okaza konverĝado, kaj ĝi meritus seriozan studon fare de la nuntempaj nov-hegelanoj. Ekologio krome sugestas la ideon, laŭ kiu la homaro devus konscie respekti la spontanecon de la natura mondo, de tiu mondo ja tro kompleksa kaj tro diversa por esti reduktita al simplaj proprecoj de la mekanika fiziko galilea. Spite iujn ekologiistojn, kiuj reduktas sian studobjekton al analizo de la sistemoj, mi adoptos tiun formuladon de Charles Elton : "Necesas direkti la mondan estontecon, sed ne kiel ŝakpartion; prefere kiel boaton". Endas lasi larĝe drivi la naturan mondon, se oni volas, ke ĝia spontana disvolviĝo rivelu kaj realigu ĝian virtualan riĉecon ; la konscio kaj interveno de la homo certe donas formon al tiu disvolviĝo, sed kvazaŭ por igi la naturon konscia kaj aktiva per si mem. Fine, ekologio allasas nenian hierarkion en la ekosistemo. Ekzistas nek "reĝo de l'animaloj" nek "maleminenta formiko". Ĉio ĉi estas nur projekcioj sur la naturan mondon de niaj propraj mensostatoj kaj de niaj propraj sociaj rilatoj. Fakte, ĉiuj elementoj de la flaŭro kaj faŭno egale rolas en la tenado de la ekvilibro kaj integreco de la tuto.

-------

*biomo : la tuta aro de la specioj vivantaj sur difinita teritorio. "Ekosistemo" estas la "biomo" en ĝia ĉirkaŭa cirkonstancaro : grundo, atmosfero, klimato.

Tiuj konceptoj, arigitaj en tutaĵo, kiun oni povus esprimi per unueco en la diverseco, la spontaneco kaj komplementeco, konsistigas ne nur la konkludojn, al kiuj venis ekologio, tiu "arta scienco" aŭ tiu "scienca arto" (kiel mi nomis ĝin aliloke); ili ankaŭ esprimas sinteze la percepton de nia malrapida emerĝo el arkaika mondo kaj de nia eniro en novan socian cirkonstancaron. La ideo, laŭ kiu la homa destino estas regi la naturon, devenas de la superrego de l'homo super la homo - kaj eble eĉ pli primitive de la superrego de la viro super la virino kaj de la maljunulo super la junulo. La hierarkia mensostato, kiu mem organizas la eksperimenton - sub ĉiuj ties formoj - laŭ la hierarkia kaj piramida maniero, spegulas sur la kampo de la percepto kaj de la konceptivo la formojn de socialeco generitajn de la hierarkia socio. Tia mensostato estas tre malmulte akcentita aŭ eĉ tute ne ekzistanta en la nehierarkiaj kolektivoj. La socioj, kiujn oni nomas primitivaj kaj kiuj baziĝas sur simpla seksa divido de la laboro, sen ŝtato kaj sen hierarkiaj institucioj, ne konsideras la realon samkiel ni, tra filtrilo, kiu klasas la fenomenojn laŭ la terminoj "supera" kaj "malsupera", "super" kaj "sube". Ne konante la neegalecon, tiuj socioj aŭtente organikaj havas eĉ ne unu vorton por nomi la egalecon. Kiel Dorothy Lee notas en sia majstra analizo de la "primitiva" spirito, "egaleco ekzistas en la naturo mem de la aferoj kiel subprodukto de la demokratia strukturo de la kulturo, ne kiel aplikenda principo. En tiuj socioj egaleco ne estas celo, kiun oni penas atingi, kaj fakte la koncepto pri egaleco ne ekzistas. Ofte forestas ĉia lingva meĥanismo, kiu ebligus la komparon. Kion oni observas, tio estas absoluta respekto por la homo, por ĉiuj individuoj, kia ajn estas ilia aĝo aŭ sekso."

Plej bona ekzemplo de la foresto en tiuj civilizoj de la valoroj ebligantaj la trudodevigon kaj la superregon, eble estas tiu de la sintakso de la Indianoj Wintu en Kalifornio, kiujn Dorothy Lee laŭŝajne mem studis en ilia vivloko. La terminoj, per kiuj la modernaj lingvoj ĝenerale esprimas la trudadon, ŝi rimarkas, retroviĝas ĉe la Wintu en frazturnoj,kiuj signas la kunlaboradon. Tiel estas, ke patrino Wintu ne "kondukas" sian bebon ĉe la ombron ; ŝi "iras kun li" ĉe la ombron. Ĉefo ne "direktas" sian popolon; li "staras apud ĝi". Ĉiel, li neniam estas pli ol konsilanto kaj disponas neniam premrimedon por trudi siajn opiniojn. La Wintu, ankaŭ notas Dorothy Lee, "neniam diras kaj fakte ne povus diri kiel ni, "mi havas fratinon", aŭ "filon" aŭ "edzon". "Vivi kun" estas la esprimo, kiun ili kutime uzas por traduki, kion ni nomas posedo, kaj ili ĝin uzas por ĉio, kion ili respektas ; tiel ke oni diras pri viro, ke li vivas kun sia arko kaj siaj sagoj.

"Vivi kun" - tiuj vortoj implicas ne nur profundan senton de reciproka respekto kaj alta estimo por la libera volo de la individuo ; ili implicas ankaŭ potencan kunsenton de la individuo kaj la grupo. Tiu senso por interna unueco de la grupo siavice projekciiĝas en la rilaton inter la kolektivo kaj la natura mondo. En la spirito de la membroj de tiuj organikaj komunumoj ekzistas la konvinko havi influon sur la naturajn fortojn multe pli konsiderindan ol tiun ebligatan de ilia relative rudimenta teknologio, iluzio, kiu baziĝas sur la kolektivaj ritoj kaj magiaj procedoj. Eĉ se tre ellaboritaj, tiuj ritoj kaj procedoj tamen neniam eliminas el tiuj homoj la dependosenton rilate la naturan mondon, la tute apudan medion. Tiu dependosento povas ja generi malnoblan

timon kaj kultadon tute same malnoblan, sed ankaŭ ekzistas tempo en la disvolviĝo de tiuj organikaj socioj, kiam ĝi naskas senton de simbiozo aŭ pli ĝuste de interdependeco kaj kunlaborado, kiu emas transcendi la instinktajn teruron kaj hororon. Je tiu stadio la homoj penas ne nur favorigi al si la naturajn potencojn aŭ ilin manipuli ; sed ili kredas, ke iliaj ritoj efikas kiel kreivaj helpantoj ; tiuj helpas en la multiĝo de la ĉasaĵo, en la ŝanĝoj de la sezonoj kaj vetero, en la kreskado de la rikoltoj. Organika komunumo ĉiam havas naturan dimension ; sed je la stadio, pri kiu ni parolas, la komunumo sin konceptas kiel parton de la natura ekvilibro - komunumo de la arbaro aŭ komunumo de la tero - resume, komunumo aŭtente ekologia, "eko-komunumo" propra al sia eko-sistemo kaj aktive konscia pri sia partopreno en sia tuta medio kaj en la naturaj cikloj.

Tiu koncepto konfirmiĝas per la studo de la kutimaj ritoj de tiaj organikaj komunumoj. Multaj ceremonioj kaj ritoj karakteriziĝas ne nur per socia funkcio kia inicado, sed ankaŭ per funkcioj ekologiaj. Tiel ke, ĉe la Hopioj*, la ĉefaj agraraj ritoj havas kiel rolon instigi la kosmajn ciklojn pluiĝi, kaj materialiĝi la solsticojn kaj la sinsekvajn stadiojn de la maizkreskado de la ĝermado ĝis maturiĝo. La Hopioj scias, ke la ordo de la solsticoj kaj la stadioj de la maizkreskado estas antaŭdeterminita, sed la rita partopreno de la homoj en tiu ordo estas integra parto de tiu determinado. Kontraŭe al la magiaj procedoj laŭ strikta senco, la hopiaj ceremonioj atribuas al la homoj funkcion de partopreno pliĝuste ol de manipulado. La

-------

* Hopioj : indianoj de la Kolorado-regiono.

homoj estas en reciprokeca rilato kun la naturaj cikloj ; ili faciligu la funkciadon de la kosma ordo. La ceremonioj integriĝas en la kompleksa reto de la vivo, kiu inkludas same la ĝermadon de la maizo kiel la okazigon de la solsticoj. "Ĉiuj aspektoj de la naturo, la plantoj, ŝtonoj, animaloj, la koloroj kaj kardinalaj punktoj, la nombroj kaj seksoj, la mortinto kaj la vivanto, ĉio kunlaboras en la tenado de la universa ordo", skribis Dorothy Lee. "Finfine, la energio de ĉiu estaĵo, homa aŭ ne, kuniĝas en la granda ĉio. Kaj denove, kio gravas, estas ĉiu aspekto de tiu estaĵo. La tuta individueco de Hopio tuŝas la ekvilibron de la naturo ; kaj ĉiu individuo disvolvas sian internan kapablon por pliriĉigi sian kontribuon, tiel ke la tuta universo estas de tio stimulata."

Oni senpene prezentas al si, kiel tia harmonia koncepto pri la naturo rezultas de la harmonio reganta en la rilatoj inter la membroj de la primitivaj komunumoj. Kiel la mezepoka teologio organizis la kristanan paradizon laŭ feŭdaj formoj, same la homoj en ĉiuj epokoj atribuis al la natura mondo sian propran socian strukturon Por la Algonko*, la kastoro kun siaj klanoj kaj kabanoj saĝe partoprenis en la bonstato de la kolektivo. Ankaŭ la animaloj havis sian "magion", siajn totemajn praavojn kaj ĉerpis sian forton ĉe Manituo, spirita nutranto de la tuta kosmo. Sekve estis necese favorigi al si la animalojn ; se ne, tiuj riskus rifuzi liveri al la homoj sian felon kaj karnon. La partoprena spirito, kiu konsistigis la unuan kondiĉon por la pluvivo de la organika komunumo, plene influis la prinaturan koncepton de la antaŭskribaj homoj, kaj ankaŭ la rilatojn inter tio natura kaj tio socia.

-------

* Algonko : Nord-okcident-amerika indiano.

La disiĝo de tiaj organikaj komunumoj integritaj, fonditaj sur seksa labordivido kaj sur potencaj ligiloj, en hierarkiajn grupojn kaj fine en sociojn el klasoj, iompostiome rompis la unuecon ekzistintan inter la socia mondo kaj la mondo natura. La transformado de la klanoj kaj triboj en gerontokratioj* meze de kiuj la maljunuloj ekregis la junulojn ; la emerĝo de la patriarka familio, kiu en ĉiuj sferoj subigis la virinon al la viro ; poste la kristaliĝo de statushierarkioj al ekonomiaj klasoj fonditaj sur sistema ekspluatado materiala ; la apero de la kreskanta superrego de la urbo super la kamparo, de la teritoriaj ligiloj super la ligiloj parencaj ; kaj finfine la konstituo de la ŝtato kaj de ties aparato militista, burokrata kaj politika, formita el profesiuloj, trudanta sian regadon super la restaĵoj de la komunuma vivo - ĉiuj ĉi partiĝoj kaj kontraŭaĵoj, kiuj finreduktis al polvo la arkaikan mondon, rezultigis socian restrukturadon de la percepta aparato homa laŭ hierarkia maniero. Tiu restrukturado ne nur disigis de interne la komunumojn, sed ankaŭ instigis la regatajn klasojn fariĝi komplicoj de sia propra regateco, kaj la virinojn komplicoj de sia propra servutiĝo. Ankoraŭ pli, la psiko de la individuo troviĝis disigita kontraŭ li mem dank'al stariĝo de spiritosupereco rilate la korpon, de hierarkiiganta racieco super la sensebla eksperimento. Paralele kun la procezo, kiu transformis la homon-subjekton en objekton de manipulado fare de la socio kaj finfine fare de li mem laŭ hierarkiaj normoj, la naturo estis objektigita, senspiritigita kaj reduktita al metafizika ento tute same ideologie falsita per meĥanikfizika prezento de la ekstera realo, kiel estis la animistaj konceptoj, kiuj precipis en la arkaika socio. Loko mankas al

-------

* gerontokratio : regado fare de la maljunuloj.

mi por detale esplori kiel erodiĝis la arkaika rilato de la homaro kun la natura mondo. Mi studas tiun dialektikon en aperonta verko, "The Ecology of Freedom". Kelkaj rimarkigoj tamen trudiĝas. La heredaĵo el la estinteco kumule penetras la estantecon sub formo de problemoj kaŝitaj kaj neniam solvitaj de nia epoko. Kaj ne temas nur pri ligiloj, kiujn la burĝa socio kun plena evidenteco trudas al ni, sed ankaŭ pri la ligiloj, kiuj formiĝis dum miljaroj da hierarkia socio kaj kiuj subigis la familion al la patriarkeco, la aĝklasojn al la gerontokratioj kaj la psikon al tiaj misformoj kiel estas rezigno kaj humileco.

Longe antaŭ la apero de la burĝa socio, la greka raciismo rajtigis la statuson de la virinoj, kiu faris el ili preskaŭ transporteblajn havaĵojn, kaj la hebrea moralo metis inter la manojn de Abrahamo la povon mortigi Isaakon. Tiu redukto de la homo al objekto, ĉu kiel sklavo, ĉu kiel virino aŭ infano, havas sian ekzaktan paralelon en la povo de Noa nomi la animalojn, tiujn superregi, kaj servutigi profite al la homo la vivantan mondon. Tiel, naskitaj el du esencaj fontoj de la okcidenta civilizacio, la helenismo kaj la judismo, la prometeaj povoj de la masklo kuniĝis en ideologio de la subprema racieco kaj de la hierarkia moralo. La virino "fariĝis la personigado de la biologia funkcio, la bildo de la naturo", skribis Horkheimer kaj Adorno, "kaj ŝia subigo konsistigis la glorsignon de tiu civilizacio. Dum miljaroj la homoj revis akiri absolutan mastrecon super la naturo, konverti la kosmon en ununuran kaj vastegan ĉasterenon. Tia estas la celo, al kiu la homo strebis en socio kun maskla regado. Tia estas la signifo de la racio, lia plej alta gloro. La virino estis pli malforta, pli eta. Inter ŝi kaj la viro ekzistis diferenco,

kiun ŝi ne povis nuligi, diferenco trudita de la naturo, do la plej humiliga, kiu povas esti en socio kun maskla regado. Kiam la esenca celo estas la mastreco super la naturo, la biologia malsupereco estas kiel nekontestebla stigmato, la malforteco signita de la naturo kiel la ĉefa stimulilo de la agresemo." Ne estas hazarde, ke Horkheimer kaj Adorno arigis sub la titolo "La homo kaj la animaloj" tiujn rimarkojn, kiuj lumigas ne nur la rilaton de la viro al la virino, sed ankaŭ tiun de la hierarki-socia homo al la natura mondo en sia tuteco.

La nocio pri justeco, ĉar ĝi distingiĝas de la liberecidealo, kunigas ĉiujn tiujn valorojn en ekvivalenteca regulo, kiu radikale kontraŭiĝas al la signifo de arkaika egaleco. En organika socio ĉiuj homaj estaĵoj rajtas la vivrimedojn senkonsidere de la laborparto, kiun ili alportas al la komuna fonduso. Tio estas, kion Paul Radin nomas la leĝo de la "nereduktebla minimumo". Per tio la arkaika egaleco agnoskas la faktan neegalecon - la dependon de la malforta rilate la fortan, de la kriplulo rilate la sanan individuon, de la tre juna aŭ tre maljuna rilate la plenfortulon. La vera libereco fakte estas iu egaleco inter neegaluloj, kiu ne rifuzas la rajton vivi al tiuj, kiuj ekmalfortiĝas aŭ kies fortoj estas malpli disvolvitaj ol alies fortoj. En tia ekonomio, kiu ne spertis materialan disvolviĝon, la homoj paradokse pli laŭte agnoskas ĉies rajton pri la vivrimedoj - kaj eĉ pli noblece, ĉar ĉiuj membroj de unu tribo reciproke respondecas unuj pri la aliaj - ol en ekonomio, kies materiala disvolviĝo produktas ĉiam pli kreskantajn troaĵojn kaj samtempe batalon ĉiam pli akran por la privilegioj.

Sed tiu aŭtenta libereco, tiu egaleco inter

neegaluloj baldaŭ troviĝos perversigita. Laŭmezure kiel ili kreskas, la materialaj troaĵoj generas sociajn klasojn, kiuj iom post iom elprenas el la laboro de la plimulto la privilegiojn de la minoritato. La donaco, kiu antaŭ nelonge simbolis aliancon inter homoj ligitaj per la sango, estas iom post iom konvertita en interŝanĝo-rimedon kaj fine en varon, ĝermon de la burĝa merkato moderna. El la kadavro de la libereco naskiĝas la Justeco, gardanto de la interŝanĝo-rilato - ĉu temas pri havaĵoj aŭ moroj - kaj de la principo de egaleco en ĉio. De nun la malfortulo estas ĉiurilate "egala" al la fortulo, la malriĉulo al la riĉulo, la malsanulo al la bonfartanto, escepte pri tio, kio koncernas lian malfortecon, lian malriĉecon aŭ lian kriplecon. Abstrakte, la justeco anstataŭigas la egalecon inter neegaluloj, maksimo de la libereco, per la neegaleco inter egaluloj. Kiel skribis Horkheimer kaj Adorno : "Iam, la fetiĉoj estis subigitaj al la leĝoj de ekvivalenteco. Nun, la ekvivalenteco mem fariĝis fetiĉo. La okulbendo, kiu blindigas la justecon, signifas ne nur ke oni ne povas ataki la justecon, sed ankaŭ ke la justeco ne originas en la libereco."

La burĝa socio faras nenion alian ol peli la leĝon de ekvivalenteco ĝis ties logikaj kaj historiaj ekstremoj. Ĉiuj homoj estas egalaj kiel aĉetantoj kaj vendantoj - ĉiuj estas suverenaj sur la libera merkato. La korpaj ligiloj, kiuj iam unuigis la homojn en bandoj, klanoj, triboj, la frateco de la "polis", la profesia komunumo de la gildo, ĉio ĉi diseriĝis. La nomada homo anstataŭas la homon kolektivan; la interŝanĝa rilato substituiĝis al la ligiloj parencaj, fratecaj, metiaj, kiuj antaŭe ekzistis. Sur la burĝa merkato la cemento de la homaro

estas la konkurado : la universala antagonismo de ĉiu kontraŭ ĉiuj. Ĉe sia supera nivelo, kie batalas kapitaloj, kie la entreprenoj sin reciproke atakas kaj disŝiras, la merkato eldiras sian senkompatan maksimon : "Kreski aŭ morti" Kiu ne kreskigas la mason de sia kapitalo kaj ne voras sian konkurencanton, tiu estos vorita. En tiu ĉiam regresanta universo el nesocialaj rilatoj, kie eĉ la persono estas malaltigita al la stato de interŝanĝebla objekto, la socio obeas la regulon de produktado cele al produktado. La ekvivalenteco manifestiĝas sub la formo de la interŝanĝa valoro ; dank'al la monperado, ne estas artaĵo, ne estas morala skrupulo, kiu ne povas fali al interŝanĝebla kvanto. La oro aŭ ties papera simbolo ebligas interŝanĝi la plej valoran katedralon kontraŭ tioma nombro da alumetoj. La fabrikanto de ŝulaĉoj havas eblecon transmutacii siajn artiklojn en Rembranto-pentraĵojn, tiel defiante la talenton de la plej potenca alkemiisto.

En tia kvanta regno de la ekvivalentaĵoj, en tia socio, kies regulo estas produkti por produkti kaj kiu scias kontraŭstarigi al la morto nur la kreskadon, la natura mondo estas reduktita al arego da riĉofontoj, eminenta sfero de plej senbrida ekspluatado. La kapitalismo ne kontentiĝas per tio, ke ĝi alprenas la antaŭkapitalisman koncepton pri regado super la naturo fare de l'homo ; ĝi faras el la rabado de la naturo la vivregulon de la socio. Kvereli kontraŭ tia sistemo pro ĝiaj valoroj, peni ĝin timigi per la konsekvencoj de la kreskado, samegalas kiel ĝin riproĉi pro tio, kio konsistigas ĝian metabolismon mem. Same senutilas persvadi planton rezigni la fotosintezon, kiel peti la burĝan ekonomion rezigni kapitalakumuladon.

Cetere, al kiu sin turni ? La akumulado ne estas determinita de la bona aŭ malbona volo de la burĝoj kiel individuoj, sed de la merkantilisma rilato, kiun Marks tiel ĝuste montris kiel la bazan ĉelon de la burĝa ekonomio. Ne la perverseco de la burĝo estigas la produktadon por la produktado, sed la komplekso de la merkato, kiun li prezidas kaj al kiu li cedas. Peti liajn homajn prizorgojn kontraŭ liaj prizorgoj ekonomiaj, tio estas blindiĝi rilate tiun elementan fakton : lia povo mem dependas de lia materiala estaĵo. Li povas rezigni siajn ekonomiajn prizorgojn, nur rezignante sian propran socian realecon, nur rezignante tiun povon, kiu bridas lian humanecon. Pluigi la kredon, ke la sistemo havas eblecon forlasi sian vivprincipon responde al moralaj argumentoj aŭ al intelekta persvado, tio estas ago por groteska memmistifiko, aŭ eĉ pli malbone, por ideologia mistifiko de la socio.

Endas rekte rigardi al tiu kruda evidentaĵo: necesas detrui tiun sistemon kaj ĝin anstataŭigi per socio kapabla restarigi ekvilibron inter la homa mondo kaj la mondo natura - socio kiu unue formetu la bendon for de la okuloj de Justeco, kaj substituu al la neegaleco inter egaluloj la egalecon inter neegaluloj. Tian ekologian socion mi aliloke nomas anarkikomunismo ; en mia venonte aperonta verko, mi ĝin nomas "ekosocio". Ĉiu ĝin nomos kiel li volos.. Kio gravas, tio estas la senco de la observoj, kiujn mi ĝis nun prezentis, tio estas bone vidi, ke la provo regi la naturon devenas de la regado super la homo fare de la homo ; ke harmonio establiĝos en nia rilato kun la natura mondo, nur se la harmonio regos en nia socio. La natura ekologio havos nenian sencon por ni, se ni ne transpasos la malvastan kaj sekan kadron de tiu scienca studobjekto por fondi socian ekologion, respondan por nia epoko.

Ekstreme rigoran alternativon trudas al ni la socio de produktado cele al produktado. Multe pli ol ĉia alia socio de la pasinteco la moderna kapitalismo levis ĝis plej alta nivelo la teknikajn fortojn, ĝis nivelo, kie ni fine povus elimini la laboron kiel esencan ekzistokondiĉon de la plejo de l'homoj, kaj la nesekurecon kiel ĉefan trajton de la ensocia vivo. Ni hodiaŭ estas sojle de socio, kiu povos ignori la mankon, kaj igi la egalecon inter neegaluloj ne nur la leĝo de eta grupo intime ligita de la parencrilatoj, sed ankaŭ la universala kondiĉo de la tuta homaro kiel de la individuo, kies sociaj ligiloj fondiĝas sur la libera elekto kaj la personaj afinecoj, kaj ne plu sur la sangotrudo. La prometea personeco, la patriarka familio, la privata proprieto, la subprema racio, la teritoria civito kaj la ŝtato plenumis sian historian taskon el senkompata mobilizado de la homara laborforto, el disvolviĝo de la produktivaj fortoj kaj el transformado de l'mondo. Tiuj institucioj kaj konsciencformoj estas plene neraciaj ; tiuj "malbonoj necesaj", laŭ Bakunin, fariĝis malbonoj absolutaj. La ekologia krizo de nia epoko atestas pri tio, ke la produktrimedoj disvolvitaj de la hierarkia socio kaj aparte de la kapitalismo fariĝis tro potencaj por servi kiel regadrimedoj.

Sed se la nuntempa socio senfine persistas en sia estomaniero, la ekologiaj problemoj, kiuj stariĝos antaŭ ni, estos ankoraŭ pli timindaj ol tiuj, kiujn ni kunigas sub la rubriko "poluado". Socio fondita sur la produktado cele al la produktado estas esence anti-ekologia kaj ĝi povas konduki nur al radikale vorita natura mondo, al mondo, kies teknologio difektas la organikan kompleksecon kaj retenas nur tiun neorganikan substancon, kiu eliras ĉe la ekstremo de la muntoĉeno ; tio estas, laŭlitere, la simpla materio, kiu konsistigis la metafizikan fundamenton de la klasika fiziko. Laŭmezure kiel la kancero

de la urboj disvastiĝas sur la kamparoj, kiel la kompleksaj materialoj estas daŭre konvertataj en materialojn simplajn, kaj kiel la diverseco malaperas en la ventro de sinteza medio el vitro, brikoj, cemento, metaloj kaj maŝinoj, ne ĉesas simpliĝi la kompleksaj nutroĉenoj, de kiuj ni dependas por la sano de nia grundo, por la integreco de niaj oceanoj kaj de nia atmosfero, por fiziologia vivipoveco de nia estaĵo. Tro vorante la naturon, la sistemo reduktos la tutecon de la biosfero al la fragila simpleco de la biomoj en la dezertoj kaj polusoj. Ni iros inverse de la irado de la organika evoluo, kiu diferencigis la flaŭron kaj la faŭnon en pli kaj pli kompleksa abundo de formoj kaj rilatoj, kaj ni tiel kreos vivantan mondon simpligitan kaj malpli stabilan. Post tempopaso la konsekvencoj de tiu terura regreso ja estas antaŭvideblaj : la pli kaj pli fragila biosfero fine disfalos koncerne la bezonojn por pluvivo de l'homo, malaperigante la organikajn kondiĉojn de la homa vivo. Por tia atingo la socio de produktado por la produktado miaopinie bezonas nur tempon, sed estas neeble antaŭdiri kiom da tempo.

Ni devas krei ekologian socion - ne simple, ĉar ĝi estas dezirinda, sed tial ke ĝi estas tragike necesa. Endas, ke ni komencu vivi, se ni volas pluvivi. Tia socio implicas radikalan renverson de ĉiuj tendencoj, kiuj signis la historian disvolviĝon de la kapitalisma teknologio kaj de la burĝa socio : la ekscesan specialigon de la maŝinoj kaj de la laboro, la koncentradon de la riĉofontoj kaj de la homoj en domaregoj kaj gigantaj industriaj entreprenoj, la ŝtatigadon kaj burokratigadon de la ekzisto, la divorcon inter la urbo kaj la kamparo, la transformon de la naturo kaj de la homaj estaĵoj en objektojn. Tia plena renverso neprigas, laŭ mi, ke ni

komencu per malcentralizado de niaj urboj kaj fondado de tute novaj eko-komunumoj strikte, kvazaŭ estetike adaptiĝantaj al la ekosistemo, en kiu ili estas enplantitaj. Ni ĉi tie substreku, ke malcentralizado ne signifas arbitran disiĝon de la loĝantaro en la kamparo, ĉu en izolitajn familiojn aŭ en kontraŭ-kulturajn komunumojn - malgraŭ la vitala rolo, kiun ĉi tiuj povas ludi. Male, endas retrovi la urban tradicion de la antikvaj Grekoj, tiun de la civito komprenebla kaj regebla de siaj loĝantoj, krei novan "polis" kun homaj dimensioj, kiun, laŭ la fama vorto de Aristoto, ĉiu povas ĉirkaŭvidi per unu sola rigardo.

Mi opinias, ke tia komunumo forviŝus la rompon inter la urbo kaj la kamparo kaj eĉ, verdire, inter la spirito kaj la korpo, ĉar ĝi efektivigus kunfandiĝon de la mana kaj intelekta laboroj, de la industrio kaj agrikulturo, dank'al rotacio aŭ al diversigo de la taskoj. La eko-komunumo apogiĝus sur novtipa teknologio uzanta adapteblan ilaron, taŭgan por variaj utiligoj kaj produktantan daŭremajn kaj bon-kvalitajn havaĵojn - kaj estus finite kun la inkluzivita kadukiĝo, kun la prikvanta frenezo por produktado de sentaŭgaĵoj, kun neniel utile akcelata cirkulado de la varoj. Estu klare, ke mi ne pledas por forlaso de la teknologio kaj por retroiro al paleolitika plukado. Tute male, mi konsideras, ke la teknologio, kiun ni disponas, ne estas sufiĉe perfektigita, se oni ĝin komparas kun la etskala kaj alte adapt-ebla eko-teknologio, kiun oni povus disvolvi kaj kiu en larĝa mezuro jam ekzistas sub eksperimenta formo aŭ en la dosieroj de la inĝenieroj. Tia teknologio utiligus la neelĉerpeblajn energi-donajn kapablojn de la naturo - la sunon kaj la venton, la tajdojn kaj la akvofluojn, la tempe-

raturajn diferencojn de la terŝelo kaj la hidrogenon ĉirkaŭ ni abundan - por liveri al la ekokomunumoj produktojn nepoluantajn aŭ kies forĵetaĵoj estus facile reutiligeblaj. Malcentralizado ebligus eviti la problemojn starigitajn per la koncentrado de la solidaj ruboj devenantaj de niaj monstraj urboj, ruboj pri kiuj oni ne havas alian solvon ol bruligon aŭ amasan mergadon en niajn marojn.

Mia espero estas, ke tiaj eko-komunumoj kaj ilia teknologio adaptita al la homaj dimensioj malfermos novan eraon el rilatoj de individuo al individuo kaj el rekta demokratio, kaj prizorgos la liberan tempon, dank'al kiu, laŭ la maniero de la Grekoj, la loĝantaro havus la eblon regi la sociajn aferojn sen perado de la burokratoj kaj de la politikaj profesiuloj. Tiel estus forviŝitaj kaj transigitaj la disiĝoj, kiujn de tiom longa tempo efektivigis la hierarkio en la socia korpuso. Tiel estus repaciĝintaj kaj reakordiĝintaj en humanisma kaj ekologia sintezo la nuntempe apartigitaj kaj kontraŭigitaj seksoj, aĝklasoj, urbo kaj kamparo, registaro kaj kolektivo, spirito kaj korpo. El tia sintezo ekaperus nova rilato inter la homaro kaj la natura mondo, en kiu la socio estus mem kvazaŭ eko-sistemo fondita sur la unueco en diverseco, sur la spontaneco kaj sur nehierarkiaj rilatoj. Ni strebus realigi unue en niaj propraj kapoj la reenkondukon de la spirito en la naturan mondon - evidente ne per malnobliga retroiro al la mitoj de la arkaika erao, sed per movo faranta el la homa konscio la lokon, kie la natura mondo fariĝas memkonscia, memkreanta, informita per ne subprema racieco, kiu penas nur nutri la diversecon kaj la kompleksecon de la vivo. En tia neprometea perspektivo povus ekaperi nova sentemeco, generanta, laŭ la

vortoj de Marks, homecigon de la naturo kaj naturigadon de la homaro.

Se mi kontraŭigas ekologion al mediismo, tio ne estas por diri, ke ni devus rezigni obstakli la konstruadon de nukleaj centraloj kaj aŭtovojoj, kaj retiriĝi en pasivan atendon de la ora tempaĝo de ekologio. Male, ni pasie tenu la terenon ĉie, kie ĝi estas atakata, por savi tion, kio restas al ni kaj havi eblecon rekonstrui la socion en medio kiel eble malplej poluata kaj difektata. Sed ni konservu en nia spirito tiun rigoran alternativon inter ekosocio kaj ekologia ruiniĝo, kaj ĉiaokaze ni gvidu nin per kohera teorio ; se ne, la anstataŭaj solvoj, kiujn ni proponas, estos tute same vantaj, kiel estas barbaraj la perspektivoj de la nuntempa socio. Por ekzemplo, estas neeble rekomendi al la Tria Mondo ne industriiĝi sin, dum ĝi estas elmetita al la plej rigoraj materiala nehavo kaj mizero. Sed kohera teorio pri la fundamento de la socia problemo ebligas al ni prezenti al la nun disvolviĝantaj nacioj la modelojn de teknologio kaj socia organizado, kiujn ni rekomendas por nia propra socio. Ekstere de teoria kadro kohera, nia dirado kaj nia agado estas destinitaj al lacigaj banalaĵoj, al epizodaj luktoj kaj piaj deziresprimoj, kiujn ĉiu povas prave ignori, krom se lia ĉiutaga intereso estas koncernata.

Oni sendube povus senfine komentarii pri tiuj problemoj. Mi volus konkludi per rimarkigo iom kruda sed honesta. La nura libereco, kiun ni rajtas esperi, paradokse - aŭ, mi devus diri, dialektike - rezultas el tio, ke niaj elektebloj estas katastrofe limigitaj. Antaŭ unu jarcento Marks povis kun ŝajna pravo aserti, ke alternativo al socialismo estas barbareco.

Eĉ se ege tragika estis tiu ĉi, la homaro povis esperi elsaviĝi. Hodiaŭ la situacio fariĝis multe pli grava. Pro la ekologia krizo la elektoj, kiujn povas fari la socio rilate sian estontecon, fariĝis multe pli decidigaj. Ni aŭ realigos ekosocion fonditan sur la ekologiaj principoj, aŭ regresos kiel specio. Tio ĉi ne estas, laŭ mi, apokalipsa retoriko. Ĝi estas scienca juĝo, kiun tago post tago pravigas la vivprincipo mem de nia nuntempa socio.

* *
*

# *PRI LA*

# *EKOLOGIA MOVADO*

## POVO DETRUI
## POVO KREI

(Manifesto de la grupo "Ecology Action East")

La detrupovo de tiu nia socio disvolvas sin laŭ senprecedenta skalo en la homarhistorio, kaj demence kaj kvazaŭ sisteme ruinigas la ensemblon de la vivanta mondo kaj ties materialajn bazojn.

En preskaŭ ĉiuj regionoj ĝi venenas la aeron, poluas la akvofluojn, sorbigas de akvo la grundojn, senakvigas la teron, detruas la flaŭron kaj faŭnon. Nek la marbordaj regionoj nek la profundaĵoj de la maro eskapas tiun malpurigon. Eĉ pli grava estas post longa tempopaso la eble neinversigebla damaĝo trudita al la fundamentaj biologiaj cikloj kiel tiuj de karbono kaj azoto, de kiuj dependas la tenado kaj renoviĝo de la vivo ĉe ĉiuj estaĵoj, inkluzive la homon. La senpripensa dissemado de radioaktivaj rubaĵoj, de tre persistemaj pesticidoj, de reziduoj de plumbo kaj de miloj da toksaj substancoj en la nutraĵoj, akvo kaj aero ; la vastiĝo de la urboj en ampleksaj zonoj koncentrantaj loĝantarojn laŭnombre kompareblajn kun tutaj nacioj; la pliintensiĝo de la fonbruoj ; la streĉoj kreitaj de la trafikŝtopadoj, la koncentreja vivo kaj la manipulado de la homamasoj ; la giganta akumulado de ruboj, defalaĵoj, eluzitaj akvoj kaj industriaj elfluoj ; la saturado de la vojoj kaj stratoj per la aŭtotrafiko ; la senbrida malŝparo de valoraj krudaj materialoj ; la difektado de la tero per la biena spekulado, la minoj, la arbara ekspluatado kaj la vojkonstruado - la damaĝo tiel kaŭzata al la planedo en unu generacio multe superas tiun faritan dum miljaroj da homa ĉeesto. Tia akcelado sinistre aŭguras pri tio, kio atendas la venontan generacion.

La esenco de la ekologia krizo niaepoka estas tio, ke tiu nuna socio estas laŭlitere malfaranta la laboraĵon de la vivevoluado. Estas banale diri, ke la homaro estas nur unu el la histeroj de la vivanta materio. Sendube estas pli grave hodiaŭ substreki, je tiu stadio, kie ni staras, kiom la homaro estas ligita al la kompleksec o kaj diverseco de la vivo, kiom la bonstato kaj pluvivo de la specio dependas de tre longa evoluado de la organiko al formoj ĉiam pli kompleksaj kaj interdependaj. La disvolvado de la vivo al kompleksa reto, la ekstrema diversiĝo de la primitivaj animaloj kaj vegetaĵoj estis la necese antaŭaj kondiĉoj por ekapero kaj pluvivo de la homaro mem kaj por la stariĝo de harmoniaj rilatoj inter tiu ĉi kaj la naturo.

**Teknologio kaj loĝantaro**

Ja povas esti, ke restas al ni ne multe pli ol unu generacio antaŭ ol la detruo de la medio fariĝos neinversigebla. Estas do kun absoluta honesteco, ke ni devas serĉi la kaŭzojn de la ekologia krizo. La tempo rapide pasas kaj eble plu restas al ni nur la lastaj jardekoj de la XX-a jarcento por restarigi la ekvilibron inter la homaro kaj la naturo.

Ĉu sidas la kaŭzoj de la .ekologia krizo en la disvolvado de la teknologio ? La teknologio fariĝis la ja oportuna propeka kapro, por eviti montradon de la sociaj kondiĉoj profundaj, kiuj igis malutilaj la maŝinojn kaj teknikon.

Estas efektive tro oportune forgesi, ke la teknologio servis ne nur por detrui la medion, sed ankaŭ por ĝin plibonigi. La neolitika Revolucio, kiu inaŭguris la plej harmonian periodon en la rilatoj inter la naturo kaj la post-paleolitika homaro, estis antaŭ ĉio revolucio teknologia.

Transdonis tiu periodo al la homaro la arton kultivi la teron, la teksadon, potfaradon, malsovaĝigon de la bestoj, la radon kaj multe da aliaj decidigaj inventaĵoj. Estas vere, ke ekzistas teknikoj kaj teknologiaj kondutoj absolute neakordigeblaj kun la ekvilibro inter la homaro kaj la naturo. Estas ĝuste tasko nia distingi la promesojn de la teknologio - ties krekapablon disde ties detrukapablo. Ne estas ununura "teknologio", kiu ekzistus sendepende de la sociaj kondiĉoj kaj rilatoj ; estas diferencaj teknologioj kaj diferencaj sintenoj rilate la teknologion ; iuj estas nemalhaveblaj por la restarigo de la ekvilibro, aliaj kontribuas al ties detruo. Kion bezonas la homaro, tio ne estas flankenmeti ĉian progreseman teknologion; tio estas funde disvolvi selektan teknologion, kiu respektu la ekologiajn principojn.

Ĉu do en la demografia kreskado sidas la kaŭzoj de la ekologia krizo ? Tiu ĉi klarigo estas la plej maltrankviliga kaj multrilate la plej sinistra el tiuj donitaj de la ekologia movado en Usono. Tie ĉi, unu **efiko** nomata "demografia kreskado" kaj fabrikita laŭ supraĵaj statistikoj kaj hazardaj projekcioj, estas konvertita en unu **kaŭzon**. El problemo relative akcesora en nia epoko, oni faras problemon precipan, tiel maskante la fundamentajn kaŭzojn de la ekologia krizo. Ja se la nuntempaj kondiĉoj ekonomiaj, politikaj kaj sociaj pludaŭros, venos tago, kiam la homaro superloĝos la planedon, kaj pro la nura efiko de la nombro, kiel parazito invados sian propran loĝlokon. Tamen, estas io maldeca en la fakto, ke la "demografia kreskado" estas denuncata kiel unua faktoro de la ekologia krizo, fare de lando, kiu, kvankam enhavanta nur 7% de la tutmonda loĝantaro, voras pli ol 50% el la riĉaĵoj de la planedo kaj estas nuntempe ekstermanta orientan popolon, kiu dum jarcentoj vivis en subtila ekvilibro kun sia medio.

Ni iom ekzamenu tiun demografian problemon, kiu tiel forte ekscitas la blankajn rasojn de Nord-Ameriko kaj Eŭropo, tiujn, kiuj ĝuste senhonte ekspluatis kaj ekspluatas la loĝantarojn de Azio, Afriko, Latinameriko kaj Sud-Pacifiko. La ekspluatatoj penas demonstri al siaj ekspluatantoj, ke ili bezonas nek kontraŭkoncipilojn, nek armitajn "liberigantojn", nek profesoron Ehrlich por solvi siajn demografiajn problemojn, sed ja justan kompenson pro la nekredeblaj rabadoj, pri kiuj kulpis Ameriko kaj Eŭropo en ilia lando. Pagi tiun ŝuldon estas pli urĝe ol serĉadi ekvilibron inter la procento de la naskiĝoj kaj tiu de la mortoj. La popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj Sud-Pacifiko plenrajte rimarkigos, ke estas iliaj amerikaj "konsilantoj", kiuj montris al la mondo, kiel oni ruinigas virgan kontinenton en malpli ol unu jarcento, kaj kiuj riĉigis la homaran vorttrezoron per la esprimo "inkluzivita kadukiĝo" ("built-in obsolescence").

Klara estas almenaŭ tio ĉi : Kiam la Industria Revolucio en la komenco de la XIX-a jarcento bezonis vastajn rezervojn da laboristoj por funkciigi la uzinojn kaj malaltigi la salajrojn, la nova industria burĝaro entuziasme salutis la demografian kreskadon. Kaj tiu ĉi estiĝis malgraŭ la lacegigaj labortagoj, la superloĝataj urboj kaj ties akompanantaro el pandemiaj* malsanoj kiel tuberkulozo kaj ĥolero en Eŭropo kaj Usono. Se en tiu epoko la naskiĝokvanto superis la mortokvanton, tio ne estis ŝuldata al ajna progreso de la medicino kaj higieno ; tion oni ŝuldis al la detruo, fare de la kapitalisma entrepreno, de la familiaj strukturoj antaŭ-industriaj, de la vilaĝaj institucioj, de la reciproka helpo

---

* pandemio : epidemio, kiu trafas grandan nombron da personoj en vaste etendita geografia zono.

kaj de la tradiciaj kaj stabilaj vivmanieroj. La socia demoralizado kaŭzita de la terurigo antaŭ la uzina sistemo, ankaŭ la malaltigo de la tradiciaj kamparanoj al proletaroj kaj urbanoj ege ekspluatataj, generis senrespondecan konduton rilate la familion kaj la reproduktadon. Samkiel malbonkvalita ĝino la sekseco taŭgis por momente forgesi la laboron ; la nova proletaro same senkonscie ekfabrikis infanojn, el kiuj multaj estis neniam atingontaj adoltecon, kiel ĝi dronis en alkoholismo. Estas proksimume tio, kiu produktiĝis , kiam la vilaĝoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko estis siavice oferitaj sur la altaro de imperiismo.

Hodiaŭ la burĝaro "vidas" la aferojn diference. La ora tempaĝo de la "libera entrepreno", de la "libera laboristaro" stompiĝas. La erao, kiu malfermiĝas, estas tiu de la monopoloj, de la karteloj, de la ŝtatigitaj ekonomioj, de la instituciigitaj formoj de laboristo-mobilizado (sindikatoj) kaj de la aŭtomataj kaj cibernetikaj ekipaĵoj. Por kontentigi siajn bezonojn, la kapitalisma ekspansio ne plu postulas vastajn rezervojn el senlaboruloj ; ĝi ĝenerale preferas negoci la salajrojn ol ilin lasi al la libera ludo de la labormerkato. El necesaĵo, kio ĝi estis, la rezerva industriarmeo fariĝis minaco por la stabileco de la burĝa planita ekonomio. La logiko de tiu nova "perspektivo" trovis sian plej teruriganl esprimon en la germana faŝismo. Antaŭ la okuloj de la nazioj Eŭropo jam estis "superloĝata" en la tridekaj jaroj kaj la "demografia problemo" estis "solvata" en la gasoĉambroj de Auschwitz. La saman logikon oni retrovas en multaj novmaltusanaj rezonadoj, kiuj hodiaŭ kaŝiĝas sub la ekologia masko. Ni ne trompiĝu.

Frue aŭ malfrue, la blinda multobliĝo de la homaj estaĵoj devos ĉesi. Sed, aŭ la nasko-

kontrolo estos farata per "sociaj kontroloj", nome per aŭtoritataj, rasismaj metodoj kaj fine eble per genocido, aŭ ĝi estos plenumata de socio libereca kaj ekologia, socio, kiu fondas sur respekto al la vivo la serĉadon de nova ekvilibro kun la naturo. Tiel estas la du neakordigeblaj opcioj, kiuj prezentiĝas al la moderna socio kaj inter kiuj ni senambigue elektu. La ekologia agado fundamente estas agado socia. Aŭ ni rekte atakos la sociajn radikojn de la nuntempa ekologia krizo, aŭ ni ŝoviĝos al totalismo.

### Ekologio kaj socio

La koncepto, laŭ kiu la homaro regu kaj ekspluatu la naturon, devenas de la regado kaj ekspluatado de la homo fare de l'homo, kaj eĉ pli fore en la tempo, de la subiĝo de la virino al la viro sine de la patriarka familio. Ekde tiam oni pli kaj pli konsideris la homajn estaĵojn kiel simplajn "rimedojn", kiel objektojn kaj ne kiel subjektojn. La hierarkioj, la klasoj, la alproprigmanieroj kaj la ŝtataj institucioj servis por determini en la spirito de l'homo ties rilaton kun la naturo. Tiu ĉi siavice troviĝis pli kaj pli sisteme malaltigita al rango de simpla rimedo, same senkompate ekspluatinda kiel la sklavoj de la latifundio. Tiu koncepto pri la mondo penetris ne nur en la oficialan kulturon de la hierarkiigita socio ; ĝi ankaŭ fariĝis la bildo, kiun faris al si pri si mem la sklavoj, la servutuloj, la laboristoj kaj la ĉiaklasaj virinoj. La "labormoralo", la etiko de sinofero kaj rezigno, la sublimiĝo de la erotikaj deziroj kaj la espero pelita en la transcendon (temo same azia kiel eŭropa), tielaj estis la rimedoj, per kiuj oni kondukis la sklavojn, la servutulojn, la laboristojn kaj la inan duonon de la homaro al memsubpremado, al forĝado de la propraj katenoj kaj al ŝlosado de la propra prizono.

Se, en la hierarkia socio hodiaŭ, tiu primonda koncepto ekdiseriĝas, tio estas ĉefe tial, ke la ege produktiva kapablo de la moderna teknologio malfermis novajn horizontojn : la mankofinon, iun eraon de materiala abundo kaj de fine ebla libera tempo, kaj tio ĉi preze de eta peno. La socio pli kaj pli suferas streĉadon inter "tio, kio estas" kaj "tio, kio povus esti", kaj tiu streĉado paroksismas pro la ekspluatado kaj detruado, same malraciaj kiel malhumanaj, de la tero kaj de ties loĝantoj. La ĉefa obstaklo kontraŭ la solviĝo de tiu streĉado sidas en la ankoraŭ tre forta influo de la hierarkia socio sur niaj imagoj kaj sur niaj agoj. Pli facile estas rifuĝi en la kritiko kontraŭ la teknologio kaj la demografia kreskado ol kontraŭbatali sur ĝia propra tereno tiun socian sistemon arkaikan kaj detruivan. Jam de la naskiĝo, ni estas de la familio, de la religio, lernejo kaj laboro kondiĉitaj por akcepti la hierarkion, la rezignon, la ŝtatpovon kiel la fundamentajn premisojn de ĉiaj pensoj. Se ĝi ne situas sur tute diferencaj bazoj, ĉia projekto por restarigo de ekologia ekvilibro estas nur fiaskonta paliativo.

Pro sia escepta kultura akiro, la moderna socio, la burĝa socio movata de l'profito, altigas la intensecon de la konflikto inter la homaro kaj la naturo ĝis nivelo multe pli danĝera ol tion faris la antaŭ-industriaj socioj. La burĝa socio ne kontentiĝas, farante el la homoj objektojn, el ili ĝi faras varojn. La konkurenco inter tiuj homaj estaĵoj transformitaj en varojn fariĝas memcelo, samkiel la produktado de senutilaj havaĵoj. La bonkvalito estas konvertita en kvanton, la individua kulturo en kulturon amasan, la komunikado inter la personoj en komunikadon amasan. La natura medio fariĝas grandega uzino, la urbo, giganta bazaro ; ĉia io, de sekoja arbaro ĝis virina korpo, "havas iun prezon". Ĉia io havas sian monan ekvivalenton,

ĉu ĝi estas sankta katedralo aŭ la honoro de homo. La teknologio ĉesas esti produkto de la homaro ; la homaro fariĝas produkto de la teknologio. La maŝino ne ampleksigas la povon de la laboristo, ĉar la laboristo fariĝis simpla peco de la maŝino.

Ĉu miri, ke socio, kiu tiel ekspluatas, malaltigas, kvantotaksas, starigas la homaron kontraŭ si mem kaj kontraŭ la naturo per maniero pli terura ol neniu alia socio en la pasinteco?

Jes, transformado estas necesa. Sed transformado tiel radikala kaj plena, ke ĝi disrompos eĉ la de ni hereditajn nociojn pri revolucio kaj libereco. Oni ne plu povas kontentiĝi per parolado pri novaj teknikoj ebligantaj konservi kaj pliriĉigi la naturan medion ; ni komunume respondecu pri la tero kiel homa kolektivo, kaj ni rompu de la privata proprieto la katenojn, kiuj falsis nian koncepton pri la vivo kaj la naturo de post la disrompiĝo de la triba socio. Ni eliminu ne nur la hierarkion burĝan, sed la hierarkion mem ; ne nur la patriarkan familion, sed **ĉiujn** specojn de regado seksa aŭ parenca ; ne nur la burĝan klason kaj ties alproprigan sistemon, sed **ĉiujn** sociajn klasojn kaj **ĉiujn** formojn de proprieto. La homaro devas ekposedi sin mem same individue kiel kolektive, tiel ke ĉia homa estaĵo vere havu en mano sian ĉiutagan sorton. Oni devas malcentralizi la urbojn, fari el ili ekologiajn komunumojn - eko-komunumojn - subtile kaj kvazaŭ artiste alĝustigitaj al la eko-sistemoj, kiuj ilin akceptas. Endas repripensi kaj perfektigi niajn teknikojn por fari el ili unu eko-teknologion kapablan plej bone utiligi la lokajn energifontojn kaj krudajn materialojn kun poluo eta aŭ eĉ nula. Ni devas retrovi ĝustan senson pri niaj bezonoj, bezonoj naskataj el sana vivo kaj esprimantaj la personajn inklinojn kaj ne "bezonoj" diktataj de la amaskomunikiloj. Ni devas limigi laŭ

homa skalo nian medion kaj sociajn aktivecojn, kaj en la administrado de la socio forpeli la perantojn kaj starigi personajn kaj rektajn rilatojn. Resume, el la bildo, kiun ni prezentas al ni pri ni mem, pri la aliaj homoj kaj la naturo, endas forpeli ĉian formon de regado ĉu socia aŭ individua. 'Administri la aferojn' anstataŭos 'administri la homojn'. La revolucio, al kiu ni aspiras, devos renversi ne nur la politikajn instituciojn kaj la ekonomiajn rilatojn, sed ankaŭ la konsciencon, la ĉiutagan vivon, la erotikajn dezirojn kaj la sencon de la vivo.

Kio estas farenda, tio estas aboli tiun spiriton, tiujn sistemojn de regado kaj subpremo, kiuj venas el la praepokoj kaj kiuj starigis la homon kontraŭ la homo kaj kontraŭ la naturo. Se la ekologia movado ne ampleksos la regadproblemon kun ĉiuj ties aspektoj, ĝi neniom kontribuos al la eliminado de la profundaj kaŭzoj de la ekologia krizo en nia epoko. Se ĝi ne transos iun reformisman lukton kontraŭ la poluado aŭ por la konservado de la naturo, se ĝi ne konsideros la necesecon de revolucio en plej larĝa senco, ĝi servos nur kiel sekuriga valvo por la nuna sistemo de ekspluatado de la naturo kaj de la homoj.

**Celoj**

Multrilate la nuna batalo de la ekologia movado estas prokrasta agado kontraŭ la senbrida detruo de la medio. Sed iuj el ĝiaj plej konsciaj elementoj havas kiel celon plene revoluciigi la interhomajn rilatojn kaj la rilatojn de la homaro kun la naturo.

Kvankam ili ofte kruciĝas, tiuj du aksoj estas nete distingendaj. La grupo Ecology Action East subtenas ĉian klopodon por protekti la medion : por antaŭŝirmi la purecon de la aero kaj akvo, por limigi la uzadon de pesticidoj

kaj nutraj aldonaĵoj, por redukti la aŭtotrafikon en la urboj kaj sur la vojoj, por plibonigi la urbajn sanitarajn kondiĉojn, por malhelpi la dissemadon de la radioaktivaj elfluoj en la medion, por tenadi kaj etendi la naturrezervojn kaj defendi la animalajn speciojn kontraŭ la homaj damaĝoj.

Sed Ecology Action East neniel iluziiĝas: tiaj prokrastaj agoj neniom konsistigas la solvon de la fundamenta konflikto, kiu kontraŭigas la nunan sociordon al la natura mondo. Ili estas eĉ ne kapablaj haltigi la timegindan impeton, kiu pelas tiun nian socion sur la detruada vojo.

Tiu socio moktrompas nin. Ĝi konsentas al ni tute partajn reformojn krude netaŭgajn, post tre longa tempopaso efektivajn, por deturni nian atenton kaj niajn energiojn de la plej gravaj detruentreprenoj. Estas iasence kvazaŭ oni proponus al ni kvadraton da sekojoj kontraŭ la tuta ĉeno de la Kaskadoj. Eĉ lokita en pli larĝa perspektivo, tiu peno por redukti ekologion al tiutipa marĉando nenion savas ; ĝi estas nekosta procedo por likvidi la plej grandan parton de la planedo interŝanĝe de kelkaj insuletoj el naturo, "poŝparkoj" en betona dezerto.

Ecology Action East havas du precipajn celojn : la unua estas disvolvi, sine de la revolucia movado, la konscion pri tio, ke la media krizo estas la malbono plej grava kaj plej prema generita de tiu nia socio de ekspluato kaj fremdigo, kaj ke ĉia projekto aŭtente revolucia devas stariĝi sur ekologiaj principoj ; la dua estas konsciigi al la milionoj da Usonanoj, kiuj maltrankviliĝas pro la media detruo, la en nia socio kaj en nia primonda koncepto radikalajn transformojn neprigatajn de la principoj mem de ekologio, se oni tiujn pelas ĝis ilia logika konkludo.

Ecology Action East estas solidara de la revolucio de la ĉiutaga vivo, kiu, en tio kion ĝi havas plej bonan, celas plilarĝigi la kampon de la homaj eksperimento kaj libereco. Ni subtenas la liberiĝon de la virinoj, de la infanoj, de la samseksemuloj el ambaŭ seksoj, de la Nigruloj, de la koloniitoj kaj laboristoj el ĉiuj kondiĉoj tial, ke tiaj bataloj enskribiĝas en la ĝenerala batalo, kiu intensiĝas, kontraŭ la nememoreblaj tradicioj kaj institucioj de la superrego, ĉar strukturas la detruivajn kondutojn rilate la naturan mondon ja tiuj tradicioj kaj institucioj. Ni subtenas la liberecajn komunumojn kaj la porliberecajn batalojn, kie ajn ili ekaperas ; ni estas solidaraj de ĉia strebado, kiu favoras la spontanan kaj aŭtonoman disvolvon de la junuloj ; ni kondamnas ĉian provon subpremi la homan seksecon kaj la erotikigon de la vivo. Ni kuniĝas al ĉiuj esploroj por krei estetikan kaj ĝojan viv- kaj labormanieron : disvolvado de la metiistaj laboroj kaj bonkvalitaj produktoj, inventado de novaj eko-komunumoj kaj eko-teknologioj ; kaj al ĉiuj depostuloj pri la rajto ĉiutage ĝui la naturbelaĵojn aŭ interrilatiĝi kun aliuloj por tuja kaj volupta plezuro.

Resume, ni aspiras al revolucio, el kiu naskiĝos politike sendependaj komunumoj, kiuj determinos sian vastecon kaj la nombron de siaj enloĝantoj laŭ nova ekologia konscienco ; komunumoj, kiujn tiu sama konscienco gvidos en la elekto de la teknikoj, de la sociaj strukturoj, vivmanieroj, artoj kaj de ĉiuj aspektoj de la ĉiutaga vivo.

Sed ni havas nenian iluzion rilate la eblecon realigi eĉ parte tian vivmanieron sine de socio de morto. La hodiaŭa usona socio estas venenita per la rasismo, kaj sufokas la tutan mondon, ne nur vorante ties vivorimedojn kaj riĉaĵojn, sed ankaŭ oponante al ĉia ekintenco pri liberigo kaj aŭtonomeco, ĉu eksterlande, ĉu en Usono

mem. Ĝi havas nenian alian celon ol la produktadon por la produktado, la pluiĝon de la hierarkio kaj de la laboro en la tuta mondo, la manipuladon kaj la regadon super la amasoj helpe de ŝtataj kaj centralizitaj institucioj. Ĝi estas senrevene neakordigebla kun mondo amanta la vivon. Se la ekologia movado ne pelos sian pripenson ĝis tiaj konkludoj, ĝia penado por konservo de la natura medio estos nura obskurantismo. Se ĝi ne elektos kiel ĉefan celon la revolucion en ĉiuj aspektoj de la vivo - socia samkiel natura, politika samkiel persona, ekonomia samkiel kultura - la ekologia movado baldaŭ estos nur sekuriga valvo de la establita ordo.

Nia espero estas, ke grupoj kiel la nia multobliĝos tra la tuta lando, same kiel ni organiziĝos sur humanismaj kaj liberecaj bazoj, kaj agados kun spirito de komuneco kaj interhelpo. Nia espero estas, ke ili penos disvolvi ekologian konduton ne nur rilate la naturon sed ankaŭ rilate la homojn, kaj strebos starigi spontanajn kaj variajn rilatojn interne de la grupoj kaj inter la grupoj.

Ni esperas, ke la ekologiaj grupoj forpuŝos ĉian peton "al la ŝtatestro" aŭ al la burokrataj institucioj naciaj aŭ internaciaj, t.e. al krimuloj, kiuj materie kontribuas al la nuntempa ekologia krizo. Ni opinias, ke la homojn mem endas peti, ilian kapablon rekte agi kaj tiel preni enmane sian propran vivon. Ĉar nur tiel stariĝos senhierarkia kaj senrega socio, socio en kiu ĉiu estos la mastro de sia propra destino.

Estas tempo transpasi ĉiujn grandajn rompojn, kiuj apartigis la homon disde la homo, la homaron disde la naturo, la individuon disde la socio, la urbon disde la kamparo, la spiriton disde la korpo, la racion disde la sento kaj ĉiun

generacion disde la aliaj. La mondo de la manko konsideris la kontentigon de la nememoreblaj aspiroj al pluvivo kaj al materiala sekureco, kiel nepre antaŭan kondiĉon por la libereco kaj disflorado de la homoj. Por vivi, endis unue pluvivi.

La situacio ektransformiĝas. La ekologia krizo tendencas renversi la tradician maksimon. Hodiaŭ, se ni volas pluvivi, ni unue vivu. La solvoj estos laŭmezure de la problemo, aŭ la naturo terure venĝos kontraŭ la homaron.

Decembro 1969.

## ENHAVO


Transe de la mankotempo... 5
Spontaneco kaj organizado... 25
Ekologio kaj revolucia penso... 57
Por ekologia socio... 83
Pri la ekologia movado... 105



*****************************************

Directeur de publication & imprimeur
Christian Baudé, F 47340 Laroque Timbaut

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laûte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1983 * 12 FF